# ESTRADO-SUTRO DE DARMO-TREZORO
de la Sesa Patriarko Huineng

# 六祖大师法宝坛经

「世汉双语版」

Esperantigita de Wang Chongfang
王崇芳◎世译

# ESTRADO-SUTRO DE DARMO-TREZORO

## de la Sesa Patriarko Huineng

# 六祖大师法宝坛经

## （双语版）

**Esperantigita de Wang Chongfang**

**kun respektego**

**世界语者王崇芳敬译**

La budho Ŝakjamunio

释迦牟尼佛

La unua patriarko Arya Bodidarmo

初祖达摩祖师

La dua patriarko Majstro Huike

二祖慧可大师

La tria patriarko Majstro Sengcan

三祖僧璨大师

La kvara patriarko Majstro Daoxin

四祖道信大师

La kvina patriarko Majstro Hongren

五祖弘忍大师

La sesa patriarko Majstro Huineng

六祖惠能大师

Propre sin trovas neniu bodiarbo,
La klara spegulo havas nenian soklon;
Ĉar ĉio estas malplena ekde la komenco,
De kie do povus veni la polvo?
菩提本无树，明镜亦非台，本来无一物，何处惹尘埃?

— el Estrado-Sutro

Nia Vera Naturo, kiu estas la semo aŭ la kerno de bodio, estas nature pura kaj klara, kaj nur per uzo de ĝi ni povas rekte atingi la budhecon.
菩提自性，本来清净，但用此心，直了成佛。

— el Estrado-Sutro

Miaj amikoj en la boneco, tiuj, kiuj deziras sekvi la instruojn de la Budho, povas fari sian praktikadon ankaŭ hejme. Estas tute ne necese por ili resti en temploj.
善知识，若欲修行，在家亦得，不由在寺。

— el Estrado-Sutro

Interne de nia menso sin trovas budho, kaj tiu ĉi budho estas la vera budho. Se budho ne ekzistas en via menso, kie do vi povos trovi la veran budhon?
我心自有佛，自佛是真佛；自若无佛心，何处求真佛。

— el Estrado-Sutro

Eraraj pensoj portas al ni iluziojn,
Ĝustaj pensoj helpas al ni forigi ilin.
邪来烦恼至，正来烦恼除。

— el Estrado-Sutro

## DANKOJN

Al la darma majstro Miaohui kaj la majstro Chongzheng, kaj al ĉiuj aliaj amikoj, kiuj faris klopodojn en siaj eblaj manieroj aŭ finance helpis, por la efektivigo de la eldono de tiu ĉi traduko; sen iliaj penadoj, tiu ĉi verko neniel povus aperi en Esperanta versio antaŭ viaj okuloj;

Al la eminentaj esperantistoj Miaohui, Zhao Jianping, Xiong Linping, Wen Jingen, Huang Yinbao (Trezoro), s-ino Shi Xueqin, s-ino Xu Xiaonan, kaj aliaj geesperantistoj, kiuj atente kontrollegis la tutan tekston de la kruda traduk-versio kaj metis al mi valorajn korekt-proponojn; sen ilia sincera kaj efika kunlaboro, la teksto ne povus havi sian relative facilan legeblecon;

Al s-ro Wang Bin, kiu liveris al mi ĉinajn necesajn budhismajn materialojn kaj vortarojn; sen tiuj materialoj kaj il-libroj mi ne povus sukcese fini la tradukon;

Al ĉiuj amikoj, kiuj helpis kaj kuraĝigis min dum la tradukado en diversaj manieroj;

Al mia kara edzino Fan Jinhua, mia filino Wang Baohong, kaj miaj aliaj familianoj; sen ilia amplena prizorgo en la vivo mi neniel povus dediĉi mian trankvilan koron kaj mian tutan tempon al la traduko;

Al mia paro da kadukaj manoj, precipe la dekstra duonparaliziĝinta post la apopleksio (ĝi jam perdis la skribkapablon, sed feliĉe ankoraŭ povas frapadi la komputilan klavaron); sen ilia diligenta, kvankam mallerta, laboro, mia modesta traduko neniel povus sin prezenti antaŭ la legantoj en Esperanta skriboformo.

Wang Chongfang, la tradukinto
2023-05-09

# 鸣谢

感谢妙慧法师、崇正法师及其他所有为本书世界语译本的问世以各种可能的方式作出贡献或出资的朋友;没有他们热心的帮助和努力,本译本不可能出现在各位眼前。

感谢资深世界语者妙慧法师、赵建平、熊林平、温晋根、黄银宝,和史雪芹(女)、徐啸枘(女)等世界语朋友对译文初稿进行审读并提出了宝贵的修改建议。没有他们的真诚有效的合作,译文不可能具有较好的易读性。

感谢王彬先生提供了必要的中外文佛学资料和佛学辞书,没有这些资料和工具书,本译本难以顺利完成。

感谢在我翻译过程中以各种形式给予帮助和鼓励的所有朋友。

感谢我的老伴儿范金花和我女儿王保宏和其他家人在翻译过程中给予我生活上的悉心照料,以使我能安心地把全部时间都投入到翻译工作中。

感谢我的一双苍老的手,特别是中风后半麻痹的右手(它已经不能握笔写字,但幸运地尚能敲击键盘),没有它们笨拙但勤奋的工作,这部稚嫩的译作绝无可能以世界语文字形式呈现在读者面前。

译者 王崇芳

2023年5月9日

# ANTAŬPAROLO AL LA ESPERANTA TRADUKO

La ĉina budhismo atingis la kulminon de sia prospero dum la dinastio Tang. La skolo de *djano* aŭ la ĉina zeno estas la plej disvastigita kaj plej influa skolo en budhismo. Ĝia efektiva fondinto estis Majstro Huineng (638—713). Li estis honore konsiderata kiel la Sesa Patriarko en Ĉinio. Liaj predikoj kaj vivhistorio estis registritaj de lia disĉiplo Fahai kaj poste formiĝis en la libron *Estrado-Sutro de Darmo-Trezoro de Huineng*. Ĝi estis la sola verko, kiu portas la nomon de "sutro" en la ĉina budhisma historio escepte de la predikoj de la Sinjoro Budho Ŝakjamunio.

Tiu ĉi *Estrado-Sutro de Huineng* estas senlime valorega kiel por la Zenisma Skolo kaj, ĝenerale, por budhismo, tiel ankaŭ por la ĉina kulturo kaj por la homoj, kiuj estas vivintaj kaj vivantaj. Kune kun la konfuceismaj Kvar Libroj (t. e. La Granda Lernado, La Doktrino de la Ĝusta Mezo, La Analektoj de Konfuceo kaj La Libro de Mengzi) kaj la taŭismaj klasikaĵoj Laŭzio kaj Zhuangzio, ĝi brile lumigas la ĉinan kulturan historion. Tiuj ĉi klasikaĵoj donis grandan revelacion al la perfektiĝo kaj libera ekzistado de la ĉina popolo.

En la historio la Estrado-Sutro de Huineng havis multajn versiojn. Interalie la kompare pli influaj estas:

La Dunhuang-a Versio, kiu estas el unu volumo, kopio de ĉ. 780 p.K. Ĝi estis malkovrita inter la kolektaĵoj de Dunhuang-aj kulturaj restaĵoj konservataj en la Brita Muzeo en Londono en 1920-aj jaroj. Post reviziiĝo ĝi estis kolektita en la budhismajn sanktajn skribojn Dazheng Zang aŭ, alinome, La Tripitako en versio de Taisho.

La Huixin-a Versio, duvoluma, kiu estis kompilita kaj reviziita de la zenisma majstro Huixin, kiu vivis en la malfrua periodo de la dinastio Tang kaj la frua periodo de Song. Ĝi estis publikigita libroforme en la kvina jaro de la regperiodo Qiande de la dinastio Song (967), kun la titolo *Sutro de la Sesa Patriarko*. Poste ĝi estis disvastigita al Japanio kaj represita de la templo Kosho, kaj sekve ĝi estis nomata ankaŭ “la versio de Kosho”.

La trivoluma Qisong-a Versio, kiu estis kompilita de la zenisma majstro Qisong de la dinastio Song. Ĝi estis publikigita en la tria jaro de la regperiodo Zhihe de tiu dinastio (1056). Sed la nun ekzistanta Qisong-versio estas nur en unu volumo, kiu estis represita en la dinastio Ming. Sekve ĝi estis nomata ankaŭ “La Ming-dinastia Versio”.

La Deyi-a Versio, kiu estas unuvoluma, sed laŭ-enhave dividita en dek partojn. Ĝi estis kompilita de la zenisma majstro Deyi de la dinastio Yuan kaj publikigita en la dudeksepa jaro de la regperiodo Zhiyuan (1290). En Japanio sin trovas ekzemplero de eldono presita en la

regperiodo Yanyou de la dinastio Yuan, sekve ĝi estas nomata ankaŭ “La Yanyou-versio”. Ĝi estis titolita *Sutro de la Darmo-Trezoro, elparolita de la Sesa Patriarko sur la Estrado*.

La Zongbao-a Versio, kiu estas unuvoluma, sed ankaŭ dividita en dek partojn. Ĝi estis kompilita de la zenisma majstro Zongbao de la dinastio Yuan kaj publikigita en la jaro Xin Mao de la dinastio Yuan (1291), sub la titolo *Sutro de la Darmo-Trezoro, elparolita de la Majstro la Sesa Patriarko sur la Estrado*.

Kvankam tiuj ĉi versioj pli aŭ malpli diferencas inter si en la teksto kaj longeco, tamen inter ili sin trovas apenaŭ rimarkinda diferenco en la enhavo. La bazaj pensoj de Huineng, kiuj estas reflektitaj en ili, estas komplete konsekvencaj kaj preskaŭ la samaj. La plej popularaj eldonoj estas la Deyi-versio kaj la Zongbao-versio. Mia traduko estas farita surbaze de la versio Deyi kun referenco al la versio Zongbao.

Wang Chongfang, la tradukinto
2017-04-10

# PRONONCA ŜLOSILO DE LA PROPRAJ NOMOJ EN TIU ĈI TRADUKO

La ĉinaj propraj nomoj latinigitaj laŭ la ĉina oficiala sistemo de transskribo povas esti prononcataj proksimume kiel la Esperantaj kun la jenaj esceptoj:

**Konsonantoj:**

ch = ĉ  h = ĥ  j = ĝj  q = ĉj  r = ĵ  sh= ŝ
w = ŭ  x = ŝj  y = j  zh = ĝ

La kombino de “ng” post vokaloj estas legata kiel tiu de “ng” en la angla lingvo aŭ kiel “ŋ” laŭ la Internaciaj Fonetikaj Simboloj.

**Kombinoj de vokaloj:**

ai = aj  ei = ej  ao = aŭ  ou = oŭ  ia = ja  ie = je  iao = jaŭ  iou = joŭ  uo = ŭo  uai = ŭaj  uei = ŭej  uan = ŭan  uang = ŭang  weng = ŭeng  yu = ju  ü = ju  u post j, q, x = ju

**Atentigo al la legantoj:**

Ĉiu el la budhismaj neologismoj, kiujn oni ne trovas en *Plena Ilustrita Vortaro*, estas kursive presita kaj klarigita ĉe sia unua apero en la teksto. La legantoj povas trovi ĝian klarigon ankaŭ en la Glosaro de Budhismaj Terminoj post la fino de la sutra teksto.

# ESTRADO-SUTRO DE DARMO-TREZORO
## de la Sesa Patriarko Huineng

**Esperantigita de Wang Chongfang**
**kun respektego**

# ENHAVO

ĈAPITRO 1. ORIGINO KAJ TRAVIVAĴOJ ····· 1

ĈAPITRO 2. *PRAĜNAO* ····· 31

ĈAPITRO 3. KLARIGO DE DUBOJ ····· 54

ĈAPITRO 4. *SAMADIO* KAJ *PRAĜNAO* ····· 68

ĈAPITRO 5. *DJANO* ····· 77

ĈAPITRO 6. PENTO ····· 81

ĈAPITRO 7. KELKAJ FAMAJ KONVERTIĜOJ ····· 101

ĈAPITRO 8. LA SUBITA SKOLO KAJ LA LAŬGRADA SKOLO ··· 148

ĈAPITRO 9. IMPERIESTRA FAVORO ····· 168

ĈAPITRO 10. LIAJ LASTAJ INSTRUOJ ····· 175

GLOSARO DE BUDHISMAJ TERMINOJ ····· 207

# ĈAPITRO 1
# ORIGINO KAJ TRAVIVAĴOJ

**§1-01**

Post kiam la Patriarko venis en la templon Baolin, la prefekto Wei de Shaozhou kaj aliaj tieaj registaraj oficistoj iris tien por inviti lin al la urbo fari publikan predikon pri budhismo en la halo de la templo Dafan.

Tiam en la halo jam kolektiĝis por aŭskulti lin pli ol mil personoj, inkluzive de la prefekto Wei, ĉirkaŭ tridek registaraj oficistoj, ĉirkaŭ tridek konfuceismaj kleruloj, kaj gebikŝuoj, taŭistaj pastroj kaj laikoj. Post kiam la Patriarko sidiĝis sur la alta seĝo, la tuta ĉeestantaro samtempe riverencis omaĝe al li kaj petis lin prediki pri la fundamentaj leĝoj de budhismo.

**§1-02**

La Patriarko komencis sian paroladon:

“Miaj amikoj en la boneco, nia Vera Naturo (litere: memnaturo), kiu estas la semo aŭ la kerno de bodio (la mensa stato de perfekta mondkompreno

sama kiel tiu de la Budho), estas nature pura kaj klara, kaj nur per uzo de ĝi ni povas rekte atingi la budhecon. Nu, permesu al mi mallonge rakonti al vi pri mia propra vivo, kaj kiel mi venis al la posedo de la instruo pri *djano* (sanskrite: *dhyāna*; kontemplado; meditado; zeno).

"Mia patro, indiĝeno de Fanyang, estis eksigita el sia ŝtatoficista posteno kaj ekzilita kiel ordinara popolano al Xinzhou en Lingnan (la nuna provinco Guangdong). Mi estis malfeliĉa en miaj fruaj jaroj. Kiam mi estis tre juna, mia patro mortis, postlasante mian patrinon en mizero. Ni transloĝiĝis al Nanhai, kie mi, en malfacilaj cirkonstancoj, estis devigita vendadi brullignon por vivteni la familion.

**§1-03**

"Iun tagon, unu el miaj klientoj ordonis, ke mi liveru kvanton da brulligno al la butiko, kiun la kliento tenis. Post kiam li ricevis la varon kaj pagis la monon, mi eliris el lia loko kaj trovis tie personon, kiu recitis sutron. Kiam mi aŭdis la tekston de la sutro, mia menso tuj lumiĝis. Mi demandis lin pri la nomo de la libro,

kiun li recitis, kaj li respondis, ke ĝi estas la *Sutro de Diamanto* (sanskrite: *Vajracchedikāprajñāpāramitā-sūtra*; sutro pri la plej alta saĝo ebliganta, ke oni atingu la alian bordon, nome la savon). Mi plu demandis, de kie li venis kaj kial li recitis la sutron. Li respondis, ke li venis de la templo Dongchan en Huangmei de Qizhou; ke la ĉefbonzo, kiu estras la templon, estis Hongren, la Kvina Patriarko; ke tie sin trovas pli ol mil disĉiploj sub li; kaj ke kiam li iris tien por fari omaĝon al la Patriarko, li ĉeestis liajn predikojn pri tiu ĉi sutro. Lia Ĉefbonza Moŝto kutime instigis la bonzojn kaj ankaŭ la laikojn recitadi tiun ĉi sutron, ĉar per tio oni povas vidi sian Veran Naturon kaj atingi rekte la budhecon.

**§1-04**

"Aŭdinte tion, mi eksentis, ke mia bona karmo en miaj antaŭaj vivoj jam antaŭdestinis al mi tiun ĉi renkontiĝon. Cetere, mi estis sufiĉe feliĉa, ke mi ricevis de iu persono dek taelojn da arĝento kiel la vivtenon de mia patrino. Tiu persono konsilis min tuj iri al Huangmei por vidi la Kvinan Patriarkon. Post la aranĝoj mi faris vojaĝon de preskaŭ tridek tagoj kaj alvenis al la templo.

“Post kiam mi faris omaĝon al la Patriarko, li demandis: ‘De kie vi venis? Kion do vi petas de mi?’

“Mi respondis: ‘Mi estas vulgarulo el Xinzhou de Lingnan. Mi faris longan vojaĝon por esprimi mian respekton al Via Ĉefbonza Moŝto kaj mi petas nenion krom budheco’.

“‘Vi estas indiĝeno de Lingnan. Kiel do vi, barbaro, povus esperi fariĝi budho?’ demandis la Patriarko.

“Mi respondis: ‘Kvankam sin trovas nordanoj kaj sudanoj, tamen en la budheco estas nenia distingo pri la nordo kaj la sudo. Mi barbaro povas esti iom diferenca korpe de Via Sankteco, sed en kio do ni estas diferencaj unu de la alia en la budhonaturo?’

**§1-05**

“Li volus plu paroli al mi, sed la ĉeesto de aliaj disĉiploj malhelpis lin. Li do ordonis min aliĝi al ilia laboro.

“Tiam mi diris: ‘Permesu al mi diri al Via Sankteco, ke la *praĝnao* (sanskrite: *prajñā*; saĝo, transcenda saĝo, perfekteco de saĝo) ofte leviĝas en

mia menso. Kiam oni ne erarvagas for de sia Vera Naturo, oni povas esti benita per “kampo de meritoj” (honora titolo donita al bonzoj, ĉar ili povas doni al aliaj la plej bonajn okazojn por semi la “semon” de meritoj). Kian laboron do Via Sankteco volas ordoni min fari?’

“‘Tiu ĉi barbaro ja havas tro viglan menson!’ li rimarkis. ‘Iru al la stalo kaj ne plu parolu.’ Mi do retiris min al la postkorto, kie mi estis sendita de iu laiko-frato fendi brullignon kaj senŝeligi rizon.

**§1-06**

“Pasis pli ol ok monatoj. Iun tagon la Patriarko venis vidi min kaj diris: ‘Mi pensas, ke viaj saĝo kaj akravideco povos veni al bona uzo; sed mi devas min deteni de parolo al vi timante, ke malbonuloj povos fari al vi malutilon. Ĉu vi komprenas?’ ‘Jes, mi komprenas,’ mi respondis. ‘Por eviti altiri alies atenton, mi ne kuraĝas proksimiĝi al la halo.’

“Iun tagon la Patriarko kolektis ĉiujn siajn disĉiplojn kaj diris al ili: ‘Tio, kio estas la plej grava

por la homo, estas la naskiĝo kaj la morto. Vi, miaj disĉiploj, pasigas viajn tagojn farante oferadon nur por havigi al vi “kampon de meritoj” (t. e. meritoj, kiuj kaŭzos bonan renaskiĝon), anstataŭ peni liberigi vin de tiu ĉi amara maro de vivo kaj morto. Kaj tamen, se via Vera Naturo estas tiel obskurigita, kiel do viaj meritoj povus vin savi? Vi do revenu ĉiu al via ĉelo kaj bone ekzamenu vin por serĉi vian *praĝnaon* en via menso kaj poste ĉiu skribu al mi unu *gataon* (sanskrite: *gātha*; signifanta “odon” aŭ “religian versaĵon”; budhisma ĉanto aŭ himno) pri tio. Al tiu, kiu vere komprenas la esencon de la Darmo, mi transdonos la Robon (la insigno de la Patriarkeco) kaj la Darmon (t. e. la instruo de la *Djana* Skolo), kaj per tio li fariĝos la Sesa Patriarko. Foriru rapide! Ne prokrastu la skribon de via *gatao*, ĉar longtempa pensado estas nenecesa kaj malutila. Tiu, kiu jam konas sian Veran Naturon, povos elparoli ĝin tuj kiam li ekaŭdas tiun ĉi sugeston. Li ne povos perdi la vidon de ĝi, eĉ kiam li estus kun sia svingata glavo en la batalkampo.

**§1-07**

“Ricevinte tiun ĉi instrukcion, la disĉiploj retiriĝis kaj diris unu al la alia: ‘Estas senutile por ni koncentri nian menson por skribi la *gataon* kaj prezenti ĝin al Lia Sankteco, ĉar la Patriarkeco certe estos gajnita de Shenxiu, nia instruanto. Se ni senzorge verkos *gataon* nur por plenumi devon, tio estos pura malŝparo de nia energio’. Aŭdinte tiujn ĉi vortojn, ili ĉiuj rezignis la skribon kaj diris: ‘De nun ni simple sekvu nian instruanton Shenxiu, kien ajn li iros, kaj rigardu lin kiel nian gvidanton. Kial do ni devos krei al ni ĝenaĵojn skribante *gataon*? ’

“Dume Shenxiu pensis en si: ‘Konsiderante min kiel sian instruanton, ili ne partoprenos en la konkurso, kaj tial mi nepre devos skribi *gataon* kaj prezenti ĝin al Lia Sankteco. Se mi ne tion faros, kiel do la Patriarko povos scii la profundecon aŭ supraĵecon de mia komprenado? Se mia celo estas akiri la Darmon, mia motivo estas pura. Se mi celus akiri la patriarkecon, tio certe estus malbona. Tiuokaze mia menso estus tiu de la monda vulgarulo kaj mia ago egalus la rabon de la patriarkeco. Sed se

mi ne prezentos *gataon*, mi neniam havos la okazon akiri al mi la Darmon. Tio certe estos por mi granda dilemo!'

"Antaŭ la predikejo de la Patriarko sin trovis tri koridoroj, kies muroj estis destinitaj por esti pentritaj de la kortega pentristo nomata Lu Zhen pri la scenoj el la sutro *Lankavatara* (sanskrite: *Laṅkāvatārasūtra*) kaj ankaŭ pri la scenoj montrantaj la genealogion de la kvin Patriarkoj, por la universala diskonigo kaj la kultado fare de la publiko kaj de la estontaj generacioj.

**§1-08**

"Post kiam Shenxiu finis sian *gataon*, li plurfoje provis prezenti ĝin al la Patriarko, sed ĉiufoje kiam li proksimiĝis al la halo, lia menso tiel maltrankviliĝis, ke li tuj estis tutkorpe kovrita de forta ŝvito. Li ne povis streĉi la kuraĝon ĝin prezenti, kvankam dum kvar tagoj li faris entute dek tri provojn.

"Kaj li pensis en si: 'Estus preferinde por mi skribi ĝin sur la muron de la koridoro kaj lasi al la Patriarko mem ĝin vidi. Se li aprobos ĝin, mi eliros kaj lin salutos, kaj diros al li, ke ĝi estas skribita de

mi. Se li ĝin malaprobos, tiam mi ekscios, ke mi ja malŝparis tiom da jaroj en tiu ĉi surmonta templo ricevante de aliaj la respekton, kiun mi tute ne meritis! Tiuokaze, kian utilon do havos mia daŭrigo de la budhisma praktikado ĉi tie?'

"Kaj ĉe la mezo de tiu nokto li kaŝe iris kun lampo al la suda koridoro kaj skribis la *gataon* sur la muron, por montri al la Patriarko, kion perceptas lia menso.

**§1-09**

"La *gatao* tekstis jene:

Mia korpo estas bodiarbo,

Mia menso similas klaran spegulon.

Diligente mi tenas ĝin pura,

Kaj lasas neniun polveron fali sur ĝin.

"Skribinte la *gataon*, li tuj revenis en sian ĉelon, tial neniu sciis, kiu ĝin skribis. En sia ĉelo li ree meditis: 'Kiam la Patriarko morgaŭ vidos mian *gataon* kaj ĝi plaĉos al li, tio pruvos, ke mi havas bonan ligitecon kun la Darmo; sed se li diros, ke ĝi estas malbona, tio signifos, ke mi ne taŭgas por la Darmo pro mia peza

karmo en la antaŭaj vivoj, kiu dense nebuligas mian menson. Estas tre malfacile antaŭscii, kion la Patriarko diros pri ĝi!' En tia animstato li daŭre pensadis ĝis la tagiĝo, ne povante endormiĝi, nek trankvile sidi.

"Sed la Patriarko jam sciis, ke Shenxiu ankoraŭ ne transpaŝis la sojlon, tiel ke li ne vere konas la Veran Naturon.

**§1-10**

"En la mateno li sendis venigi la kortegan pentriston Lu por fari la murpentradon kaj iris kun li al la suda koridoro. Hazarde li ekvidis la *gataon*. 'Mi bedaŭras, ke mi ĝenis vin per tiel longa vojaĝo veni ĉi tien,' li diris al la pentristo. 'La murpentrado nun ne bezonas esti farata, ĉar estas dirite en la sutro: "Ĉiuj formoj aŭ fenomenoj estas efemeraj kaj iluziaj." Estos preferinde lasi la *gataon* resti ĉi tie, por ke homoj povu ĝin lerni kaj reciti. Se oni metos ĝian instruon en la efektivan praktikon, oni estos savita disde la falo en la malbonajn regnojn de ekzistado (t.e. la infero, la regnoj de malsataj fantomoj kaj de bestoj). Tiu, kiu praktikos ĝin, akiros al si grandajn meritojn.'

“Li do ordonis, ke oni bruligu incensvergetojn antaŭ la *gatao*, kaj ke ĉiuj liaj disĉiploj faru omaĝon al ĝi kaj recitu ĝin, por ke ili povu ekkoni sian Veran Naturon. Recitinte ĝin, ili ĉiuj ĝojkriis, ĝin laŭdante.

**§1-11**

“En la profunda nokto la Patriarko sendis venigi Shenxiu al la halo, kaj demandis, ĉu la *gatao* estas skribita de li aŭ ne.

“‘Estis mi, Majstro,’ respondis Shenxiu. ‘Mi ne arogas al mi akiri la patriarkecon, sed mi esperas, ke Via Sankteco estos tiel afabla kaj diros al mi, ĉu mia *gatao* havas iom da saĝo en tiu ĉi.’

“‘Via *gatao* montras,’ respondis la Patriarko, ‘ke vi ankoraŭ ne konas vian Veran Naturon. Vi alvenis nur al la sojlo, sed vi ankoraŭ ne transpaŝis ĝin. Se vi penas atingi la plejsuperan bodian saĝon per tia kompreno, vi neniel povos sukcesi.

“‘Por atingi la plejsuperan bodian saĝon, oni devas esti kapabla spontanee koni sian propran menson kaj vidi sian Veran Naturon, kiu povas nek estiĝi, nek neniiĝi. Kiam en ĉiuj tempoj (la pasinteco, la nuno, kaj

la estonteco), kaj de tempo al tempo, oni estas kapabla vidi sian propran Veran Naturon, tiam al oni ĉiuj darmoj (ekzistaĵoj) estos liberaj de ĉia malhelpo. Kiam tio ĉi estos konata, oni estos libera de iluzio por ĉiam; kaj oni restos en la stato de *tatatao* (sanskrite: *tathatā*; la vera efektiveco, tieleco en ĉiuj cirkonstancoj). Tia konstanta mensostato estas absolute vera. Se vi povos vidi aferojn en tia maniero, vi certe jam atingos la plejsuperan bodian saĝon.

“‘Vi do reiru al via ĉelo kaj pripensu unu aŭ du tagojn, kaj poste prezentu al mi alian *gataon*. Se via *gatao* montros, ke vi jam transpaŝis la sojlon, mi transdonos al vi la Robon kaj la Darmon.’

“Shenxiu adiaŭis la Patriarkon kun saluto kaj foriris.

**§1-12**

“Dum pluraj tagoj li vane penis skribi alian *gataon*. Tio tiel forte premis lian menson, ke li estis kvazaŭ en inkubsonĝo. Li ne povis trovi komforton en sido aŭ promeno.

“Du tagojn poste iu juna knabo preterpasis la ĉambron, en kiu mi laboris senŝeligante rizon. Li laŭte recitis la *gataon* verkitan de Shenxiu. Aŭdinte ĝin mi tuj eksciis, ke ĝia komponinto ankoraŭ ne vere vidas sian Veran Naturon. Kvankam mi estis neinstruita, tamen mi jam kaptis ĝian ĝeneralan ideon.

“‘Kian *gataon* vi recitas?’ mi demandis la knabon.

“‘Vi barbaro!’ li respondis. ‘Ĉu vi ne scias pri la promeso de la Patriarko? La Patriarko diris al siaj disĉiploj, ke la afero pri vivo kaj morto estas gravega por la homo, kaj ke ĉar li estas preta transdoni sian robon kaj la Darmon, tial tiuj, kiuj deziras ilin heredi, devas ĉiu skribi *gataon*, kaj tiu, kies *gatao* montros, ke li vere komprenas la esencon de la Darmo, ricevos ilin kaj fariĝos la Sesa Patriarko. La estiminda Shenxiu skribis tiun ĉi “senforman” *gataon* sur la muron de la suda koridoro, kaj la Patriarko diris al ni, ke ni ĝin recitu. Li diris ankaŭ, ke tiuj, kiuj metos ĝian instruon en la efektivan praktikon, estos savita disde la falo en la malbonajn regnojn de ekzistado kaj akiros al si grandajn bonojn.’

**§1-13**

“Mi diris al la knabo, ke ankaŭ mi deziras reciti la *gataon*, por ke mi povu esti ligita kun la budheco en mia estonta vivo. Mi diris al li ankaŭ, ke kvankam mi senŝeligas rizon ĉi tie jam ok monatojn, mi tamen neniam iris al la halo, kaj tial mi deziras, ke li konduku min tien kaj montru al mi kie la *gatao* estas, por ke mi povu doni honoron al ĝi.

“La knabo kondukis min tien, kaj mi petis lin voĉlegi ĝin al mi, ĉar mi estas nelegoscia.

“Iu regna oficisto nomata Zhang Riyong, helpanto de la prefekto de Jiangzhou, tiam hazarde estis tie, kaj li komplezis al mi laŭtlegante ĝin al mi. Kiam li finis la legon, mi diris al li, ke ankaŭ mi komponis unu *gataon*, kaj petis, ke li skribu ĝin por mi sur la muron.

“‘Vere eksterordinare,’ li ekkriis, ‘ke ankaŭ vi povas komponi *gataon*!’

**§1-14**

“Mi replikis: ‘Ne malestimu la komencanton, se vi estas la serĉanto de la plejsupera bodia saĝo. Vi devas

scii, ke la plej malalta klaso povas havi la plej akran sagacon, dum la plej alta povas esti sen inteligenteco. Se oni malrespektas ilin, oni faras tre grandan pekon.'

"'Diktu do vian *gataon*,' li diris. 'Mi skribos ĝin por vi. Sed ne forgesu min savi el tiu ĉi mondo, se vi sukcesos en atingo de la Darmo.'

"Mia *gatao* tekstas jene:

Propre sin trovas neniu bodiarbo,
La klara spegulo havas nenian soklon;
Ĉar ĉio estas malplena ekde la komenco,
De kie do povus veni la polvo?

**§1-15**

"Kiam li finskribis ĝin, ĉiuj ĉeestantaj disĉiploj kaj aliaj estis forte surprizitaj. Plenaj de admiro, ili diris unu al la aliaj: 'Kiel mirinde! Sendube ni ne devas juĝi homojn nur laŭ la ekstero. Kaj ni, dum tiel longa tempo, laborigis tiun ĉi enkarniĝintan bodisatvon por ni!'

"Vidante, ke la homamaso estas tiel forte mirigita, la Patriarko forviŝis la *gataon* per sia ŝuo pro timo, ke iuj enviemaj povus fari malutilon al mi. Li do esprimis

la opinion, ke ankaŭ la aŭtoro de tiu ĉi *gatao* ne vidas la Veran Naturon, kaj ĉiuj tion kredis.

"En la sekva tago la Patriarko kaŝe venis al la ĉambro, kie la rizo estis senŝeligata. Vidante, ke mi, kun peza ŝtono ligita ĉe la talio, pene laboras tie senŝeligante milion per pistilo, li diris al mi: 'La serĉanto de la Vojo ne hezitas torturi sian korpon pro la Darmo. Tiel agi li ja devas!' Poste li demandis: 'Ĉu la rizo jam estas bone pistita?'

"'Jam de longe pistite,' mi respondis. 'Nur atendi la kribradon.'

"Ĉe tio li frapis la pistilon trifoje per sia bastono kaj foriris.

**§1-16**

"Mi ekkomprenis la signifon de lia mesaĝo, kaj en la tria duhora periodo de la nokto (la nokto estis dividita en kvin periodojn laŭ la ĉina malnova tradicio kaj ĉiu periodo daŭris ĉ. du horojn) mi iris al lia ĉambro. Uzante la robon kiel kurtenon por ke neniu povu nin vidi, li eksplikis al mi la *Sutron de*

*Diamanto*. Kiam li venis al la frazo ‘la menso devas esti tie, kie estas nenia alkroĉiĝo’, subite mia menso plene eklumiĝis, kaj mi ekkomprenis, ke ĉio en la universo neniel povas esti apartigita disde nia Vera Naturo.

“‘Kiu povus atendi,’ mi diris al la Patriarko, ‘ke la Vera Naturo propre estas pura! Kiu povus atendi, ke la Vera Naturo propre estas libera de estiĝo kaj neniiĝo! Kiu povus atendi, ke la Vera Naturo propre estas kompleta en si mem! Kiu povus atendi, ke la Vera Naturo propre estas nemovebla! Kiu do povus atendi, ke la Vera Naturo estas la origino de ĉiuj ekzistaĵoj!’

**§1-17**

“Sciante, ke mi jam ekkonis la Veran Naturon, la Patriarko diris al mi: ‘Por tiu, kiu ne konas sian propran menson, la lernado de la budhismo estas senutila. Aliflanke, se li konas sian propran menson kaj intuicie vidas sian propran naturon, li povas esti nomata granda persono, instruanto de dioj kaj homoj, kaj eĉ budho.’

“Kaj tiel, sen scio de ĉiuj aliaj, la Darmo estis transdonita al mi en la noktomezo, kaj sekve mi fariĝis la heredinto kiel de la instruo de la Subita Skolo, tiel ankaŭ de la robo kaj la bovlo.

“‘De nun vi estas la Sesa Patriarko,’ li diris. ‘Bone zorgu pri vi mem kaj faru vian plejeblon por savi kiel eble plej multajn sentohavajn estaĵojn. Disvastigu kaj gardu la instruon kaj neniel lasu ĝin veni al sia fino. Aŭskultu do mian *gataon*:

Sentohavaj estaĵoj, kiuj semis la semojn de iluminiĝo

En la kampo de kaŭzo, rikoltos la fruktojn de budheco.

Sensentaj objektoj, kiuj malhavas budho-naturon,

Ne semas, nek rikoltas fruktojn.’

**§1-18**

“Poste li aldonis: ‘Kiam la patriarko Bodidarmo alvenis en Ĉinion, en la komenco oni ĝenerale dubis pri la aŭtentikeco de la instruo, kaj tial li uzis tiun ĉi robon kiel ateston, kiu devis esti transdonata de unu patriarko al la sekvanta. Koncerne la Darmon, ĝi

estas transdonata de menso al menso, kaj estas komprenata kaj interpretata de la individua ricevanto. Ekde la tempo de la antikva budho jam formiĝis tia kutimo: la substanco de la Darmo estis transdonata de unu budho al la heredanto, kaj la esotera instruo estis transdonata de unu Patriarko al alia per la menso. Ĉar la robo povas esti kaŭzo de disputo, tial vi estas ĝia lasta heredanto. Se vi transdonos ĝin al via heredonto, via vivo estos en danĝero. Nun do forlasu tiun ĉi lokon kiel eble plej rapide, ĉar iu povus fari al vi malutilon.'

**§1-19**

"'Kien do mi iros?' mi demandis.

"'Vi devos halti ĉe Huai (nome ĉe iu loko, kies nomo enhavas la ĉinan ideografiaĵon 怀) kaj kaŝiĝi ĉe Hui (ĉe iu loko, kies nomo enhavas la ĉinan ideografiaĵon 会),' li respondis.

"Ricevinte la robon kaj la bovlon en la noktomezo, mi diris al la Patriarko, ke mi, sudano, ne konas la ĉi-tieajn montajn vojetojn, kaj ke estas malfacile por mi atingi la riveron por preni ŝipon.

“‘Vi ne bezonas maltrankviliĝi,’ li diris. ‘Mi akompanos vin ĝis tie.’

“Li do akompanis min ĝis Jiujiang-poŝtostacio kaj tie ordonis min enboatiĝi. Kiam li persone ekremis por mi, mi petis lin sidiĝi kaj lasi al mi fari la remadon. ‘Estas dece, ke mi remu por vi,’ li diris. (Aludo pri la maro de naskiĝo kaj morto, kiun oni devas transpasi antaŭ ol la bordo de Nirvano povos esti atingita.)

“Al tio mi respondis: ‘Kiam oni estas sub iluzio, oni devas esti gvidata de sia instruanto por la transpaso; sed eklumiĝinte, oni devas sin mem transpasigi. Kvankam la vorto “transpasi” estas la sama, tamen ĝia uzo malsamas en ĉiu okazo. Ĉar mi naskiĝis en apud-landlima regiono, mia prononcado ne estas tute ĝusta, sed, malgraŭ tio, dank’ al via favoro mi heredis la Darmon. Nun mi jam eklumiĝis, kaj kompreneble estas dece, ke nur mi mem transpasu la maron de naskiĝo kaj morto per la kono de mia propra Vera Naturo.’

**§1-20**

“‘Tre prave, tre prave!’ li konsentis. ‘De nun dank’ al vi la Budhismo (t.e. la *Djana* Skolo) fariĝos

tre populara. Tri jarojn post via disiĝo for de mi, mi forlasos tiun ĉi mondon. Adiaŭ, nun vi jam povos komenci vian vojaĝon. Iru kiel eble plej rapide al la sudo. Ne tro baldaŭ faru la predikon, ĉar la Darmo ne estas tiel facile disvastigita.'

"Dirinte adiaŭ, mi forlasis lin kaj iris rekte al la sudo. Post ĉirkaŭ du monatoj mi atingis la monton Dayu.

"Reveninte al sia templo, la Patriarko ne aperis en la predika halo dum pluraj tagoj. Scivolaj, la disĉiploj iris demandi pri lia farto: 'Nia Patriarko ja malofte malsanas kaj malofte ĉagreniĝas — ĉu vi estas malsana?' La Kvina Patriarko respondis: 'Mi ne malsanas, sed la robo kaj la bovlo jam estas portataj suden.' Ili ree demandis: 'Kiu heredis ilin?' Li respondis: 'La persono kapabla.' (La originala '能者' [*nengzhe*] signifas 'la kapablulon' aŭ 'tiun, kiu ĝin meritas', kaj samtempe aludas Huineng.)

"Ili ĉiuj ekkomprenis, ke estas mi, kiu ilin heredis. Poste centoj da homoj komencis min postkuradi kun la intenco rabi la robon kaj la bovlon for de mi.

## §1-21

“Inter ili sin trovis bonzo nomata Huiming, kies laika familinomo estis Chen. Li iam estis generalo de la kvara rango en sia laika vivo. Liaj manieroj estis krudaj kaj lia temperamento brutala. El la postkurantoj li plej forte deziris min kapti kaj kuris plej rapide. Kiam li min preskaŭ atingis, mi ĵetis la robon kaj la bovlon sur rokon kaj diris: ‘Tiu ĉi robo estas nenio alia, ol simbolo. Kia estos la utilo, se oni ĝin perforte prenos for de mi?’ Poste mi kaŝis min en herboj.

“Kiam li atingis la rokon, li provis levi ilin, sed ili rifuzis moviĝi. Li do kriis: ‘Laiko-frato, laiko-frato (Huineng tiam ankoraŭ ne estis bonzo), mi venas por la Darmo, ne por la robo.’

“Tiam mi eliris el mia kaŝejo kaj sidiĝis sur la roko kun la kruroj krucitaj antaŭ mi. Li riverence salutis min kaj diris: ‘Laiko-frato, bonvole prediku al mi.’

## §1-22

“‘Ĉar vi venas por la Darmo,’ mi diris, ‘vin do detenu de ĉiaj pensoj kaj tenu vian menson malplena, kaj tiam mi predikos al vi.’

“Li silente sin preparis por tio dum sufiĉe longa tempo, antaŭ ol mi rekomencis diri: ‘Kiam vi nun pensas nek pri bono, nek pri malbono, via estimata moŝto, kia do estas via vera vizaĝo (la Vera Naturo) ĝuste en tiu ĉi momento?’

“Aŭdinte tion, li tuj eklumiĝis kaj plu demandis: ‘Krom tiuj esoteraj vortoj kaj esoteraj ideoj, kiujn vi ĵus diris, ĉu estas ankoraŭ aliaj instruoj esoteraj?’

“‘Tio, kion mi diras al vi, ne estas esotera,” mi respondis. “Sed se vi turnos vian lumon internen, vi trovos tion, kio estas esotera ĝuste en vi mem.’

**§1-23**

“‘Malgraŭ mia restado en Huangmei kun la Patriarko,’ li diris, ‘mi ne vere konis mian veran vizaĝon (la Veran Naturon). Dank’ al via gvido mi nun sentas min kiel akvotrinkanto, kiu mem konas la varmecon aŭ malvarmecon de la akvo. Laiko-frato, de nun vi estas mia instruanto.’

“Mi diris: ‘Se estas tiel, ni do estu kundisĉiploj de la Kvina Patriarko. Bone zorgu pri vi mem, kaj adiaŭ!’

“Huiming ree demandis: ‘Kien do mi devos iri?’ Mi diris al li: ‘Haltu ĉe Yuan (ĉe iu loko, kies nomo enhavas la ĉinan ideografiaĵon 袁) kaj ekloĝu ĉe Meng (ĉe iu loko, kies nomo enhavas la ĉinan ideografiaĵon 蒙).’ Li adiaŭis min kun saluto kaj foriris.

“Huiming malsupreniris de la monto kaj diris al la postkurantoj: ‘Mi supreniris sur la monton kaj ne sukcesis trovi lin. Ni devos preni alian vojon por serĉo. Ĉiuj postkurantoj konsentis. Poste Huiming ŝanĝis sian nomon en Daoming por eviti la ripeton de ‘Hui’ en la nomo de Huineng. (En la feŭda Ĉinio, por montri respekton, oni evitis ripeti en sia propra nomo la nomon, aŭ ĝian parton, de monarko, altranga ŝtatoficisto, aŭ pli aĝa membro de influa familio, ktp.)

**§1-24**

“Poste mi atingis Caoxi. Malbonuloj ree postkuris min kaj mi estis devigita trovi rifuĝon en Sihui, kie mi restis kun grupo da ĉasistoj dum dek kvin jaroj. De tempo al tempo mi predikis al ili en maniero, kiu konvenis al ilia kompreno. Ili ofte igis

min kaŝobservi iliajn retojn, sed kiam ajn mi trovis vivajn estaĵojn en la retoj, mi ilin liberigis. En manĝotempoj, mi metis legomojn en la kuirpoton, en kiu ili kuiris sian viandon. Iuj el ili demandis min pri la kialo, kaj mi klarigis al ili, ke mi kutime manĝas nur la legomojn kuiritajn kun la viando.

“Iun tagon mi pensis en mi, ke mi ne devas plu pasigi mian vivon en tia kaŝiteco, kaj ke jam estas la tempo por mi disvastigi la Darmon. Mi do forlasis tiun lokon kaj iris al la templo Faxing en Guangzhou.

**§1-25**

“Tiutempe iu bikŝuo nomata Yinzong, majstro pri la Darmo, estis predikanta tie pri la sutro *Maha Parinirvana* (sanskrite: *Mahāparnirvāṇa*; mahajana sutro, eldirita de Ŝakjamunio ĝuste antaŭ lia morto). Sin trovis du bikŝuoj, kiuj diskutis pri la longa flago flirtanta super la templo en la vento. Unu diris, ke estas la vento, kiu moviĝas, dum la alia asertis, ke moviĝas la flago. Ili argumentis kaj argumentadis, sed neniu povis sukcese konvinki la alian. Mi do iris al ili kaj diris: ‘Estas nek la vento, nek la flago, kiu

moviĝas; kio efektive moviĝas, estas via propra menso.' La tuta ĉeestantaro estis forte mirkonsternita de mia diro, kaj la bikŝuo Yinzong invitis min preni la honoran sidlokon kaj demandis min pri iuj esoteraj signifoj de la doktrino.

**§1-26**

"Vidante, ke miaj respondoj estas precizaj kaj adekvataj, kaj ne limigitaj je la laŭvorta lego de la sanktaj tekstoj, li diris al mi: 'Laiko-frato, vi devas esti eksterordinara homo. Jam antaŭ longe mi aŭdis, ke la heredinto de la robo kaj la Darmo de la Kvina Patriarko jam venis al la sudo. Tre kredeble vi estas ĝuste la homo.'

"Al tio mi ĝentile jesis, dirante, ke mi ilin apenaŭ meritas. Li tuj afable salutis min kaj petis, ke mi montru al la ĉeestantaro la robon kaj la bovlon, kiujn mi heredis.

"Li plu demandis: 'Kion la Kvina Patriarko instruis al vi, kiam li transdonis al vi la Darmon?' 'Krom diskuto pri la vido de la Vera Naturo,' mi respondis, 'li donis al mi neniun alian instruon, nek

pri *djano*, nek pri *mokŝao* (sanskrite: *mokṣa*; kun la signifo “liberiĝo”, la stato de la liberiĝo el la suferoj de la renaskiĝoj; liberiĝo; nirvano).’

“‘Kial ne pri ili?’ li demandis. ‘Ĉar ili estas du metodoj,’ mi respondis, “kaj en la budhismo ne povas sin trovi dueco. La budhismo estas nedueca.’

**§1-27**

“Li demandis: ‘Kion do signifas la nedueco de la budha Darmo?’ Mi respondis: ‘La sutro *Maha Parinirvana*, kiun Via Moŝto eksplikas, klarigas, ke la budho-naturo ne havas duecon. Kiel ekzemple, en la sutro, la reĝo Gaoguide, bodisatvo, demandis la Budhon, ĉu tiuj, kiuj faras la kvar agojn de granda miskonduto (mortigon, ŝtelon, malĉaston kaj mensogon) aŭ pekas per la kvin mortindaj pekoj (patromortigo, patrinomortigo, arahantomortigo, vundo al budho, kaj detruo de la harmonio de la samgo), kaj la *iĉantikaoj* (sanskrite: *icchantika*; nekredanto de budhismo; homo plena de deziroj; malamiko de la bono; herezulo), nome tiuj, kiuj ne kredas je budhismo kaj estas malamikaj al la bono — ĉu ili jam elradikigis sian “elementon de

boneco” kaj sian budho-naturon aŭ ne. Al tio la Budho respondis: ‘Sin trovas du specoj de “elemento de boneco”. Unu estas la konstanta kaj la alia nekonstanta. Ĉar la budho-naturo estas nek konstanta, nek nekonstanta, tial ilia “elemento de boneco” ne estas elradikigita; jen kial la budhismo estas konata kiel ne havanta duecon. Unu estas bona kaj la alia nebona, sed ĉar la budho-naturo estas nek bona, nek nebona, tial la budhismo estas konata kiel nedueca. El la vidpunkto de ordinaruloj, la *skandaoj* (sanskrite: *skandha*; la ĉefa eco de ĉiu sentohava estaĵo; la ĉefa kapableco konsistiganta sentohavan estaĵon; la kvin *skandaoj* estas formo, percepto, konscio, ago, kaj scio) kaj *datuoj* (sanskrite: *dhātu*; regiono aŭ regno de senso; la faktoro de la konscio) estas du apartaj aferoj; sed la eklumiĝintaj homoj komprenas, ke ili ne estas duecaj en la naturo. Jen kial tiu ĉi nedueco estas la budho-naturo.’

**§1-28**

“Mia respondo tre plaĉis al la bikŝuo Yinzong. Kunmetinte siajn manplatojn sur la brusto kiel signo de respekto, li diris: ‘Mia interpreto de la sutro estas tiel

senvalora, kiel rubo, dum viaj paroloj estas valoraj, kiel pura oro.' Li do direktis la ceremonion de harar-razo (t.e. la ceremonio de bonzigo aŭ bonzinigo), en kiu li faris min bonzo, kaj petis, ke mi akceptu lin kiel mian lernanton.

"Ekde tiam, sub la bodiarbo, mi disvastigis la instruon de la Dongshan-a Skolo (la Skolo estis nomata laŭ la loko, kie la Kvara kaj la Kvina Patriarkoj vivis kaj predikis).

**§1-29**

"Ekde la tempo, kiam la Darmo estis transdonita al mi sur Dongshan, mi sate spertis ĉiajn malfacilojn kaj ĉiajn suferojn, kaj mia vivo ofte ŝajnis pendi nur sur unu fadeno. Hodiaŭ mi havas la honoron renkontiĝi en tiu ĉi kunveno kiel kun Via Ekscelenco kaj viaj eminentaj akompanantoj, tiel ankaŭ kun tiom multe da bikŝuoj, bikŝuinoj, taŭistoj kaj laikaj amikoj, kaj mi devas atribui tion ĉi al nia bona kunligo estiĝinta en la antaŭaj *kalpaoj* (sanskrite: *kalpa*; kun la signifo 'eono', la periodo inter la estiĝo kaj reestiĝo de mondo; cikla longega periodo da tempodaŭro), kaj ankaŭ al niaj komune akumulitaj

meritoj en la oferoj faritaj en niaj antaŭaj enkarniĝoj; alie mi ne havus la okazon dividi kun vi la rakonton pri mia heredo de la instruo de la Subita Skolo.

“Tiu ĉi instruo estis transdonita de la pasintaj Patriarkoj; ĝi ne estas tio, kio venas el mia propra saĝo. Tiuj, kiuj deziras aŭdi la instruon, devas antaŭ ĉio purigi sian propran menson, kaj, aŭdinte ĝin, devas forigi ĉiu siajn proprajn dubojn en la sama maniero, kiel la saĝuloj faris en la pasinteco.”

Ĉe la fino de la parolado, ĉiuj aŭskultantoj ekĝojis, respekte salutis kiel la budhanoj (t. e. saluti per kunmeto de la manplatoj sur la brusto kun ioma klino de la kapo) kaj foriris.

# ĈAPITRO 2
# *PRAĜNAO*

## §2-01

En la sekva tago la prefekto Wei petis la Patriarkon doni alian paroladon pri la Darmo. Preninte sian sidlokon, la Patriarko petis la aŭskultantaron purigi sian menson kaj reciti '*Mahaprajnaparamita*' (sanskrite: *mahāprajñapāramitā*. Vidu la ĉi-suban tekston por la signifo de tiu ĉi sanskrita vorto). Poste li donis la jenan paroladon:

"Miaj amikoj en la boneco, la saĝo de la bodio kaj *praĝnao* estas esence propra al ĉiu el ni. Ĝuste pro la iluzio, sub kiu nia menso funkcias, ni ne sukcesas per ni mem ĝin koni, kaj tial ni devas serĉi la konsilojn kaj la gvidadon de eklumiĝintoj antaŭ ol ni povas ekkoni nian propran Veran Naturon. Vi devas scii, ke koncerne la budho-naturon, sin trovas nenia diferenco inter eklumiĝintoj kaj la malkleruloj. Kio faras la diferencon, estas tio, ke unu konas ĝin, dum la alia ne. Nun, lasu al mi paroli al vi pri *Mahaprajnaparamita*, por ke ĉiu el vi povu akiri sian saĝecon. Atente aŭskultu, ĉar mi nun parolas al vi.

## §2-02

“Miaj amikoj en la boneco, tiuj, kiuj recitas la vorton ‘*praĝnao*’ la tutajn tagojn, ŝajne ne scias, ke la *praĝnao* estas esence propra al ilia naturo mem. Tio estas ĝuste kiel la okazo de tiuj, kiuj nur paroladas pri nutraĵo, neniel povas kvietigi sian malsaton, ĉar gurdadi la vorton *ŝunjao* (sanskrite: *śūnya*; malpleneco, nematerieco, vanteco) dum eĉ miriadoj da *kalpaoj* neniel helpos al ni ekkoni nian naturon, kaj servas al neniu celo.

“Miaj amikoj en la boneco, ‘*Mahaprajnaparamita*’ estas vorto sanskrita, kiu signifas ‘la grandan saĝon por atingi la alian bordon’ (t.e. atingi la budho-veron). Tio, kion ni devas fari, estas praktiki ĝin en nia menso anstataŭ teni ĝin nur sur la lipoj, kaj tute ne gravas, ĉu ni ĝin recitas aŭ ne. Nur recitado sen mensa praktiko estas egala al fantomo, iluzio, rosguto aŭ ekbrilo de fulmo. Aliflanke, se ni praktikas ĝin en la menso kaj ankaŭ tenas ĝin sur la lipoj, tiam ni trovos, ke nia menso estas en akordo kun kio estas de ni buŝe ripetata. Ĉar nia naturo mem estas budho, kaj aparte de tiu ĉi naturo ekzistas neniu alia budho.

**§2-03**

“Kio do estas ‘Maha’? Ĝi signifas ‘granda’. La mezuro de la menso estas vasta kaj granda, kiel la malpleneco de la spaco, senfina kaj senlima, nek ronda nek kvadrata, nek granda nek malgranda, nek verda nek flava, nek ruĝa nek blanka, nek supra nek suba, nek longa nek mallonga, nek kolera nek ĝoja, nek prava nek malprava, nek bona nek malbona, nek unua nek lasta. Ĉiuj *kŝetraoj* (sanskrite: *kṣetra*; tero, kampo) de la budhoj estas malplenaj kiel la spacego. Nia transcenda naturo propre estas malplena, kaj neniu unuopa darmo povas esti atingita. Kaj tia estas ankaŭ nia Vera Naturo, kiu estas vera ‘Absoluta Malpleno’.

“Miaj amikoj en la boneco, kiam vi aŭdas min paroli pri malpleneco, ne tuj alkroĉiĝu al ĝi. La afero plej grava estas eviti la alkroĉiĝon al la malpleneco. Se vi sidas kviete kun malplena menso, tiam vi restas en la stato de ‘malpleno de indiferenteco’.

**§2-04**

“Miaj amikoj en la boneco, la senlima spaco de la universo estas kapabla enteni miriadojn da ekzistaĵoj de

diversaj formoj, kiel ekz. la suno, la luno, la steloj, la tero, la montoj, la riveroj, la fontoj, la arbaroj, la veprejoj, la bonaj kaj malbonaj homoj, la bonaj kaj malbonaj darmoj, la ĉieloj, la inferoj, la grandaj oceanoj, kaj la montoj de *Sumeru* (sanskrite: *sumeru*; la plej alta monto staranta en la centro de la mondo en budhisma kosmologio) — ili ĉiuj estas ampleksitaj en la malpleno, kaj tia estas ankaŭ la malpleneco de nia naturo.

"Miaj amikoj en la boneco, nia Vera Naturo ampleksas ĉiujn ekzistaĵojn, kaj tio signifas 'granda'; sekve ĉiuj ekzistaĵoj estas interne de nia naturo. Se ni vidas bonecon aŭ malbonecon de aliaj homoj sen havi inklinon aŭ malinklinon al ĝi, sen implikiĝi en ĝi, tiam nia menso estas malplena kiel la spacego. Tiuokaze ni povas diri, ke nia menso estas granda. Jen kial ni nomas ĝin '*Maha*'.

**§2-05**

"Miaj amikoj en la boneco, la iluziitoj kutime parolas sen praktiko, dum la saĝaj homoj ĉiam faras efektivan praktikon per sia menso. Sin trovas ankaŭ

kategorio de iluziitoj, kiuj kviete sidas kaj penas teni sian menson tute neokupita. Ili detenas sin de penso pri io ajn kaj nomas sin ‘granda’. Kun tia hereza vidpunkto, tiuj homoj apenaŭ valoras, ke ni parolu kun ili.

“Miaj amikoj en la boneco, vi devas scii, ke la menso estas vasta kaj granda en mezuro, ĉar ĝi kapablas ampleksi la tutan *darmadatuon* (sanskrite: *dharmadhātu*; la sfero de la Leĝo, t. e. la Universo). Kiam ĝi estas uzata, ĉio estas klare konata. Uzu ĝin kaj vi scios ĉion. Ĉar ĉio estas en unu kaj unu en ĉio, tial kiam nia menso funkcias sen obstaklo kaj estas libera ‘veni’ aŭ ‘foriri’, tiam sin trovas ‘*praĝnao*’.

**§2-06**

“Miaj amikoj en la boneco, ĉia saĝo de *praĝnao* venas de la Vera Naturo kaj ne de la ekstera fonto. Ne havu eraran nocion pri tio. Tio ĉi estas nomata ‘memuzo de la Vera Naturo’. Kiam *tatatao* estas konata, oni estos libera de la iluzio por ĉiam.

“Ĉar la amplekso de la menso estas por grandaĵoj, ni ne devas praktiki agojn bagatelajn (kiel

ekz. kviete sidi kun menso tute neokupita). Ne parolu tutajn tagojn pri la malpleneco sen praktiki ĝin en la menso. Tiu, kiu agas tiamaniere, povas simili ordinarulon, kiu pretendas esti reĝo kaj neniam fariĝos tia. *Praĝnao* neniam povas esti atingita en tiu ĉi maniero, kaj tiuj, kiuj tiel kondutas, ne estas miaj disĉiploj.

**§2-07**

"Miaj amikoj en la boneco, kio do estas *praĝnao*? Ĝi signifas saĝon. Se ni, en ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj lokoj, konstante tenas nian penson libera de stulta deziro, kaj saĝe agas en ĉiuj okazoj, tiam ni praktikas *praĝnaon*. Unu stulta ideo estas sufiĉa por malaperigi *praĝnaon*, dum unu saĝa penso povas ĝin reaperigi. La homoj en stulteco aŭ sub iluzio ĝin ne vidas; ili paroladas pri ĝi per la lango, sed ilia menso restas stulta. Ili ĉiam diras al si: mi praktikas *praĝnaon*; ili gurde paroladas pri la 'Malpleneco', sed ili ne konas la 'Absolutan Malplenon'. La *praĝnao* estas senforma; la menso de saĝo estas ĝuste tia. Se ni havas tian komprenon, tiam la nia estas la saĝo de *praĝnao*.

**§2-08**

“Kio estas *paramitao* (sanskrite: *pāramitā*; signifanta ‘pasi de tiu ĉi bordo de naskiĝo kaj morto al la alia bordo aŭ la nirvano’)? Ĝi estas vorto sanskrita, signifanta ‘al la alia bordo’. Ĝi figurasence signifas la ideon ‘super la ekzisto kaj la neekzisto’ aŭ ‘libera de estiĝo kaj de malestiĝo’. Kiam oni alkroĉiĝas al la sensobjektoj, tiam la ekzisto aŭ la neekzisto sin prezentas kiel la leviĝo kaj la malleviĝo de la ondanta maro, kaj tia stato estas metafore nomata ‘tiu ĉi bordo’; kiam oni rompas kun tia alkroĉiĝo, tiam malaperas la ekzisto kaj la neekzisto, kaj ĉio estas kiel la akvo ĉiam kviete fluanta, kaj tio estas nomata ‘la alia bordo’. Jen kial ĝi estas nomata *paramitao*.

“Miaj amikoj en la boneco, la homoj sub iluzio recitas ‘*Mahaprajnaparamita*’ per sia lango, kaj dum ilia recitado la pensoj eraraj kaj malbonaj sin prezentas en ilia menso. Sed se ili metas la *praĝnaon* en praktikon de momento al momento, tiam ili efektive vidas sian Veran Naturon. Koni tiun ĉi Darmon estas koni la Darmon de *praĝnao*, kaj praktiki ĝin estas praktiki *praĝnaon*. Tiu, kiu ne

praktikas ĝin, estas nomata ordinara homo. Tiu, kiu uzas sian menson por ĝin praktiki eĉ dum unu momento, estas la egalulo de budho.

**§2-09**

"Miaj amikoj en la boneco, la ordinara homo nature estas neniel alia, ol budho, kaj kleŝo (sanskrite: *kleśa*; aflikto, makulo en la menso) estas neniel alia, ol bodio. Dum unu stulta penso pasanta faras ordinaran homon, unu eklumigita dua penso faras budhon; dum unu pasanta penso, kiu alkroĉiĝas al la sensobjektoj, estas kleŝo, unu dua penso, kiu estas libera de la alkroĉiĝo, estas bodio.

"Miaj amikoj en la boneco, *Mahaprajnaparamita* estas la plej alta, la superega kaj la unua. Ĝi nek restas, nek foriras, nek venas. Per ĝi la budhoj de la nuno, de la pasinteco, kaj de la estontaj generacioj atingas la budhecon. Ni devas uzi tiun ĉi grandan saĝon por rompi la kvin *skandaojn*, kaj ĉiajn kleŝojn (afliktojn), ĉar sekvi tian praktikon certigas la atingon de la budheco. La Tri Venenoj (avido, malamo kaj iluzio) tiam turniĝos en *ŝilaon* (sanskrite: *śīla*; devigoj; disciplinaj reguloj;

morala disciplino; bona konduto), *samadion* (sanskrite: *samādhi*; profunda medito; koncentriĝo de spirito) kaj *praĝnaon* (saĝon).

**§2-10**

"Miaj amikoj en la boneco, per mia metodo de praktiko, okdek kvar mil manieroj de saĝo povas estiĝi el unu *praĝnao* sola, ĉar en la mondo sin trovas la sama nombro da afliktoj, kontraŭ kiuj oni devas lukti. Kiam tiuj ĉi estas forigitaj, tiam la saĝo estos konstante trovata en la Vera Naturo. Tiuj, kiuj komprenas tiun ĉi Darmon, estas konataj kiel penso-liberaj. Esti libera de ĉiaj memoroj, de ĉiaj alkroĉiĝoj, de mensogoj kaj trompoj; meti sian propran esencon de *tatatao* en funkciadon; uzi *praĝnaon* por konstati ĉiujn darmojn, sen prefero kaj malprefero al io ajn — jen ĉio, per kio oni vidas sian Veran Naturon kaj atingas la budhecon.

**§2-11**

"Miaj amikoj en la boneco, se vi deziras penetri la plejprofundecon de la *darmadatuo* kaj la *samadio* de *praĝnao*, vi devas praktiki *praĝnaon* per recitado

de la *Sutro de Diamanto*, kiu ebligos al vi koni la Veran Naturon.

“Vi devas scii, ke la meritoj akiritaj per la studo de tiu ĉi sutro estas senmezuraj kaj senlimaj. Ĉiuj ĉi tiuj meritoj estas klare laŭdataj en la teksto, kaj ne povas esti detale elnomeblaj. Tiu ĉi sutro apartenas al la plej alta Skolo de Budhismo kaj estas donita de la Sinjoro Budho speciale al la homoj saĝaj kaj spritaj. Se la malpli saĝaj kaj malpli spritaj aŭdas pri ĝi, ili dubas ĝian kredindecon. Kial do?

**§2-12**

“Kiel ekzemple, se pluvas en *Jambudvipao* (sanskrite: *Jambudvīpa*; la Suda Kontinento, unu el la mondaj kvar kontinentoj en la budhisma tradicio) per la miraklo de la Ĉiela *Nagao* (sanskrite: *nāga*; drako), ĝiaj urboj, urbetoj kaj vilaĝoj estas tiel inunditaj, ke ili flosas sencele sur la akvomaso kiel jujubarbaj folioj. Sed se pluvegas sur la granda oceano, la nivelo de la oceano en la tuteco neniel ŝanĝiĝas. Kiam la mahajananoj, la sekvantoj de la plej alta skolo, aŭdas pri la *Sutro de Diamanto*, ilia

menso eklumiĝas kaj ilia koro malfermiĝas. Ili ekscias, ke *praĝnao* estas imanenta en ilia Vera Naturo kaj ke ili ne devas sin apogi nur sur la skribaĵoj, ĉar ili povas fari uzon de sia propra saĝo por la konstanta praktiko de la kontemplado de *Mahaprajnaparamita*. La *praĝnao* estas imanenta en ĉies Vera Naturo, kio povas esti similigita al la pluvo. La pluvo ne venas el la ĉielo. Ĝi estas produktita per la miraklo de la *nagao*. La malsekeco de la pluvo refreŝigas kaj nutras ĉiujn vivajn estaĵojn, ĉiujn herbojn kaj arbojn, kaj ĉion, kio estas sentohava kaj ankaŭ sensenta. Kiam la riveroj kaj riveretoj atingas la maron, la akvo portata de ili kuniĝas kun la marakvo en unu tuton; — tia estas ankaŭ la okazo kun la homa saĝo de *praĝnao*.

“Miaj amikoj en la boneco, kiam diluve pluvas, la plantoj, kiuj ne profunde enradikiĝintaj, estas elradikigitaj kaj kuŝiĝas teren. Tia estas ankaŭ la okazo kun la homoj malspritaj, kiam ili aŭdas pri la instruo de la Subita Skolo. La *praĝnao* imanenta en ili estas ĝuste la sama, kiel tiu en la homoj tre saĝaj, sed kial do ili ne eklumiĝas tiam, kiam la Darmo

estas instruata al ili? Ĉar ili estas dike vualitaj per eraraj opinioj kaj profunde enradikiĝintaj kleŝoj en la sama maniero, kiel la suno estas vualita de dika nubo kaj ne povas montri sian lumon, antaŭ ol la vento forblovas la nubon.

**§2-13**

"La saĝo de *praĝnao* ne varias laŭ la personoj. La diferenco estas nur tio, ke la homa menso povas esti eklumigita aŭ iluziita. Tiuj, kies menso estas iluziita, penas serĉi la budhecon nur observante eksterajn religiajn ritojn kaj sekve neniam konas sian propran Veran Naturon; tiuj homoj estas nomataj malspriluloj. Aliflanke, tiuj, kiuj konas la instruon de la Subita Skolo kaj ne alkroĉiĝas al la ekstera formo de la ritoj, kaj kies menso funkcias ĉiam sub la ĝustaj opinioj kaj sekve estas absolute libera de kleŝoj, estas nomataj vidantoj de sia Vera Naturo.

**§2-14**

"Miaj amikoj en la boneco, do alkroĉu vian menson nek al la interno, nek al la ekstero, kaj

‘venu’ aŭ ‘foriru’ tute en libereco. Tiu, kiu estas libera de tiu ĉi alkroĉiĝo, povas komplete eklumiĝi sen la plej malgranda konfuziĝo; kaj tiu, kiu estas kapabla fari tion ĉi, povas esti en la mensa stato postulata por kompreni la *Sutron de Praĝnao* (sanskrite: *Mahāprajñāpāramitāsūtra*).

“Miaj amikoj en la boneco, ĉiuj Sutroj kaj Skriboj de la Mahajana kaj Hinajana Skoloj, same kiel la dek du sekcioj de la kanonaj skriboj, estas donitaj por konveni al la bezonoj kaj temperamentoj de diversaj homoj. La doktrinoj eksplikitaj en tiuj ĉi tekstoj estas starigitaj surbaze de la jena principo: *praĝnao* estas latenta en ĉiu persono. Se sin trovus neniuj homoj, sin trovus neniuj darmoj, kaj tial ni scias, ke ĉiuj darmoj estas faritaj por homoj, kaj ke ĉiuj sutroj ŝuldas sian ekziston al la predikantoj.

“Ĉar iuj homoj estas malkleraj, kaj iuj estas kleraj. La malkleraj similas infanojn, dum la kleraj plenaĝulojn. La kleraj predikas al la malkleraj tiam, kiam la lastaj petas ilin tion fari. Dank’ al tio la malkleraj povas atingi subitan eklumiĝon kaj per tio ilia menso fariĝas iluminita. Tiam ili ne estas plu diferencaj de la kleraj.

**§2-15**

“Miaj amikoj en la boneco, sen eklumiĝo sin trovus nenia diferenco inter budho kaj aliaj vivaj estaĵoj, dum ekbrilo de iluminiĝo estas sufiĉa por fari iun ajn vivan estaĵon egala al budho. Tial ĉiuj darmoj estas imanentaj en nia menso. Tiuokaze, kial do ni ne penas ekkoni, per subita vekiĝo, la veran naturon de *tatatao* en nia menso? La sutro *Bodisattva Sila* (sanskrite: *Bodhisattvaśīla*; sutro pri la budhismaj disciplinaj reguloj) diras: ‘Nia Vera Naturo estas propre pura.’ Se ni konus nian menson kaj scius, kia estas nia naturo, ĉiu el ni povus atingi la budhecon. Ankaŭ la sutro *Vimalakirti Nirdesa* (sanskrite: *Vimalakīrtinirdeśasūtra*; kolekto de konversacioj inter Ŝakjamunio kaj kelkaj loĝantoj de la urbo Vaisali) diras: ‘Oni tuj eklumiĝas kaj reakiras al si la propran menson.’

**§2-16**

“Miaj amikoj en la boneco, kiam la Kvina Patriarko siatempe predikis al mi, mi tuj eklumiĝis post liaj paroloj kaj spontanee ekvidis la Veran Naturon de *tatatao*. Pro tiu ĉi kaŭzo nun estas mia

tasko disvastigi la instruon de la Subita Skolo, por ke la lernantoj de budhismo povu tuj trovi la bodion kaj ekkoni sian Veran Naturon per introspekto de la menso.

"Se vi ne povas mem eklumigi vin, vi devas serĉi budhanon vere pian kaj kleran, kiu profunde komprenas la instruon de la Plejalta Skolo, por montri al vi la ĝustan vojon. Tia homo estas antaŭdestinita por fari grandajn indajn aferojn, t. e. eklumigi kaj gvidi aliajn kaj igi ilin ekvidi sian propran naturon. Dank' al lia gvido vi povos esti inicita en ĉiujn bonajn darmojn. La saĝeco de la budhoj de la pasinteco, la nuno kaj la estonteco, same kiel la instruoj de la dek du partoj de la mahajana kanono, estas imanenta en nia menso. Sed en okazo, kiam oni ne sukcesas sin eklumigi, oni devas serĉi la gvidon de vere piaj kaj tre kleraj homoj.

"Aliflanke, tiuj, kiuj povas sin mem eklumigi, bezonas nenian eksteran helpon. Estas eraro, se oni insistas pri la ideo, ke sen konsiloj de iluminiĝinto oni ne povus atingi liberiĝon. Kial do? Ĉar per via kunnaskita saĝo vi ja kapablas atingi vian eklumiĝon,

kaj eĉ la ekstera helpo kaj la instruoj de iluminiĝinto havus nenian utilon, se vi estus trompita de falsaj doktrinoj kaj eraraj opinioj. Se vi introspektas vian menson per vera *praĝnao*, tiam ĉiuj eraraj opinioj estos venkitaj en momento, kaj tuj kiam vi ekkonos la Veran Naturon, vi jam alvenos en la budho-teron (t.e. fariĝos budho).

**§2-17**

"Miaj amikoj en la boneco, kiam ni uzas *praĝnaon* por introspekto, ni estas iluminitaj de interne kaj de ekstere, kaj ni povas ekkoni nian propran menson. Koni sian menson estas akiri fundamentan liberiĝon. Akiri liberiĝon estas atingi la *samadion* de *praĝnao*, kiu estas 'senpenseco' aŭ transcenda sciado. Kio do estas la 'senpenseco'? Ĝi estas vidi kaj koni ĉiujn darmojn (ekzistaĵojn kaj fenomenojn) per menso libera de ĉia alkroĉiĝo. Vi povas uzi ĝin ie ajn sen alkroĉiĝo al io ajn. Tio, kion ni devas fari, estas purigi nian menson, por ke la ses *viĝnanaoj* (sanskrite: *vijñāna*; kondiĉa konscio; percepto) povu pasi tra la ses pordoj (sensorganoj) sen esti makulitaj de aŭ alkroĉitaj al la ses sensobjektoj.

Kiam nia menso libere laboras sen malhelpo kaj estas libera ‘veni’ aŭ ‘foriri’, tiam ni atingas la *samadion* de *praĝnao* aŭ liberiĝon. Tia stato estas nomata la funkcio de ‘senpenseco’. Sed sin deteni de pensado pri io ajn, tiel ke ĉiuj pensoj estas subpremataj, signifas esti katenita de la Darmo, kaj tio estas ankaŭ erara opinio.

**§2-18**

“Miaj amikoj en la boneco, tiuj, kiuj konas la metodon de ‘senpenseco’, konos ĉiujn aliajn metodojn; tiuj, kiuj konas la metodon de ‘senpenseco’, scios ĉion, kion ĉiuj budhoj scias; tiuj, kiuj konas la metodon de ‘senpenseco’, atingos la budhecon.

“Miaj amikoj en la boneco, se en la estonteco inicitoj de mia Skolo faros, kune kun siaj kolegoj kaj kundisĉiploj, ĵurpromeson dediĉi sian tutan vivon, tute sen retiriĝo, al la praktikado de la instruoj de tiu ĉi Subita Skolo, en la sama maniero, en kiu ili servus al la Budho, ili certe atingos la Sanktan Lokon, t.e. la budhecon.

“La sekvantoj de mia Skolo devos transdoni de koro al koro la instruon transdonitan de unu Patriarko

al alia, kun nenia provo kaŝi la ortodoksan instruon. Al tiuj, kiuj apartenas al aliaj skoloj kaj al tiuj, kies opinioj kaj celoj estas diferencaj de la niaj, la Darmo ne devos esti transdonita, ĉar la transdono povus esti malutila al ili. Tiu ĉi paŝo devas esti prenata por eviti, ke la malkleraj personoj, kiuj ne povas kompreni nian instruon, povu diri kalumniajn vortojn pri ĝi kaj per tio neniigi sian semon de la budho-naturo, kiu restos nereakirita dum centoj da *kalpaoj* kaj miloj da reenkarniĝoj.

**§2-19**

"Miaj amikoj en la boneco, mi havas 'Senforman Ĉanton', kiun vi ĉiuj devos reciti kaj teni en la menso. Sekvu ĝian instruon tute egale, ĉu vi estas bonzo aŭ laiko; estus senutile nur parkerigi ĝin sen praktikado. Aŭskultu do tiun ĉi ĉanton:

Tiuj, kiuj povas plene kompreni kaj instrui la Darmon,

Estas kiel la suno brilanta en la malplena spaco.

Ilia nura celo estas transdonado de la Darmo por la ekkono de la Vera Naturo,

Kaj ili venas en tiun ĉi mondon nur por elradikigi ĉiujn herezajn instruojn.

Ni apenaŭ povas klasi la darmojn en ‘Subitan’ kaj ‘Laŭgradan’;

Sed iuj homoj atingos eklumiĝon multe pli rapide, ol la aliaj.

Nia instruo estas la pordo por la vido de la Vera Naturo;

La stultaj homoj havas malfacilon en la kompreno.

Mi povas klarigi en dek mil manieroj,

Sed ĉiuj tiuj klarigoj povas esti revenigitaj al unu principo.

Nia menso kaŝas en si diversajn iluziojn,

Ni bezonas la lumon de saĝeco por forigi la mallumon.

**§2-20**

Eraraj pensoj portas al ni iluziojn,

Ĝustaj pensoj helpas al ni forigi ilin.

Se vi forĵetas kiel la erarajn, tiel ankaŭ la ĝustajn,

Pureco nature aperas en nia menso.

La bodio estas imanenta en nia Vera Naturo.

Estas eraro, se vi provas ĝin serĉi aliloke.

Interne de nia malpura menso la pura estas trovebla,

Kaj atinginte la purecon, ni estas liberaj de la tri obstakloj (t. e. la kleŝo, la malbona karmo, kaj la repago pro la agoj antaŭaj).

**§2-21**

Se vi volas sekvi la Vojon, kiu kondukas al la iluminiĝo,

Nenio povos malhelpi vin kiel stumbliga ŝtono.

Konstante havu okulon sur viajn proprajn kulpojn,

Vi ne povos plu deflankiĝi de la Vojo.

Ĉiuj specoj de vivaj estaĵoj havas sian propran manieron de saviĝo,

Kaj ili vivas en harmonio kaj ne kreas suferojn unuj al la aliaj.

Se vi forlasos vian propran kaj serĉos iun alian manieron de saviĝo,

Vi povos malŝpari vian tutan vivon kaj neniam trovos ĝin.

Kvankam vi peze paŝas sur via erara vojo ĝis la maljuniĝo,

Vi trovos nenion krom malĝojo kaj pento en la fino.

**§2-22**

Se vi deziras trovi la Veran Vojon,
Agu ĝuste kaj juste — jen la Vojo.
Sed se vi ne pene strebas al la budheco,
Vi palpos en mallumo kaj neniam trovos ĝin.
Tiu, kiu serioze sekvas la Vojon,
Ne vidas la erarojn kaj kulpojn de la mondo.
Se vi trovas kulpojn de aliaj,
Vi mem jam estas en la eraro.
Kiam aliaj estas en la eraro, ni devas ignori tion,
Ĉar estas eraro por ni trovi kulpon.

**§2-23**

Senigante nin je la emo trovi alies kulpojn,
Ni obstrukcas fonton de afliktoj.
Kiam nek malamo, nek amo ĝenas nian menson,
Ni serene dormas kun la du kruroj plene etenditaj.

Se vi intencas esti instruanto de aliaj,

Vi devas havi diversajn lertajn rimedojn, kiuj kondukas aliajn al eklumiĝo.

Faru la disĉiplojn liberaj de ĉiaj duboj,

Tiam ilia Vera Naturo estos trovita.

La budha Darmo estas en tiu ĉi mondo,

Nur en kiu estas trovita la eklumiĝo.

**§2-24**

Se vi serĉas la bodion ekster tiu ĉi mondo,

Tio estas kvazaŭ serĉi kuniklan kornon.

Ĝustaj opinioj estas nomataj ‘transcendaj’;

Eraraj opinioj estas nomataj ‘ĉi-mondaj’.

Kiam ĉiuj opinioj, ĝustaj kaj eraraj, estas forĵetitaj,

Tiam la naturo de bodio aperas.

Tiu ĉi ĉanto estas la instruo de la Subita Skolo.

Ĝi estas nomata ankaŭ La Granda Ŝipo de Darmo (por transpasi la maron de naskiĝo kaj morto).

*Kalpaon* post *kalpao*, la iluziitaj homoj povas aŭskultadi sutrojn,

Sed la eklumiĝo estas atingita nur en momento.”

**§2-25**

Antaŭ la fino de sia parolado la Patriarko aldonis: “Hodiaŭ, en tiu ĉi templo Dafan, mi predikas al vi pri la instruo de la Subita Skolo. Se nur ĉiuj sentohavaj estaĵoj de la *darmadatuo* tuj ekkomprenus la Leĝon kaj atingus la budhecon!”

Aŭdinte kion la Patriardo diris, la prefekto Wei kaj la aliaj registaraj oficistoj, kune kun la taŭistoj kaj la laikoj, estis ĉiuj eklumigitaj. Ili respekte donis al la Patriarko budhanan saluton kaj ĝoje kriis unuanime: “Bone farite! Bone farite! Kiu povus atendi, ke budho enkarniĝis ĉi tie en Lingnan!”

# ĈAPITRO 3
# KLARIGO DE DUBOJ

**§3-01**

Iun tagon, la prefekto Wei gastigis la Patriarkon kaj liajn sekvantojn per vegetara manĝo. Ĉe la fino de la bankedo la prefekto petis la Patriarkon preni la altan sidlokon kaj doni darman paroladon. Denove farinte ceremonian *koŭtoŭadon* (*koŭtoŭi*: surgenuiĝi kaj respektege riverenci kap-al-tere) al la majstro kune kun la aliaj ĉeestantaj registaraj oficistoj, kleruloj kaj ordinaruloj, la prefekto diris: “Mi aŭdis la predikon de Via Sankteco. Ĝi estis tiel profunda kaj mirinda, ke ĝi estis super nia mizera komprenpovo, kaj mi havas kelkajn dubojn, kiujn mi esperas, ke vi klarigos por ni.”

“Se vi havas dubojn,” respondis la Patriarko, “bonvolu demandi, kaj mi klarigos.”

“Tio, kion vi predikis, estis la fundamentaj principoj instruitaj de Bodidarmo (sanskrite: *Bodhidharma*; majahana budhano, kiu venis en Ĉinion en la 6-a jarcento por disvolvi ĉinan budhisman skolon, nome skolon de *djano* aŭ ĉina zeno), ĉu ne?”

“Jes,” respondis la Patriarko.

“Mi aŭdis, ke kiam Bodidarmo unuafoje intervidiĝis kun la imperiestro Wu de la dinastio Liang por konverti tiun,” diris la prefekto, “la imperiestro demandis, kiajn meritojn li jam akiris al si el la konstruigado de temploj, la bonzigo de homoj kaj la donado de almozoj kaj vegetaraj regaloj al la samgo dum la vivo, kaj la Granda Majstro respondis, ke ĉio tio alportis al li neniajn meritojn. Mi ne povas kompreni, kial li donis tian respondon. Bonvole faru al ni klarigon.”

“Ĉio tio ja alportis neniajn meritojn,” respondis la Patriarko. “Ne dubu pri la vortoj de la Saĝulo. La menso de la imperiestro Wu estis iluziita, kaj li ne konis la ortodoksan instruon. Tiaj agoj, kiaj estas la konstruigado de temploj, la bonzigo de homoj kaj la donado de almozoj al la samgo, alportas al la farinto nur feliĉojn, kiuj ne devas esti prenataj por meritoj. Meritoj devas esti trovitaj interne de la *darmakajao* (sanskrite: *dharmakāya*; la darmo-korpo de la budho; la nemateriala, nevidebla kaj senmorta korpo de la budho; la spirita korpo), kaj ili havas nenian rilaton al la atingitaj feliĉoj.”

## §3-02

La Patriarko daŭrigis: “La konado de sia Vera Naturo estas ‘Gong’ (bonaj meritoj) kaj tenado de la egaleco kontraŭ ĉiuj vivaj estaĵoj estas ‘De’ (bona kvalito, virto). Kiam nia mensa aktiveco funkcias sen ĝenaĵoj, tiel ke ni povas konstante koni la veran staton kaj la misteran funkciadon de nia menso, tiam ni povas esti konsideritaj kiel jam akirintaj Gong De (veraj meritoj). Interne, teni la menson en humileco estas Gong, kaj ekstere, konduti laŭ la deco estas De. Lasi ĉiujn aferojn esti la manifestaĵoj de la Vera Naturo estas Gong, kaj liberigi sian menson disde ĉiaj pensoj estas De. Ne deflankiĝi de la Vera Naturo estas Gong, kaj ne malpurigi la menson dum la uzo de ĝi estas De. Se vi serĉos meritojn interne de la *darmakajao* kaj praktikos tion, kion mi ĵus diris, tiam vi akiros verajn meritojn. Tiu, kiu laboras por meritoj, ne malestimas la aliajn, kaj ĉiuokaze li traktas ilin kun respekto. Tiu, kiu kutimas rigardi de alte aliajn kaj ne rompis kun ‘mi’, ‘mia’ kaj ‘min’, ne povas havi sian Gong. Pro sia egoismo kaj sia

kutima malestimo al ĉiuj aliaj, li kompreneble ne konas sian Veran Naturon, kio montras, ke al li mankas De.

“Miaj amikoj en la boneco, kiam nia mensa aktiveco laboras sen interrompo, tiam tio estas Gong; kaj kiam nia menso funkcias en rekta maniero (t.e. en maniero simpla, lojala), tiam tio estas De. Kulturi sian menson estas Gong, kaj kulturi nian konduton estas De.

“Miaj amikoj en la boneco, la meritoj devas esti serĉataj interne de la Vera Naturo kaj ili ne povas esti akiritaj per donado de almozoj kaj vivtenado de bonzoj, ktp. Tial ni devas fari distingon inter la feliĉoj kaj la meritoj. Sin trovas ja nenio erara en kio estas dirita de nia Patriarko Bodidarmo. Estas la imperiestro Wu mem, kiu ne konas la veron.”

**§3-03**

La prefekto ree demandis: “Mi rimarkas, ke bonzoj kaj laikoj kutime recitas la nomon de

Amitabo kun la espero naskiĝi en la Pura Lando de la Okcidento. Por forigi miajn dubojn, bonvolu diri al mi, ĉu estas eble por ili naskiĝi tie aŭ ne.”

“Atente aŭskultu min, sinjoro,” respondis la Patriarko, “kaj mi klarigos. Laŭ la sutro dirita de nia Sinjoro Budho en la urbo Shravasti por kondukado de homoj al la Pura Lando, estas tre klare, ke la Pura Lando ne estas malproksima de tie, kie ni estas. La distanco estas fizike cent ok mil lioj, kiu efektive simbolas ‘dek malbonojn’ kaj ‘ok erarojn’ interne de ĉiu el ni. Por homoj de malsupereca menso certe ĝi estas malproksima, dum por homoj de supereca menso ĝi estas tre proksima.

“Kvankam la Darmo estas la sama, tamen la homoj estas diferencaj inter si per sia menso. Ĉar ili diferencas unu de la alia en sia grado de lumigiteco aŭ malklero, iuj ekkomprenas la Darmon pli rapide ol la aliaj. Dum la iluziitaj homoj recitas la nomon de Amitabo kaj preĝe petas pri sia naskiĝo en la Pura Lando de Okcidento, la lumiĝintaj nur penas purigi sian menson. Jen kial la Budho diris: ‘Kiam la menso estas pura, ankaŭ la Budha Lando estas pura.’

## §3-04

“Kvankam vi estas indiĝeno de la Oriento, se via menso estas pura, vi estas sen pekoj. Aliflanke, eĉ se vi naskiĝus en la Okcidento, la malpura menso ne povus liberigi vin de pekoj. Kiam la Orientanoj faras pekojn, tiam ili recitas la nomon de Amitabo kaj preĝe petas pri sia naskiĝo en la Okcidento; sed kiam la Okcidentanoj pekas, tiam kie do ili preĝus, ke ili naskiĝu?

“La ordinaruloj kaj malkleruloj konas nek la Veran Naturon, nek la Puran Landon interne de si mem, tial ili deziras naskiĝi en la Oriento aŭ en la Okcidento. Sed la lumiĝintaj vidas ĉiun lokon kiel la saman. Jen kial la Budho diris: ‘Kie ajn oni estas, oni ĉiam estas feliĉa kaj trankvila.’

“Sinjoro, se via menso estas libera de malbono, la Okcidento ne estas malproksima de ĉi tie; sed estus tute vane por homo kun koro malpura preĝi por naskiĝi tie per recitado de la nomo de Amitabo.

“Nun, mi do konsilas al vi, sinjoro: unue forigu la ‘dek malbonojn’, tiam vi estos jam kvazaŭ vojaĝinta cent mil liojn; poste forigu la ‘ok erarojn’,

tiam vi estos jam fininta la restantajn ok mil liojn. Se ni povas ĉiutempe vidi la Veran Naturon kaj ĉiuokaze konduti en rekta maniero (t. e. en maniero simpla, lojala), en palpebruma daŭro ni povos atingi la Puran Landon kaj tie vidi Amitabon.

**§3-05**

"Se vi nur metas en praktikon la dek bonajn agojn, tiam ne estos necese por vi naskiĝi tie. Aliflanke, se vi ne forigas la 'dek malbonojn' en via menso, tiam kiu budho kondukos vin tien? Se vi ekkomprenas la Sennaskiĝan Doktrinon (kiu metas finon al la ciklo de naskiĝo kaj morto) de la Subita Skolo, tiam necesos al vi nur unu momento por vidi la Okcidenton. Se vi ne komprenas ĝin, tiam la distanco estos longega, kiel do vi povos atingi tien per recitado de la nomo de Amitabo?

"Nu, sinjoroj, se mi movus la Puran Landon antaŭ viajn okulojn en tiu ĉi momento, ĉu vi volus ĝin vidi?"

La ĉeestantaro *koŭtoŭis* kaj respondis: "Se ni povus vidi la Puran Landon ĉi tie, estus tute nenecese

por ni deziri naskiĝi tie. Via Sankteco do afable volu, ke ni, dank' al via transporto, povu vidi ĝin ĉi tie."

**§3-06**

La Patriarko diris: "Tiu ĉi nia fizika korpo estas kiel urbo. Niaj okuloj, oreloj, nazo kaj lango estas la pordoj. Sin trovas kvin eksteraj pordoj kaj unu interna pordo, pordo de ideoj. La menso estas tero; la Vera Naturo estas la Reĝo, kiu vivas en la regno de la menso. Kiam la Vera Naturo estas ene, la Reĝo estas ene, kaj niaj korpo kaj menso ekzistas. Kiam la Vera Naturo estas for, sin trovas neniu Reĝo, kaj niaj korpo kaj menso kadukiĝas. La budheco devas esti alstrebata interne de nia Vera Naturo, kaj ne esti serĉata ekstere de la korpo.

"Tiuj, kiuj ne konas sian Veran Naturon, estas ordinaraj homoj; tiuj, kiuj estas eklumiĝintaj en sia Vera Naturo, estas budhoj. La granda kompatemo estas Avalokiteŝvaro (sanskrite: *Avalokiteśvara*; unu el la du ĉefaj bodisatvoj de la Okcidenta Pura Lando). La ĝojo en almozdono estas *Mahasthamaprapta* (sanskrite: *Mahāsthāmaprāpta*; la alia bodisatvo de

tiu Pura Lando). La kapablo ĉiam teni sian vivon pura estas Ŝakjamunio (sanskrite: *Śākyamuni*; la Budho, la fondinto de la budhismo). La egaleco kaj lojaleco estas Amitabo (sanskrite: *Amitābha*; la budho de la Pura Lando de la Okcidento). La ideo pri la permanenta memo aŭ tiu pri la efektiva estaĵo estas la monto *Sumeru*. La diboĉa menso estas la oceano (de suferado). La kleŝo estas la ondego. La malvirto estas la malbona drako. La iluzio kaj la falseco estas fantomoj kaj dioj. La afliktoj estas fiŝoj kaj aliaj akvaj animaloj. La avido kaj la malamo estas la inferoj. La malklero kaj stulteco estas brutoj.

**§3-07**

“Miaj amikoj en la boneco, se vi konstante plenumas la dek bonajn agojn, la paradizo tuj aperos al vi. Kiam vi senigos vin je la ideo pri la memo de vi kaj de iu ajn alia estaĵo, la monto *Sumeru* disfalos. Kiam via menso ne plu estas okupita de malbonaj pensoj, la oceano (de suferado) sekiĝos. Kiam vi estas liberaj de kleŝo, la ondoj (de la oceano) kvietiĝos. Kiam vi ne estas malvirta, la fiŝoj kaj malbonaj drakoj tute mortos.

“Interne de la regno de nia menso, sin trovas *tatagatao* (sanskrite: *tathāgata*; titolo donita al ĉiuj budhoj, inkluzive de Ŝakjamunio; unu el la plej altaj titoloj de budho; ĝia signifo estas “la tiel veninta, la tiel foririnta, la tiel plenumita”, kaj ĝi aludas “tiun, kiu venas kaj foriras en la sama maniero kiel la pasintaj budhoj faris” aŭ “tiun, kiu estas sur la vojo jam atingis la plenan eklumiĝon”) de nia eklumiĝinta menso, kiu elsendas potencan lumon. Ĝi prilumas ekstere la ses pordojn de senso (okuloj, oreloj, nazo, lango, korpo kaj menso) kaj faras ilin puraj. Tiu ĉi lumo estas sufiĉe forta por klarigi la ses ĉielojn de deziro (la ses klasojn de dioj en la regno de deziroj) kaj, kiam ĝi estas turnita internen al la Vera Naturo, ĝi tuj eliminas la tri venenajn elementojn (t.e. kolero, avido, malklero) kaj elpurigas nin je la pekoj, kiuj povus konduki nin al la inferoj aŭ al aliaj malbonaj regnoj, kaj plene prilumas nin interne kaj ekstere, tiel ke ni fariĝas neniel diferencaj de tiuj naskiĝintaj en la Pura Lando de la Okcidento. Nu, se ni ne tion ĉi praktikas, kiel do ni povas atingi tien?”

**§3-08**

Aŭdinte kion la Patriarko diris, la ĉeestantaro tre klare ekvidis sian Veran Naturon. Ili ĉiuj kune donis al li budhanan saluton kaj admire ekkriis: “Kiel mirinde!” Ili ankaŭ diris kun forta deziro: “Se nur ĉiuj sentohavaj estaĵoj en la regno de la Darmo povus aŭdi tion ĉi kaj tuj eklumiĝus!”

La Patriarko aldonis: “Miaj amikoj en la boneco, tiuj, kiuj deziras sekvi la instruojn de la Budho, povas fari sian praktikadon ankaŭ hejme. Estas tute ne necese por ili resti en temploj. Tiuj, kiuj faras la praktikadon hejme, povas esti kiel indiĝeno de la Oriento, kiu estas bonkora, dum tiuj, kiuj restas en temploj sed neglektas sian praktikadon, estas neniel diferencaj de indiĝeno de la Okcidento, kiu estas malbona en la koro. Kie la menso estas pura kaj klara, tie sin trovas la ‘Okcidenta Pura lando de nia propra Vera Naturo’.”

**§3-09**

La prefekto demandis: “Kiel do ni sekvas la instruojn de la Budho hejme? Bonvolu nin instrui.”

La Patriarko respondis: “Mi donos al vi ‘Senforman Ĉanton’. Se vi metos ĝian instruon en praktikon, vi profitos la samon kiel tiuj, kiuj konstante vivas kun mi. Aliflanke, se vi ne praktikos ĝin, kia utilo do estos via sekvado de la Vojo, eĉ se vi forrazos al vi la hararon kaj forlasos vian hejmon (por fariĝi pia bonzo)?

La ĉanto tekstas jene:

Por animo ekvilibrigita kaj kvieta, la observo de *ŝilao* estas nenecesa.

Por konduto en lojala maniero, la praktikado de *djano* estas senutila.

Sekvante la principon de dankoŝulda pago ni vivtenas niajn gepatrojn kaj ilin file servas.

Sekvante la principon de justeco la superuloj kaj la subuloj subtenas unu la alian en okazo de bezono.

Sekvante la principon de humileco kaj respekto la pliaĝuloj kaj la plijunuloj estas en harmoniaj rilatoj.

Sekvante la principon de tolero kaj cedemo ni ne kverelas, eĉ meze de malamika homamaso.

Se ni povas persisti ĝis fajro estas produktita per senĉesa borado de ligno,

Tiam la ruĝa lotuso (simbolo de la budho-naturo) elkreskas el la nigra koto (simbolo de la malklero, la ne-lumiĝinta stato de la mondo).

Tio, kio havas amaran guston, plejofte estas bona medikamento,

Kaj tio, kio sonas malagrable al la orelo, certe estas sincera konsilo.

**§3-10**

Korektinte niajn erarojn, ni fariĝas pli saĝaj,

Ŝirmante niajn mankojn kaj kulpojn, ni difektas nian menson.

En nia ĉiutaga vivo ni devas ĉiam praktiki altruismon;

La budheco ne estas atingita nur per almozdonado.

La bodio povas esti trovita nur en nia menso,

Kaj ne estas necese serĉi ion mistikan de ekstere.

Tiuj, kiuj aŭdis tiun ĉi ĉanton kaj metas ĝin en efektivan praktikon,

Trovos paradizon antaŭ si ĝuste en la momento.”

**§3-11**

La Patriarko aldonis: “Miaj amikoj en la boneco, ĉiu el vi devas meti la instruon de tiu ĉi ĉanto en praktikon, por ke vi povu ekkoni la Veran Naturon kaj atingi rekte la budhecon. La Darmo atendas neniun. Nun vi povas foriri, kaj mi reiros al Caoxi. Se vi havos demandojn, vi povos iri tien kaj meti ilin al mi.”

Tiumomente la prefekto, la aliaj registaraj oficistoj, kaj la gepiuloj, kiuj ĉeestis, ĉiuj eklumiĝis. Kun plena kredo ili akceptis la instruon kaj decidis meti ĝin en praktikon.

# ĈAPITRO 4
# *SAMADIO* KAJ *PRAĜNAO*

**§4-01**

La Patriarko en alia okazo predikis al la aŭskultantaro la jenon:

“Miaj amikoj en la boneco, mia metodo de praktiko estas fondita sur *samadio* kaj *praĝnao*. Sed vi ne miskomprenu, ke tiuj ĉi du estas sendependaj unu de la alia, ĉar ili estas nedisigebla tuto kaj ne du entoj. *Samadio* estas la substanco de *praĝnao*, dum *praĝnao* estas la funkcio de *samadio*. Kiam ajn ni atingis *praĝnaon*, *samadio* sin trovas kun ĝi; kaj inverse. Se vi komprenas tiun ĉi principon, vi komprenas la instruon pri ilia unueco.

“La sekvantoj de la budhisma Vojo ne pensu, ke sin trovas distingo inter ‘*samadio* donas naskon al *praĝnao*’ kaj ‘*praĝnao* donas naskon al *samadio*’. Teni tiun ĉi opinion implicas, ke la Darmo havas du formojn. Se belaj vortoj venas de tiuj, kies koro estas malpura, tiam *samadio* kaj *praĝnao* estas nur vanaj kaj sekve senutilaj, ĉar inter ili mankas ekvilibro.

Aliflanke, kiam ni estas bonaj kiel en la menso, tiel ankaŭ en la vortoj, kaj kiam nia ekstera aspekto kaj niaj internaj sentoj estas harmoniaj inter si, tiam *samadio* kaj *praĝnao* estas egalaj unu al la alia. Laŭnome ili estas du aferoj, sed substance ili estas unu kaj la sama.

**§4-02**

"Argumentado ne estas necesa por la mem-eklumiĝinta disĉiplo. La argumento, ĉu *samadio* aŭ *praĝnao* estiĝas la unua, egaligus homon al tiuj, kiuj estas sub iluzio. Tia argumentado kuntrenus la deziron venki kaj sekve fortigus la egoismon kaj alligus nin al la ideo pri la Kvar Formoj (memo, ekzisto, vivaj estaĵoj, vivdaŭro).

"Miaj amikoj en la boneco, al kio do *samadio* kaj *praĝnao* povas esti similaj? Nu, ili estas pli aŭ malpli similaj al la lampo kaj ĝia lumo. Se vi uzas lampon, tiam estiĝas lumo; sed sen lampo, tiam estus mallume. La lampo estas la enkorpiĝo de la lumo, kaj la lumo estas la funkcio de la lampo. Laŭnome ili estas du aferoj, sed substance ili estas unu kaj la

sama. La okazo estas la sama kun *samadio* kaj *praĝnao*.”

**§4-03**

En ankoraŭ alia okazo la Patriarko predikis al la aŭskultantaro la jenon:

“Miaj amikoj en la boneco, la praktikado de la ‘*Samadio de* Unu-Ago’ signifas, ke nia menso devas esti en rekta maniero egale je ĉiu okazo, ĉu ni paŝas, staras, sidas aŭ kuŝas. La sutro *Vimalakirti Nirdesa* diras: la ‘rekteco’ estas la sankta loko (t. e. la loko, kie la Budho atingis sian iluminiĝon), la Pura Lando. Ne lasu vian menson esti ‘malrekta’ dum vi praktikas la ‘rektecon’ nur per viaj lipoj. Ne lasu vian buŝon diri la ‘*Samadion de* Unu-Ago’ dum vi ne praktikas ‘rektecon’ en la menso. Vi devas praktiki ‘rektecon’ kaj ne devas alkroĉiĝi al io ajn. La iluziitaj homoj inklinas alkroĉiĝi al *darmalakŝanao* (sanskrite: *dharmalakṣaṇa*; la formo de darmo; la formo aŭ aspekto de objektoj; objekto kaj fenomeno) kaj sekve ili obstinas en sia propra maniero de interpreto de la ‘*Samadio de* Unu-Ago’, kiun ili difinas kiel ‘sidadi

daŭre kaj senmove, sen lasi iun ajn ideon aperi en la menso'. Se vi havas tian komprenon, vi egaligas vin al senanima objekto. Tio obstrukcos la vojon de via praktikado de la budhisma doktrino.

"Miaj amikoj en la boneco, tiu vojo devas esti kiel libere fluanta akvo — kial do ĝin stagnigi kaj haltigi? Se via menso estas libera de alkroĉiĝo al la formo de darmo, la vojo fariĝas malobstrukcita; alie vi vin katenas. Se vi sidadas senmove, vi estas kiel Ŝariputro (sanskrite: *Śariputra*; unu el la dek famaj disĉiploj de la Sinjoro Budho), kiu estis severe riproĉita de *Vimalakirti* (sanskrite: *Vimalakīrti*; samtempulo de Ŝakjamunio, fama laika budhano, kiu profunde konis la mahajanan doktrinon) pro sia kvieta sidado en la arbaro.

**§4-04**

"Miaj amikoj en la boneco, iuj instruantoj de meditado instruas siajn disĉiplojn observadi kviete sian menson kaj forpeli ĉiajn pensojn, asertante, ke tio estas la metodo akiri meritojn, kaj pro tio la disĉiploj rezignas ĉiun alian praktikon. La iluziitaj personoj inklinas freneze alkroĉiĝi al tia instruo. Tiaj

okazoj ne estas maloftaj. Tio montras, ke estas granda eraro instrui tion ĉi al homoj.”

Pli poste la Patriarko ree alparolis siajn disĉiplojn:

“Miaj amikoj en la boneco, en la ortodoksa budhismo la diferenco inter la Subita Skolo kaj la Laŭgrada Skolo efektive ne ekzistas; la nura diferenco rekonata estas, ke per naturo iuj estas rapidaj, dum aliaj malrapidaj en komprenado. Tiuj, kiuj estas rapidaj kaj klerigitaj, povas vekiĝi al la vero en subiteco, dum tiuj, kiuj estas malrapidaj kaj iluziitaj, devas trejni sin iom post iom. Sed tia diferenco malaperos tiam, kiam ni konas nian propran menson kaj vidas nian originan naturon. Tial tiuj terminoj ‘Subita’ kaj ‘Laŭgrada’ estas nur por oportuna uzo.

**§4-05**

“Miaj amikoj en la boneco, estas la tradicio de nia skolo preni la ‘Senpensecon’ kiel nian celon, ‘Senformecon’ kiel nian bazon kaj ‘Ne-alkroĉiĝon’ kiel nian fundamentan principon. La ‘Senformeco’ signifas ne alkroĉiĝi al objektoj tiam, kiam ni estas en kontakto kun ili. La ‘Senpenseco’ signifas ne

alkroĉiĝi al iu ajn penso, kiu aperas en la menso. La ‘Ne-alkroĉiĝo’ estas la karakterizaĵo de nia Vera Naturo.

“Ĉiuj aferoj en la mondo, bonaj aŭ malbonaj, belaj aŭ malbelaj, amikeco aŭ malamikeco — eĉ ofendoj de akraj vortoj, trompo, molesto — devas esti traktataj kaj forigitaj kiel malplenaj kaj vantaj, kaj ni ne devas, eĉ en okazoj kiel la lastaj, pensi pri redono de malbono pro malbono. De momento al momento, ne alkroĉiĝu al la pasinteco. Se ni permesas al niaj pensoj interligiĝi kun la pasinteco, la nuno kaj la estonteco en seninterrompa serio, ni metas nin en katenon. Se, aliflanke, ni liberigas nin de la alkroĉiĝo al ĉiuj aspektoj de objektoj kaj aferoj, ni akiros liberiĝon. El tiu ĉi kialo ni prenas ‘Ne-alkroĉiĝon” kiel nian fundamentan principon.

**§4-06**

“Miaj amikoj en la boneco, liberigi nin de la alkroĉiĝo al la eksteraj objektoj estas nomata ‘Senformeco’. Kiam ni povas tion fari, la naturo de la darmo estos pura. El tiu ĉi kialo ni prenas

‘Senformecon’ kiel nian bazon. “Miaj amikoj en la boneco, teni nian menson libera de malpuriĝo sub ĉiaj cirkonstancoj estas nomata ‘Senpenseco’. Nia menso devas stari aparta de cirkonstancoj, kaj ni neniel devas lasi ilin influi la funkcion de nia menso. Sed estas granda eraro subpremi nian menson disde ĉiaj pensoj; ĉar eĉ se ni sukcese senigos nin je ĉiaj pensoj kaj post tio tuj mortos, ni ankoraŭ reenkarniĝos aliloke. La lernantoj de budhismo devas doni konsideron al tio ĉi. Estas sufiĉe malbone por homoj fari tian seriozan eraron ne konante la signifon de la Leĝo, sed estus eĉ pli malbone instigi aliajn sekvi la samon! Ĉar ili ne sole ne vidus sian iluziiĝon, sed eĉ kalumnius la budhismajn skribojn. Tial ni prenas ‘Senpensecon’ kiel nian celon.

**§4-07**

“Miaj amikoj en la boneco, permesu al mi pli plene klarigi, kial ni prenas “Senpensecon” kiel nian celon. Sin trovas homoj iluziitaj, kiuj fanfaronas pri sia konado de la Vera Naturo, sed kiam ili estas influataj de la cirkonstancoj, multaj pensoj estiĝas en

ilia menso, sekvataj de eraraj opinioj, kiuj estas la fonto de ĉiuj ĉagrenoj de la mondo kaj diversaj falsaj ideoj. En la Vera Naturo sin trovas propre nenio, kio estus atingita. La diro, ke sin trovas ia atingo, kaj la facilanima parolo pri meritoj aŭ malmeritoj, estas eraraj opinioj kaj makuloj en la menso. Jen kial ni prenas "Senpensecon" kiel la celon de nia Skolo.

**§4-08**

"Miaj amikoj en la boneco, rilate 'Senpensecon', je kio do ni devas senigi nin kaj sur kio do ni devas fiksi nian menson? Ni devas senigi nin je 'paroj da kontraŭoj' kaj ĉiuj makulitaj konceptoj. Ni devas fiksi nian menson sur la Vera Naturo de *tatatao*, ĉar *tatatao* estas la substanco de penso aŭ ideo, kaj la ideo estas la rezulto de la aktiveco de *tatatao*.

"Estas nia Vera Naturo de *tatatao* — ne la sensorganoj de okulo, orelo, nazo aŭ lango — kiu estigas 'ideon'. Tatatao portas sian atributon, kaj tial ĝi povas estigi 'ideon'. Sen *tatatao* la sensorganoj kaj la sensobjektoj tuj pereus.

“Miaj amikoj en la boneco, ĉar estigi ‘ideon’ estas la atributo de *tatatao*, tial, se nur niaj ses sensorganoj (okuloj, oreloj, nazo, lango, korpo kaj menso) — kvankam ili havas funkciadojn en vidado, aŭdado, tuŝado, konado ktp — ne estas infektitaj aŭ makulitaj de la miriadoj da cirkonstancoj, nia Vera Naturo povas esti ĉiam libera kaj mem-manifestita. Jen kial la sutro diras: ‘Tiu, kiu estas lerta en la distingo de diversa *darmalakŝanao*, estos nemoveble instalita en la Unua Principo (t.e. la Nirvano)’.”

# ĈAPITRO 5
# *DJANO*

## §5-01

Iun tagon la Patriarko predikis al la disĉiploj la jenon:

“En nia skolo la meditado signifas, ke ni fiksas nian atenton nek sur la menso, nek sur la pureco. Ni ankaŭ ne aprobas la senaktivecon. Koncerne ‘fiksi la atenton sur la menso’, la menso estas laŭnature iluziiĝema; kaj kiam ni scias, ke ĝi estas nur fantasmo, tiam estas tute ne necese fiksi la atenton sur ĝi. Koncerne ‘fiksi la atenton sur la pureco’, nia naturo estas propre pura, kial do necesas fiksi la atenton sur ĝi? Se ni senigas nin je ĉiuj iluziaj ideoj, tiam sin trovos nenio krom la pureco en nia naturo, ĉar estas la iluziaj ideoj, kiuj obskurigas *tatataon*. Se ni fiksas nin sur la purecon, tiam ni nur kreas alian iluzion, la iluzion pri pureco. Ĉar la iluzio havas nenian restejon, tial fiksi la atenton sur ĝi nature

estas iluzie. La pureco havas nek formon, nek aspekton, tamen iuj homoj penas doni al ĝi formon — peno, pri kiu ili eĉ pretendas, ke ĝi estas ia merito de ili atingita. Tenante tian opinion, tiuj homoj estas spirite prematajde ‘pureco’, kaj ilia Vera Naturo estas per tio obskurigita.

**§5-02**

“Miaj amikoj en la boneco, tiuj, kiuj trejnas sin por ‘Kvieteco’, devas, en sia kontakto kun diversaj homoj, ignori la kulpojn de aliaj en ĉiaj cirkonstancoj. Ili devas esti indiferentaj por alies pravo aŭ malpravo, merito aŭ malmerito, bono aŭ malbono, ĉar tia sinteno estas konforma al la ‘Kvieteco’ de la Vera Naturo.

“Miaj amikoj en la boneco, homo iluziita povas esti fizike kvieta, sed tuj kiam li malfermas sian buŝon, li kritikas aliajn kaj parolas pri iliaj pravoj aŭ malpravoj, fortaĵoj kaj malfortaĵoj, bonoj aŭ malbonoj; kaj sekve li devias de la ĝusta vojo. Tial, fiksi nian atenton sur nia propra menso aŭ nia pureco estas ankaŭ stumbliga ŝtono sur la Vojo.”

**§5-03**

La Patriarko en alia okazo predikis al la disĉiploj la jenon:

“Miaj amikoj en la boneco, kio do estas la termino ‘sidi en medito’? En nia Skolo ĝi signifas neniajn obstaklojn aŭ malhelpojn. Ekstere, neniaj pensoj devas esti kaŭzitaj de ĉiaj statoj, bonaj aŭ malbonaj: jen tio, kion ni nomas ‘sidi’; interne, ni devas vidi la konstantecon de nia Vera Naturo: jen ‘mediti’.

“Miaj amikoj en la boneco, kio do estas *djano* kaj *samadio*? *Djano* signifas esti libera de alkroĉiĝo al ĉiuj eksteraj objektoj, kaj *samadio* signifas atingi internan pacon. Se ni alkroĉiĝas al eksteraj objektoj, nia interna menso estos perturbita. Kiam ni estas liberaj de la alkroĉiĝo al eksteraj objektoj, la menso estos en paco. Nia Vera Naturo estas propre pura, kaj la kaŭzo, kial nia menso estas perturbita, kuŝas en tio, ke ni permesas al ni esti influataj de la cirkonstancoj, en kiuj ni estas. Tiu, kiu estas kapabla

teni sian menson neperturbita en ĉiuj cirkonstancoj, jam atingis la *samadion*.

**§5-04**

“Miaj amikoj en la boneco, esti libera de la alkroĉiĝo al ĉiuj eksteraj objektoj estas *djano*, kaj atingi internan pacon estas *samadio*. Kiam ni estas kapablaj trakti *djanon* kaj teni nian internan menson en *samadio*, tiam ni povas esti konsiderataj kiel jam atingintaj *djanon* kaj la *samadion*. La sutro *Bodisattva Sila* diras: ‘Nia Vera Naturo estas propre pura.’

“Miaj amikoj en la boneco, lasu do al ni de momento al momento vidi nian puran Veran Naturon, kaj lasu al ni daŭrigi nian praktikadon kaj atingi la budhecon per kaj por ni mem.”

# ĈAPITRO 6
# PENTO

## §6-01

Iufoje kunvenis granda amaso da kleruloj kaj ordinaruloj el Guangzhou, Shaozhou kaj aliaj lokoj por atendi, ke la Patriarko prediku al ili. La Patriarko do prenis la altan sidlokon kaj donis la jenan paroladon:

“Nu, miaj amikoj en la boneco, en la praktikado de budhismo, ĉio devas komenciĝi de nia Vera Naturo. De momento al momento lasu do al ni purigi nian propran menson per niaj propraj penoj, koni nian *darmakajaon* (sanskrite: *dharmakāya*; la darmo-korpo de la budho) kaj vidi la budhon en nia propra menso kaj savi nin mem per nia persona observo de la *ŝilaoj*. Se vi faras ĉion ĉi tion, via vizito al tiu ĉi loko ne estos vana. Ĉar vi venis de malproksime, la fakto de nia kunveno ĉi tie montras, ke sin trovas bona afineco inter ni. Nun bonvolu meti vin sur la dekstran genuon (laŭ la hinda maniero), kaj mi unue predikos pri la kvinobla *Darmakaja*-Incenso de la

Vera Naturo kaj poste mi donos al vi la ‘Senforman Penton’.” Kaj ĉiuj kunvenantoj falis sur la dekstran genuon.

**§6-02**

La Patriarko daŭrigas:

“La unua estas la *Ŝilaoj*-Incenso, kiu signifas, ke nia menso devas esti libera de infektoj de misagoj, malbono, envio, avareco, avido, kolero, rabemo, kaj murdo. Jen kial la nomo ‘*Ŝilaoj*’.

“La dua estas la *Samadi*-Incenso, kiu signifas, ke nia menso devas esti neperturbita en ĉiuj cirkonstancoj, favoraj aŭ malfavoraj. Jen kial la nomo ‘*Samadio*’.

“La tria estas la *Praĝna*-Incenso, kiu signifas, ke nia menso devas esti libera de ĉiaj malhelpoj, ke ni devas konstante introspekti nian Veran Naturon per saĝo, ke ni devas nin deteni de farado de ĉiaj specoj de malbonaj agoj, ke kvankam ni faras ĉiajn specojn de bonaj agoj, ni tamen ne devas lasi nian menson alkroĉiĝi al tiaj agoj, kaj ke ni devas esti respektemaj al niaj pli aĝaj familianoj, prizorgemaj al la pli junaj, kaj kompatemaj kaj helpemaj al la

senparencaj, mizeraj kaj malriĉaj. Jen kial la nomo ‘*Praĝnao*’.

“La kvara estas la Incenso de *Mokŝao*, kiu signifas, ke nia menso devas esti en tia absolute libera stato, ke ĝi alkroĉiĝas al nenio, kaj sin okupas nek pri bono, nek pri malbono, sendepende kaj libere de malhelpoj. Jen kial la nomo ‘*Mokŝao*’.

“La kvina estas la Incenso de *Mokŝa-Pariĝnanao* (sanskrite: *mokṣaparijñāna*; scio akirita pri la atingo de liberiĝo). Kiam nia menso alkroĉiĝas nek al bono, nek al malbono, ni devas nek nin teni je la malpleneco, nek resti en stato de inercio, nome, ni devas plivastigi nian studadon kaj plilarĝigi nian sciadon, por ke ni povu koni nian propran menson, ĝisfunde kompreni la principojn de la budhismo, esti afablaj al aliaj en la traktado kun ili, senigi nin je la ideo pri la ‘memo’ kaj tiu pri la ‘ekzistado’, kaj ekscii, ke ĝis la tempo, kiam ni atingos la bodion, la Vera Naturo devas resti ĉiam neŝanĝebla. Jen kial la nomo ‘*Moksa-Pariĝnanao*’.

“Miaj amikoj en la boneco, la bonodoro de tiu ĉi kvinobla Incenso trapenetras nian menson de interne, kaj ni ne devas serĉi ĝin de ekstere.

## §6-03

“Nun mi donos al vi la ‘Senforman Penton’, kiu estingos niajn pekojn faritajn en niaj pasinta, nuna kaj estonta vivoj, kaj purigos niajn karmojn de penso, parolo kaj ago.

“Miaj amikoj en la boneco, bonvolu sekvi min kaj kune ripetu kion mi diras:

“Ni, disĉiploj, preĝas, ke ni estu, de momento al momento, en niaj vivoj pasinta, nuna kaj estonta, liberaj de la infektoj de malklereco kaj iluzio. Ni pentas pri niaj pekoj kaj malbonaj agoj faritaj en malklereco kaj iluziiteco en la pasinteco. Se nur ili estus tuj estingitaj kaj neniam reestiĝus.

“Ni preĝas, ke ni estu, de momento al momento, en niaj vivoj pasinta, nuna kaj estonta, liberaj de la infektoj de aroganteco kaj malhonesteco. Ni pentas pri niaj pekoj kaj malbonaj agoj faritaj pro aroganteco kaj malhonesteco en la pasinteco. Se nur ili estus tuj estingitaj kaj neniam reestiĝus.

“Ni preĝas, ke ni estu, de momento al momento, en niaj vivoj pasinta, nuna kaj estonta, liberaj de la infektoj de envio kaj ĵaluzo. Ni pentas pri niaj pekoj

kaj malbonaj agoj faritaj en la envia aŭ ĵaluza spiritstato en la pasinteco. Se nur ili estus tuj estingitaj kaj neniam reestiĝus.

**§6-04**

"Miaj amikoj en la boneco, la ĉi-supra estas tio, kion ni nomas '*wuxiang chan hui*', t.e. senforma pento.

"Nu, kio do estas la signifo de *chan* kaj *hui*? *Chan* signifas konfesi la pasintajn pekojn, t.e. konfesi ĉiujn niajn pasintajn pekojn kaj malbonajn karmojn, kiaj estas malklero, iluzio, aroganteco, malhonesteco, envio, ĵaluzo ktp, por meti finon al ili ĉiuj. *Hui* signifas sin gardi kontraŭ estontaj pekoj. Ekkoninte la naturon de niaj pekoj, ni ĵurpromesas, ke de nun ni metos finon por ĉiam al ĉiuspecaj malbonoj faritaj sub iluzio, malklero, aroganteco, malhonesto, envio, ĵaluzo ktp, kaj neniam plu repekos. Jen kial tio estas nomata *chan hui*.

**§6-05**

"Pro malklero kaj iluziiĝo ordinaruloj scias nur senti bedaŭron pri siaj pasintaj pekoj, sed ne povas

sin deteni de repekado en la estonteco. Ĉar ili ne donas viglan atenton al sia estonta konduto, ili faros novajn pekojn antaŭ ol la pasintaj estas estingitaj. Tiuokaze, kiel do ni povus nomi tion ‘*chan hui*’?

“Miaj amikoj en la boneco, nun ke ni jam pentis pri niaj pekoj, lasu al ni fari kvar grandajn ĵurpromesojn. Aŭskultu do atente:

Ni ĵurpromesas savi la miriadojn da sentohavaj estaĵoj interne de nia menso.

Ni ĵurpromesas forigi la miriadojn da afliktoj interne de nia menso.

Ni ĵurpromesas lerni la sennombrajn metodojn de la Darmo en nia Vera Naturo.

Ni ĵurpromesas atingi la subliman budhecon de nia Vera Naturo.

**§6-06**

“Miaj amikoj en la boneco, nun ni ĉiuj jam deklaris nian ĵurpromeson savi la miriadojn da sentohavaj estaĵoj, sed kion tio signifas? Tio ne signifas, ke mi, Huineng, persone kapablas ilin savi.

“Miaj amikoj en la boneco, la sentohavaj estaĵoj interne de nia menso estas nenio alia, ol la iluziita menso, la trompema menso, la malbona menso, la envia kaj ĵaluza menso, la malica kaj venena menso, kaj similaj mensoj. Ĉiu el ili devas savi sin mem per sia propra Vera Naturo, ĉar nur tia savo estas vera savo.

“Nu, kion do signifas ‘savi sin mem per sia propra Vera Naturo’? Tio signifas la savon de la malklero, la iluziiĝo, la makuliĝo interne de nia menso per ĝustaj opinioj. Kun la helpo de la ĝustaj opinioj kaj *praĝna*-saĝo la obstakloj starigitaj de tiuj malkleraj kaj iluziitaj estaĵoj povas esti rompitaj, tiel ke ĉiu el ili povas savi sin mem per siaj propraj penoj. Lasu al la eraraj esti savitaj per la ĝusteco, al la iluziitaj per la eklumiĝo, al la malkleraj per la saĝo, al la malvirtaj per la virteco. Tia savo estas nomata vera savo.

**§6-07**

“Koncerne la ĵurpromeson ‘forigi la miriadojn da afliktoj interne de nia menso’, ĝi signifas la

anstataŭigon de nia nefidinda kaj iluzia pensado per la *praĝna*-saĝo de nia Vera Naturo.

“Koncerne la ĵurpromeson ‘lerni la sennombrajn metodojn de la Darmo en nia Vera Naturo’, ĝi signifas, ke sin trovas neniu vera lernado antaŭ ol ni povas vidi vizaĝ-kontraŭ-vizaĝe nian Veran Naturon, kaj antaŭ ol ni povas konformiĝi al la ortodoksa Darmo en ĉiuj okazoj. Jen la vera lernado.

“Koncerne la ĵurpromeson ‘atingi la subliman budhecon de nia Vera Naturo’, ĝi signifas, ke ni devas ĉiam esti kompatemaj al la ordinaruloj, sekvante la veran ortodoksan Darmon en ĉiuj okazoj, kaj senigante nin je iluzio sen alkroĉiĝo al vekiĝo. Kiam *praĝnao* leviĝas en nia menso de momento al momento, kaj la falseco estas forigita sen esti obsedata de la ideo pri la vero, tiam ni povos ekvidi nian budhonaturon, kaj la budheco estos tuj atingita.

“Ni devas ĉiam teni en la menso niajn kvar grandajn ĵurpromesojn kaj agi laŭ ili, ĉar per tio la ĵurpromesoj povos esti plifortigitaj.

**§6-08**

“Miaj amikoj en la boneco, ĉar ni ĉiuj jam faris la kvar grandajn ĵurpromesojn, nun lasu al mi instrui la ‘Senformajn Trioblajn Rifuĝojn’:

“Miaj amikoj en la boneco, ni prenu rifuĝon en la Eklumiĝo, ĉar ĝi estas la kulmino kiel de *praĝnao*, tiel ankaŭ de *punjao* (sanskrite: *puṇya*; bonaj agoj; merito; feliĉo). Ni prenu rifuĝon en la Ortodokseco, ĉar ĝi estas la plej bona maniero senigi nin je la deziroj. Ni prenu rifuĝon en la Pureco, ĉar ĝi estas la plej nobla kvalito de ĉiuj vivaj estaĵoj.

“Ekde nun, lasu al la iluminiĝinto esti nia instruanto kaj neniam akcepti *maraon* (sanskrite: *māra*; la personiĝo de malbono; malbona spirito; demono) kaj iun ajn herezulon kiel nian gvidanton. Tion ĉi ni devas konfirmi al ni mem per konstanta alvoko al la ‘Tri Juveloj’ de nia Vera Naturo, en kiuj, miaj amikoj en la boneco, mi konsilas al vi preni rifuĝon. Ili estas:

Budho, kiu staras por Eklumiĝo.

Darmo, kiu staras por Ortodokseco.

Samgo, kiu staras por Pureco.

**§6-09**

“Kiam nia menso prenas rifuĝon en la Eklumiĝo, ni estos liberaj de pensoj malbonaj kaj iluziaj, konos malpli da deziroj kaj pli da kontenteco, kaj ne plu estos katenitaj de avido kaj volupto. Tio estas konata kiel la kulmino de *praĝnao* kaj *punjao*.

“Kiam nia menso prenas rifuĝon en la Ortodokseco, ni estos ĉiam liberaj de eraraj opinioj, ĉar sen eraraj opinioj sin trovos nek egoismo, nek aroganteco, nek alkroĉiĝo, nek amligiteco. Tio estas konata kiel la plej bona maniero senigi nin je la deziroj.

“Kiam nia menso prenas rifuĝon en la Pureco, nia Vera Naturo ne estos makulita en ĉiaj cirkonstancoj de tedaj sensobjektoj, de amo, kaj de avido. Jen kio estas nomata la plej nobla kvalito de ĉiuj vivaj estaĵoj.

**§6-10**

“Praktiki la ‘Trioblan Rifuĝon’ en la maniero ĉi-supre menciita signifas preni rifuĝon en nia propra memo (t.e. en la persona propra Vera Naturo). Malkleraj personoj prenas la ‘Trioblajn Rifuĝojn’ tage kaj nokte,

sed ili ne komprenas tion ĉi. Se ili diras, ke ili prenas rifuĝon en la Budho, ĉu ili scias, kie Li estas? Kaj se ili ne povas vidi la Budhon, kiel do ili povas preni rifuĝon en Li? Ĉu tia aserto ne egalas malplenan parolon?

"Miaj amikoj en la boneco, ĉiu el vi devas konsideri kaj ekzameni tiun ĉi punkton por vi mem kaj ne lasas vian energion esti misuzata. La sutro klare diras, ke ni devas 'preni rifuĝon en la Budho interne de ni mem', anstataŭ 'preni rifuĝon en alia Budho'. Plie, se ni ne prenas rifuĝon en la Budho interne de ni mem, tiam sin trovas neniu alia loko por nia rifuĝo.

"Bone komprenante tiun ĉi punkton, ĉiu el ni devas preni rifuĝon en la 'Tri Juveloj' interne de nia menso. Interne, ni devas regi nian menson; ekstere, ni devas esti respektemaj al la aliaj. Jen la ĝusta maniero preni rifuĝon interne de ni mem.

**§6-11**

"Miaj amikoj en la boneco, ĉar ĉiu el vi jam prenis la Trioblan Rifuĝon, mi nun parolos al vi pri la Tri Korpoj de la Budho de nia Vera Naturo, por ke vi

povu vidi tiujn ĉi Tri Korpojn kaj klare ekkompreni nian Veran Naturon. Bonvolu atente aŭskulti kaj ripeti la jenon post mi:

Kun nia fizika korpo, ni prenas rifuĝon en la Pura *Darmakajao* de Budho.

Kun nia fizika korpo, ni prenas rifuĝon en la Perfekta *Sambogakajao* (sanskrite: *sambhogakāya*; manifestiĝo-korpo; la dua el la tri korpoj de budho) de Budho.

Kun nia fizika korpo, ni prenas rifuĝon en la Miriadoj da *Nirmanakajaoj* (sanskrite: *nirmāṇakāya*; enkarniĝo-korpo; transformiĝo de budho) de Budho.

**§6-12**

“Miaj amikoj en la boneco, nia fizika korpo povas esti similigita al gastejo (t.e. provizora loĝejo), tial ni ne povas preni rifuĝon tie. La Tri Korpoj de la Budho sin trovas interne de nia Vera Naturo kaj estas komuna al ni ĉiuj. Ĉar la menso de la ordinara persono funkcias en iluziiteco, li ne povas vidi sian propran internan naturon; kaj la rezulto estas, ke li ignoras la Tri-korpan Bodion interne de si kaj serĉas

ekstere la Tri-korpan *Tatagataon*. Nun ke vi jam aŭdis mian predikon, ĉiu el vi devas bone kompreni, ke la Tri-korpa Budho estas ĝuste en via Vera Naturo kaj neniel povas esti akirita de ekstere.

**§6-13**

"Nu, kio do estas la Pura *Darmakajao*? Nia Vera Naturo estas propre pura; la miriadoj da estaĵoj estas ĝiaj manifestiĝoj, kaj bonaj kaj malbonaj agoj estas nur la rezulto de bonaj kaj malbonaj pensoj respektive. Tial, ĉiuj estaĵoj originas en la Vera Naturo kaj estas propre puraj. Por fari komparon, la ĉielo estas ĉiam klara, la suno kaj la luno estas ĉiam brilaj; kiam ili estas kovritaj de pasantaj nuboj, tiam fariĝos brile nur supre kaj malhele sube. Sed tuj kiam la nuboj estas forblovitaj, la brileco reaperas kiel supre tiel ankaŭ malsupre, kaj la miriadoj da estaĵoj revidos la plenan lumon. La homa naturo ofte flosas, kiel la nuboj en la ĉielo.

"Miaj amikoj en la boneco, nia sagaco estas kiel la suno, kaj nia saĝo (*praĝnao*) kiel la luno. Ili ĉiam estas brilaj. Kiam ni alkroĉiĝas al eksteraj objektoj,

nia Vera Naturo estas nebuligita de malbonaj pensoj, kiuj malebligas al niaj sagaco kaj saĝo eligi sian lumon. Sed se ni estas sufiĉe feliĉaj trovi klerajn kaj piajn instruantojn, kiuj konigas al ni la Ortodoksan Darmon, tiam ni povas, per niaj propraj penoj, forigi la malkleron kaj la iluziitecon, tiel ke ni estas eklumigitaj interne kaj ekstere, kaj tiam la miriadoj da estaĵoj klare manifestiĝas interne de nia Vera Naturo. Tio signifas, ke ni jam vidas vizaĝ-kontraŭ-vizaĝe nian Veran Naturon. Jen kio estas nomata la Pura *Darmakajao* de Budho.

**§6-14**

“Miaj amikoj en la boneco, preni rifuĝon en nia Vera Naturo estas preni rifuĝon en la vera Budho. Tiu, kiu prenas tian rifuĝon, devas forigi el sia Vera Naturo la malbonan menson, la envian menson, la flatan kaj malhonestan menson, la egoismon, la trompemon kaj la mensogemon, la malestimon, la malhumilecon, la erarajn kaj herezajn opiniojn, la arogantecon, kaj ĉiujn aliajn malbonojn, kiuj povas estiĝi en ĉiu momento de la pasinteco, la nuno kaj la

estonteco. Preni rifuĝon en si mem estas ĉiam resti observema por siaj propraj eraroj, kaj sin deteni de kritikado de alies meritoj kaj malmeritoj. Tiu, kiu estas humila kaj modesta en ĉiuj okazoj kaj estas ĝentila kaj respektema al ĉiuj homoj, jam plene konas sian Veran Naturon, tiel plene, ke lia Vojo estas libera de pluaj obstakloj. Jen kio estas maniero preni rifuĝon en ni mem.

**§6-15**

"Kio estas la Perfekta *Sambogakajao*? Ĝi estas kiel lampo, kies lumo povas rompi la mallumon, kiu regis tie mil jarojn. Eĉ unu sola sparko de la saĝo de unu persono povas fini la malkleron, kiu daŭris jam dek mil jarojn. Ni ne bezonas ĉagreniĝi pro la pasinteco, ĉar la pasinteco jam forpasis kaj estas neriparebla. Kio postulas nian atenton, estas la estonteco; sekve lasu al niaj pensoj de momento al momento esti klaraj kaj perfektaj, kaj lasu al ni vidi vizaĝ-kontraŭ-vizaĝe nian originan naturon. La bono kaj la malbono estas kontraŭaj unu al la alia, sed ilia substanco ne estas dueca. Tiu ĉi nedueca naturo estas

nomata la efektiva naturo (t. e. la absoluta realeco), kiu povas esti nek makulita de malbono, nek infektita de bono. Jen kio estas nomata la Perfekta *Sambogakajao* de Budho.

"Kiam unu sola malbona penso leviĝas en nia Vera Naturo, tiam estingiĝas la bonaj meritoj akumulitaj dum miloj da *kalpaoj*; kiam unu bona penso estiĝas en nia Vera Naturo, tiam foriĝas la pekoj tiel multaj, kiel la sableroj en Gango, kaj reaperas la senegala bodio. Tial vidi nian propran Veran Naturon de momento al momento sen interrompo ĝis ni atingas la Subliman Eklumiĝon, kaj konstante esti en bona mensostato, estas la *Sambogakajao*.

**§6-16**

"Kio estas la Miriadoj da *Nirmanakajaoj*? Se ni ne pensas pri iu ajn el la sennombraj estaĵoj, tiam nia menso estas malplena. Se nur unu sola penso estiĝas, tiam tuj okazas transformiĝo. La pensado pri malbono transformas nian menson en inferon; la pensado pri bono ŝanĝas nian menson en ĉielon. Se ni estas malicaj kaj malamoplenaj, ni estas kiel malbona

drako kaj serpento. Kompataj pensoj transformas nin en bodisatvojn. La saĝo metas nin en la suprajn regnojn, dum la malklero sendas nin al la malsupraj regnoj. Nia Vera Naturo havas multajn transformiĝojn. La iluziitaj homoj ne scias pri tio. Ili konstante pensas malbonajn pensojn kaj ĉiam sekvas malbonan vojon. Se ili povas reveni al unu penso pri bono, *praĝnao* (saĝo) tuj leviĝos en ili. Jen kio estas nomata la *Nirmanakajao* de la Budho de nia Vera Naturo.

**§6-17**

"Miaj amikoj en la boneco, la *darmakajao* estas propre memsufiĉa. Vidi vizaĝ-kontraŭ-vizaĝe de momento al momento nian Veran Naturon estas la *Sambogakajao* de Budho. Koncentri nian menson sur la *Sambogakajao* (por ke la *praĝnao* aŭ saĝo leviĝu) estas la *Nirmanakajao*. Atingi la eklumiĝon per niaj propraj penoj kaj praktiki per ni mem la bonecon esence propran en nia Vera Naturo estas vera "preno de rifuĝo". Nia fizika korpo, kiu konsistas el karno, haŭto ktp, estas provizora loĝejo — ni ne povas preni rifuĝon en ĝi. Se ni nur konas la Tri Korpojn de la Budho de nia Vera Naturo, ni povos ekkoni la Budhon de nia Vera Naturo.

## §6-18

“Mi havas ĉanton pri ‘Senformeco’. La recitado kaj praktikado de ĝi tuj dispelos la iluziojn kaj estingos la pekojn akumulitajn dum sennombraj *kalpaoj*. Jen ĝi estas:

La iluziitaj homoj akumulas nur meritojn sed ne sekvas la Vojon.

Ili estas sub la impreso, ke akumuli la meritojn kaj sekvi la Vojon estas la sama afero.

Kvankam la farado de oferoj kaj la praktikado de malavareco donas senfinan meriton,

Tamen la tri venenaj elementoj (avido, kolero kaj iluzio) estiĝas interne de nia menso.

Ili esperas estingi siajn pekojn per akumulado de meritoj,

Ne sciante, ke la feliĉo akirota en la estontaj vivoj havas nenian rilaton al la estingiĝo de la pekoj.

Kial ne forigi la pekojn interne de nia propra menso?

Ĉiu ja devas fari veran penton interne de sia Vera Naturo.

**§6-19**

Tiu, kiu subite atingas veran penton laŭ la Mahajana Skolo,

Kaj tiu, kiu ĉesas faradi malbonon kaj honeste agas, estas libera de malbona karmo.

La praktikanto de la Vojo, kiu konstante observas sian Veran Naturon,

Povas esti en la sama kategorio kiel ĉiuj budhoj.

Niaj Patriarkoj transdonis neniun alian instruon, ol tiun ĉi Subitan Skolon.

Se nur ĉiuj sekvantoj de ĝi povus vidi sian Veran Naturon kaj tuj esti kun la budhoj!

Se vi intencas serĉi la *darmakajaon*,

Apartigu vin de *darmalakŝanao* (la formoj de darmo), kaj tiam via menso estos pura.

Penu por vidi vizaĝ-kontraŭ-vizaĝe la Veran Naturon, kaj ne estu malrapidema,

Ĉar la morto povas subite veni kaj meti abruptan finon al via vivo.

Tiuj, kiuj komprenas la mahajanan instruon kaj sekve kapablas ekkoni sian Veran Naturon,

Devas kunmeti la manplatojn sur la brusto (en signo de respekto) kaj fervore serĉi la *darmakajaon*.”

**§6-20**

Poste la Patriarko aldonis: “Miaj amikoj en la boneco, vi ĉiuj devas reciti tiun ĉi ĉanton kaj meti ĝin en praktikon. Se ĉe tio vi tuj vidas vian Veran Naturon, tiam ŝajnas, kvazaŭ vi estas ĉiam kun mi, kvankam efektive vi estas for de mi je mil lioj. Alie, eĉ se ni nin vidas vizaĝ-kontraŭ-vizaĝe, ni estas fakte apartigitaj unu disde la alia je mil lioj. Tiuokaze, kian utilon do havas la longa vojaĝo farita por veni ĉi tien de malproksime? Bone zorgu pri vi mem. Ĝis revido!”

Aŭdinte, kion la Patriarko diris, ĉiuj ĉeestantoj eklumiĝis. Ĝojplene ili akceptis la instruon kaj estis pretaj meti ĝin en sian praktikon.

# ĈAPITRO 7
# KELKAJ FAMAJ KONVERTIĜOJ

## §7-01

Kiam la Patriarko revenis al la vilaĝo Caohou (kie estis la templo Nanhua) en Shaozhou post sia heredo de la Darmo en Huangmei, li estis ankoraŭ persono en obskureco. Tiam iu konfuceano-klerulo nomata Liu Zhilüe donis al li varman akcepton kaj apartajn konsiderojn. Zhilüe havis onklinon, kiu estis bikŝuino nomata Wujinzang (Neelĉerpebla Trezorejo). Ŝi kutime recitis la sutron *Maha-Parinirvana* (sanskrite: *Mahāparnirvāṇa*).

Aŭdinte ŝian reciton dum nur mallonga tempo, la Patriarko jam ekkomprenis ĝian profundan signifon kaj komencis klarigi ĝin. Poste ŝi levis la libron kaj demandis lin pri la signifo de iuj ideografiaĵoj.

“Mi estas analfabeto,” li respondis, “sed se vi deziras scii la signifon, bonvolu demandi.”

“Kiel do vi povas kapti la signifon de la teksto,” ŝi redemandis, “se vi eĉ ne konas la ideografiaĵojn?”

Al tio ĉi li respondis: “La subtilaj kaj profundaj

instruoj de la budhoj havas nenian rilaton al la skribaĵoj.”

**§7-02**

Tiu ĉi respondo tre surprizis ŝin, kaj ŝi diris al ĉiuj piaj pliaĝuloj en la vilaĝo: “Tiu ĉi estas tre iluminiĝinta homo. Ni devas peti lin resti kaj konsenti ricevi ĉi tie liveratajn loĝon kaj nutron.”

Post tio, iu posteulo de la Imperiestro Wu de la dinastio Wei (t.e. Cao Cao, 155—220, la fondinto de la regno Wei, fama ŝtatisto kaj lirika poeto), nomata Cao Shuliang, kaj aliaj vilaĝanoj konkure venis fari omaĝon al la Patriarko. La malnova templo Baolin, ruinigita pro milito ĉe la fino de la dinastio Sui, estis rekonstruita de ili por la Patriarko. Post nelonge ĝi fariĝis fama templo.

Post naŭ monatoj kaj iom pli da tagoj, la malamikoj de la Patriarko ree trovis lin. Li do rifuĝis sur proksima monto. La persekutantoj metis fajron al la arbaro. La Patriarko kaŝis sin inter rokoj kaj sukcese eskapis. Iu roko tie havas la genu-postsignojn de la

Patriarko kaj ankaŭ la premsignon de lia robo, kaj pro tio ĝi estas nomata “Roko de Rifuĝo”.

Sekvante la instrukcion de sia majstro, la Kvina Patriarko, ke li devas halti ĉe Huai kaj sin kaŝi ĉe Hui (vd. §1-19), li faris tiujn ĉi du distriktojn (Huaiji kaj Sihui) lokoj de sia retiriĝo kaj de sia predikado.

**§7-03**

Iu bikŝuo nomata Fahai, indiĝeno de Qujiang de Shaozhou, ĉe sia unua intervidiĝo kun la Patriarko demandis pri la signifo de la fama diro “akiri la menson, akiri la budhecon”.

La Patriarko respondis: “Lasi neniun pasintan penson reaperi estas ‘akiri la menson’, lasi neniun venontan penson neniiĝi estas ‘akiri la budhecon’. Povi prezenti al si ĉiujn formojn estas ‘akiri la menson’; esti libera de ĉiuj formoj estas ‘akiri la budhecon’. Se mi donus al vi detalan klarigon, la temo ne povus elĉerpiĝi eĉ se mi uzus la tempon de unu tuta *kalpao*. Do aŭskultu mian *gataon*.

*Praĝnao* estas ‘akiri la menson’,

*Samadio* estas ‘akiri la budhecon’.

En praktikado, *praĝnao* kaj *samadio* devas funkcii kune;

Tiam niaj pensoj estos puraj.

Tiu ĉi instruo povas esti komprenata

Nur per via ‘kutimo de praktiko’.

*Samadio* funkcias, sed esence ĝi ne fariĝas.

Kune uzi *praĝnaon* kaj *samadion* estas la ĝusta praktiko.”

Aŭdinte kion la Patriarko diris, Fahai tuj eklumiĝis. Li laŭdis la Patriarkon per la jena *gatao*:

“Akiri la menson” ja estas “akiri la budhecon”!

Sed mi blindigus min, se mi ĝin ne komprenus.

Nun mi konas la principan kaŭzon de *praĝnao* kaj *samadio*;

Ilin ambaŭ mi praktikos por min liberigi de ĉiuj formoj.

**§7-04**

Troviĝis ankoraŭ unu bikŝuo Fada, indiĝeno de Hongzhou, kiu aliĝis al la Budhana Ordeno en sia frua aĝo de sep jaroj. Li kutime recitis la *Lotusan Sutron* (sanskrite: *Saddharmapuṇḍarīkasūtra*; unu el

la plej gravaj sutroj de la mahajana budhismo). Kiam li venis esprimi sian respekton al la Patriarko, li ne malaltigis sian kapon ĝis la tero.

La Patriarko riproĉis lin dirante: “Se salutante vi ne malaltigas vian kapon al la tero, tiam estus preferinde por vi tute ne fari saluton. Devas sin trovi io en via menso. Ĉu vi povas diri al mi, kion vi faras en via ĉiutaga praktikado?”

“Mi recitas la *Lotusan Sutron*,” respondis Fada. “Mi jam legis la tutan tekston je tri mil fojoj.”

“Se, leginte la sutron je dek mil fojoj,” rimarkis la Patriarko, “vi jam vere kaptus la signifon sen esti aroganta pri via plenumitaĵo, tiam vi devus esti sur la sama vojo (al la Budha vero), kiel mi. Kaj tamen tio, kion vi plenumis, jam faris vin malmodesta, kaj plie, vi ŝajne ne scias, ke tio estas eraro. Aŭskultu do mian *gataon*:

La celo de riverenco estas forigi arogantecon.
Kial do vi ne malaltigis vian kapon ĝis la tero?
Se vi havas ‘mi’ en vi, vi jam havas pekon;
Se vi forgesas viajn meritojn, vi havas feliĉon senkomparan.”

**§7-05**

Poste la Patriarko demandis: “Kia estas via nomo?”

“Fada,” estis la respondo.

“Via nomo estas Fada (kiu signifas ‘atingi la Darmon’), tamen vi efektive ne atingis ĝin.” Li do improvizis *gataon*:

Via nomo estas Fada (Darmo-atingo),

Kaj diligente kaj persiste vi recitas la sutron.

Lipa ripetado de la teksto nur sekvas la prononcadon,

Sed tiu, kies menso eklumiĝis kaptinte la signifon, ja estas bodisatvo.

Ĉar vi kaj mi havas komunan karmon,

Nun mi klarigos al vi tion ĉi.

Se vi kredas, ke la Budho senvorte parolas,

Tiam la Lotuso floros en via buŝo. (T.e.: vi povos diri la signifon aŭ la mesaĝon de la sutro *Lotuso de Bona Leĝo*.)

Aŭdinte la *gataon*, Fada sentis konsciencan riproĉon kaj petis pardonon. Li aldonis: “De nun mi estos humila kaj respektema en ĉiuj okazoj. Ĉar mi

ne bone komprenas la signifon de la sutro, kiun mi recitis, mi ofte konfuziĝas pri ĝia ĝusta interpreto. Kun via granda saĝo, ĉu Via Sankteco volus esti afabla kaj doni al mi mallongan klarigon?”

**§7-06**

La Patriarko respondis: “Ĉar via nomo estas ‘Fada’ aŭ ‘Darmo-atingo’, mi do diras ion pri la Darmo kaj vi. La Darmo estas tre klara, kaj estas nur via menso, kiu ne estas klara. La sutro estas libera de dubaj paragrafoj, kaj estas nur via menso, kiu faras ilin dubaj. Recitante la sutron, ĉu vi scias ĝian ĉefan celon?”

“Mi estas tiel mensobtuza kaj stulta,” respondis Fada, “ke mi scias nur laŭvorte reciti la tekston. Ĝia ĉefa mesaĝo ja estas super mia komprenpovo.”

La Patriarko respondis: “Bonvolu do reciti la sutron por mi, ĉar mi ne kapablas mem legi. Poste mi klarigos al vi ĝian signifon.”

Fada laŭte recitis la sutron, sed kiam li venis al la ĉapitro titolita “Paraboloj”, la Patriarko haltigis lin, dirante: “La ĉefa temo de tiu ĉi sutro estas

ekspliki la kaŭzon de enkarniĝo de la Budho en tiu ĉi mondo. Kvankam paraboloj kaj ilustroj estas sennombraj en tiu ĉi libro, tamen neniu el ili transpasas tiun ĉi centran punkton. Nu, kio do estas tiu kaŭzo? La sutro diras: ‘Estas pro la sola granda kaŭzo kaj por la sola celo, ke la respektegindaj budhoj aperas en tiu ĉi mondo.’ La sola granda kaŭzo, kiu estas menciita ĉi tie, estas nenio alia, ol la Budho-Saĝo.

**§7-07**

“La ordinaraj homoj alkroĉiĝas al la eksteraj objektoj; kaj interne, ili falas en la eraran ideon pri la ‘malpleneco’. Kiam ili povas liberigi sin de la alkroĉiĝo al objektoj en kontakto kun ili kaj liberigi sin de la erara opinio pri la ‘malpleneco’, tiam ili estos liberaj de iluzioj interne kaj ekstere. Tiu, kiu ekkomprenas tion ĉi kaj kies menso sekve eklumiĝas dum momento, estas konsiderata kiel jam malferminta siajn okulojn por la vido de la Budho-Saĝo.

“La vorto ‘budho’ estas ekvivalenta al ‘eklumiĝo’, kiu povas esti komprenata (kiel en tiu ĉi sutro) sub kvar kategorioj:

Malfermi la okulojn por la vido de la Budho-Saĝo.

Montri la eklumiĝon pri la Budho-Saĝo.

Vekiĝi al la eklumiĝo pri la Budho-Saĝo.

Identiĝi kun la eklumiĝo pri la Budho-Saĝo.

“Se vi povas, instruate, identiĝi kun la vero, tiam vi estas jam vekita al la Budho-Saĝo, kaj via Vera Naturo sin manifestas.

**§7-08**

“Vi ne devas misinterpreti la tekston kaj veni al la konkludo, ke la Budho-saĝo estas io speciala al la budho kaj ne komuna al ni ĉiuj pro tio, ke vi okaze trovis en la sutro tiujn ĉi vortojn ‘malfermi’, ‘montri’, ‘vekiĝi’ kaj ‘identiĝi’. Tia misinterpreto egalus kalumnion al la Budho kaj blasfemon al la sutro. Ĉar la budho jam estas dotita per tiu ĉi Saĝo, kian bezonon do li havas malfermi siajn okulojn por ĝi. Tial vi devas kredi, ke la Budho-Saĝo estas la Budho-Saĝo de via propra menso kaj ne tiu de iu ajn alia budho.

“Fermante sin for de sia propra lumo pro sia forta enamiĝo al sensobjektoj, ĉiuj sentohavaj estaĵoj, turmentate de la eksteraj cirkonstancoj kaj internaj ĉagrenoj, agas volonte kiel sklavoj de siaj propraj deziroj. Vidante tion ĉi, nia Sinjoro Budho estas devigita leviĝi de sia *samadio* (medito) por admoni ilin per diversmaniera, senlaca predikado, ke ili subpremu siajn dezirojn kaj detenu sin de serĉado de feliĉo de ekstere, por ke ili povu fariĝi egaluloj de budho. Jen kial la sutro diras: ‘Malfermu viajn okulojn por la vido de la Budho-Saĝo.’

**§7-09**

“Mi ankaŭ konsilas al ĉiuj homoj konstante teni siajn okulojn al la Budho-Saĝo interne de sia menso. Sed en sia perverseco la homoj en la mondo kutime faras pekojn en iluziiteco kaj malklero. Ili estas afablaj en siaj vortoj, sed estas malicaj en sia menso. Ili estas avidaj, malamemaj, enviaj, trompemaj, flatemaj, arogantaj, egoismaj, ofendemaj al aliaj homoj kaj detruemaj al senanimaj objektoj, kaj sekve ili malfermas siajn okulojn kutime por la saĝo de

‘ordinaraj homoj’. Se ili povas ĝustigi sian koron, tiel ke la saĝo konstante leviĝos, la menso estos sub introspekto, kaj la malbonfaroj estos anstataŭitaj de bonfaroj, tiam ili inicos sin en la Budho-saĝon.

“Kaj tial vi devas de momento al momento malfermi viajn okulojn, ne por la saĝo de ‘ordinaraj homoj’, sed por la supertera Budho-saĝo, kiu estas super la vulgareco, dum la unua estas de la homa mondo. Aliflanke, se vi alkroĉiĝas al la arbitra ideo, ke la nura recitado de la sutro kiel la ĉiutaga praktikado estas sufiĉe bona, tiam vi estas simila al la poefago, kiu enamiĝas al sia propra vosto.” (La poefago estas kredata havi narcisisman amon al sia vosto.)

**§7-10**

Fada do diris: “Se estas tiel, ni nur devas koni la signifon de la sutro kaj tiam ne estos necese por ni reciti ĝin. Ĉu prave?”

“En la sutro sin trovas nenio malutila,” respondis la Patriarko. “Kio do en ĝi malhelpus al vi ĝin reciti? Ĉu la sutro-recito lumigos vin aŭ ne, aŭ ĉu

profitigos vin aŭ ne, tute dependas de vi. Kiam vi recitas la sutron per via lango kaj metas ĝian instruon en efektivan praktikon, tiam vi ‘turnas’, se oni povas tiel diri, la sutron per via menso; kiam dum vi recitas ĝin sen meti ĝin en praktikon, tiam vi estas ‘turnata’ de la sutro. Aŭskultu do mian *gataon*:

Kiam nia menso estas sub iluzio, la Lotuso (t.e. la sutro Lotuso de Bona Leĝo) ‘turnas’ nin.

Kun eklumigita menso ni ‘turnas’ la Lotuson anstataŭe.

Recitadi la sutron de tempo al tempo sen scii ĝian ĉefan instruon,

Indikas, ke vi estas nekonato al ĝia signifo.

La ĝusta maniero estas sen alkroĉiĝo al pensoj;

Alie, la maniero estas erara.

Tiu, kiu estas super ‘alkroĉiĝo’ kaj ‘ne-alkroĉiĝo’,

Konstante veturas en la ĉaro de Blanka Bovo (t.e. la Veturilo de Budho).”

**§7-11**

Aŭdinte tiun ĉi *gataon* Fada eklumiĝis kaj kortuŝiĝis ĝis larmoj. “Estas tre vere,” li ekkriis, “ke

ĝis nun mi ne povis ‘turni’ la sutron. Kontraŭe, estis la sutro, kiu ‘turnis’ min.”

Li do metis ankoraŭ unu demandon: “La sutro diras, ke ‘ekde la *ŝravakaoj* (sanskrite: *śrāvaka*; la aspiranto al la arahanteco; la vorto *ŝravakao* origine uzata por nomi la disĉiplon de la Budho, kiu povis aŭdi Liajn instruojn, nome la hinajanan sekvanton de budhismo) kaj la *pratjekabudaoj* (sanskrite: *pratyekabuddha*; tiu, kiu atingis la staton de liberiĝo sen sin apogi sur instruanto, sekvante naturan inklinon; tiu, kiu atingis eklumiĝon per sin-kulturado) ĝis la bodisatvoj, eĉ se ili spekulativadus per kunaj penadoj, ili ne povus kompreni la Budho-saĝon’. Sed nun vi instruas, ke se ordinara homo ekkonas sian propran menson, li certe povos atingi la Budho-saĝon. Mi timas, Via Sankteco, ke escepte de tiuj dotitaj per neordinara menskapablo, oni povos dubi kaj kalumnii tiun ĉi instruon. Krome, tri specoj de ĉaroj estas menciitaj en la sutro, nome, ĉaroj tirataj de kaproj (t. e. la veturiloj de *ŝravakaoj*), ĉaroj tirataj de cervoj (t. e. la veturiloj de *pratjekabudaoj*), kaj ĉaroj tirataj de ordinaraj bovoj (t. e. la veturiloj de bodisatvoj). Kiel

do tiuj ĉi estas distingitaj disde la ĉaroj tirataj de blankaj bovoj? Volu do, Via Sankteco, esti afabla kaj doni al mi klarigon.”

**§7-12**

La Patriarko respondis: “La sutro estas tre klara rilate tiun ĉi punkton; estas vi, kiu miskomprenas ĝin. La kaŭzo, kial la *ŝravakaoj*, la *pratjekabudaoj* kaj la bodisatvoj ne povas eklumiĝi al la Budho-saĝo estas ĝuste pro tio, ke ili spekulativas pri ĝi. Ili vane kunigas siajn penojn por spekulativi, sed ju pli ili spekulativas, des pli fore ili estas de la vero. Malgraŭ ĉio, la Budho Ŝakjamunio predikis tiun ĉi sutron al la ordinaraj homoj, ne al aliaj budhoj. Koncerne tiujn, kiuj ne povis akcepti la doktrinon, kiun Li eksplikis, Li lasis al ili forlasi la kunvenon. Ili ŝajne ne sciis, ke veturante sur la ĉaro tirata de blanka bovo (t. e. la Veturilo de Budho), ili nenecese serĉas la aliajn tri veturilojn post eliro el sia ĉaro. Cetere, la sutro klare diras al vi, ke sin trovas nur la unusola Budha Veturilo; kaj ke ekzistas neniu alia, kiu povus esti la budha, kia estas dua aŭ tria. Tiuj ĉi estas uzataj, kiel

la aliaj sennombraj oportunaj rimedoj, kaŭzo-kaj-efikaj klarigoj, paraboloj ktp, por prediki la veron pri la sola Budha Veturilo. Kial do vi povas ne kompreni?

**§7-13**

"La aliaj tri veturiloj estas neefektivaj, sed oportunaj rimedoj por la instruado en la pasinteco, dum la Veturilo de Budho estas efektiva, la absoluta, uzata por la instruado en la nuna tempo. La sutro instruas al vi senigi vin je la neefektivaĵoj kaj vin apogi nur sur la Vero. Kaj vin apogante sur la Vero, vi trovos, ke eĉ la Vero havas nenian nomon. Vi devas scii, ke vi estas la sola posedanto de tiuj ĉi valoraĵoj kaj ke ili ĉiuj estas tute sub via dispono. Kiam vi estas libera de la arbitra ideo, ke ili estas por la bono de viaj gepatroj aŭ de viaj filoj, aŭ ke ili povas esti sub la dispono de iu alia, tiam vi jam ellernos la ĝustan manieron por praktiki la *Lotusan Sutron*. Tiuokaze, de *kalpao* al *kalpao* la sutro estos en via mano, kaj de mateno ĝis nokto vi ĉiam recitados la sutron."

Profunde inspirite de la instruo de la Patriarko, Fada estis plena de ĝojego. Li laŭdis la Patriarkon per la jena *gatao*:

La iluzio, ke mi atingis grandajn meritojn per trimil-foja recitado,

Estis dispelita nur per unu frazo de la Majstro el Caoxi (t.e. la Patriarko, kies templo estis en Caoxi).

Tiu, kiu ne komprenas la celon de la enkarniĝo de la Budho en tiu ĉi mondo,

Ne povas subpremi la pasiojn akumulitajn en siaj multaj vivoj antaŭaj.

La tri veturiloj respektive tirataj de kaproj, cervoj kaj ordinaraj bovoj, estas nur oportunaj metaforoj,

Per kiuj la Darmo de la tri stadioj, la Prepara, la Intera, kaj la Fina, estas lerte eksplikita.

Kiu povus scii, ke interne de la brulanta domo mem (t.e. tiu ĉi mondo suferoplena)

Ja povas esti trovita la Reĝo de Darmo!

La Patriarko do diris al li, ke de nun li povos nomi sin ‘sutro-recitanta bikŝuo’. Post tiu intervidiĝo Fada kapablis kapti la profundan signifon de la budhismo, kaj tamen li ankoraŭ daŭrigis la recitadon de la sutro kiel antaŭe.

**§7-14**

La bikŝuo Zhitong, indiĝeno de Anfeng de Shouzhou, jam legis la sutron *Lankavatara* preskaŭ mil fojojn, sed li ankoraŭ ne komprenis la signifon de la Tri Korpoj kaj la Kvar *Praĝnaoj*. Tial li venis al la Patriarko por peti la klarigon.

"Koncerne la Tri Korpojn," klarigis la Patriarko, "la Pura *Darmakajao* estas via naturo, la Perfekta *Sambogakajao* estas via saĝo kaj la Miriadoj da *Nirmanakajaoj* estas viaj agoj. Se vi parolas pri tiuj Tri Korpoj aparte de la Vera Naturo, tiam sin trovos 'korpoj sen saĝo'. Se vi ekscias, ke tiuj ĉi Tri Korpoj havas neniun sian propran pozitivan esencon (ĉar ili estas nur la ecoj de la Vera Naturo), vi jam atingos la bodion de la Kvar *Praĝnaoj*. Aŭskultu do mian *gataon*:

La Tri Korpoj estas esence propraj en nia Vera Naturo,

Dank' al kies disvolviĝo la Kvar *Praĝnaoj* sin manifestas.

Sekve, sen fermi viajn okulojn kaj orelojn por deteni vin de la ekstera mondo,

Vi povos atingi rekte la budhecon.

Nun ke mi jam klarigas tion ĉi al vi,

Firme kredu ĝin, kaj vi estos por ĉiam libera de iluzioj.

Ne sekvu tiujn, kiuj serĉas la eklumiĝon de ekstere

Kaj ĉiam vane parolas pri la bodio (sen meti ĝin en praktikon).”

**§7-15**

“Ĉu mi povus scii ion pri la kvar *praĝnaoj*?” demandis Zhitong.

“Se vi komprenas la Tri Korpojn,” respondis la Patriarko, “vi devos kompreni ankaŭ la Kvar *Praĝnaojn*; sekve via demando ne estas necesa. Se vi parolas pri la Kvar *Praĝnaoj* aparte de la Tri Korpoj, tiam sin trovus *praĝnaoj* sen korpoj, kaj tiuokaze ili ne estus *praĝnaoj*.” La Patriarko do donis ankoraŭ alian *gataon*:

La Saĝo de Ronda Spegulo nature estas pura.

La Saĝo de Egaleco liberigas la menson de ĉiuj malsanoj.

La Ĉiopercepta Saĝo vidas estaĵojn intuicie, sen distingi kialon,

La Ĉioplenuma Saĝo estas identa kun la Ronda Spegulo de Saĝo.

La kvin *viĝnanaoj* (la kvin *viĝnanaoj*: konscioj dependantaj respektive de la kvin sensorganoj) kaj la oka *viĝnanao*, kune kun la sesa kaj la sepa, estas transformitaj per rezultoj kaj kaŭzoj.

Tiuj transformoj estas ŝanĝiĝoj nur en nomo, ne en esenco.

Se vi povas esti libera de la alkroĉiĝo al la sensobjektoj dum tiuj transformiĝoj okazas,

Vi por ĉiam restos en la ripetataj leviĝoj de *Naga-Samadio* (sanskrite: *nāgasamādhi*; tre ekstaza stato kvazaŭ de gaje saltanta drako).

(Originala noto: La supraj apartenas al la transformiĝoj de *viĝnanao* en *praĝnao*. Laŭ la instruoj, la unuaj kvin *viĝnanaoj* estas transformitaj en la Ĉioplenuman Saĝon, la sesa *viĝnanao* en la

Ĉioperceptan Saĝon; la sepa *viĝnanao* en la Saĝon de Egaleco; la oka *viĝnanao* en la Saĝon de Ronda Spegulo. Kvankam la sesa kaj la sepa *viĝnanaoj* estas transformitaj en la stadio de kaŭzo, la unuaj kvin kaj la oka *viĝnanaoj* estas transformitaj en la stadio de rezulto. Tio, kio estas transformita, estas nur iliaj nomoj, sed la substanco restas la sama.)

**§7-16**

Aŭdinte tion ĉi Zhitong subite ekkonis la *praĝnaon* de sia Vera Naturo kaj submetis al la Patriarko la jenan *gataon*:

La tri Korpoj origine estas interne de nia Vera Naturo.

Kiam nia menso estas eklumigita, la kvar *praĝnaoj* aperas en ĝi.

Kiam la Korpoj kaj *Praĝnaoj* estas absolute identaj unuj kun la aliaj,

Ni povas konformiĝi al la objektoj de ĉiaj formoj.

Se vi volas praktiki la Tri Korpojn kaj la Kvar *Praĝnaojn*, tiu ĉi volo estas iluzio.

Se vi volas teni ilin, tiu ĉi teno ne estas la vera esenco.

Dank' al via mirinda instruo mi nun povas kapti la profundecon de ilia signifo,

Kaj de nun mi neniam plu estos makulita de iliaj falsaj kaj arbitraj nomoj.

**§7-17**

La bikŝuo Zhichang, indiĝeno de Guixi de Xinzhou, aliĝis al la Budhana Ordeno en sia infaneco kaj estis fervora en sia penado ekkoni la Veran Naturon. Iun tagon li venis por fari omaĝon al la Patriarko.

La Patriarko demandis lin: "De kie vi venas kaj kion vi volas?"

"Lastatempe mi vizitis la monton Blanka Kresto en Hongzhou," li respondis, "por intervidiĝi kun la Majstro Datong, kiu sufiĉe bone instruis al mi kiel koni la Veran Naturon kaj atingi per tio la budhecon. Sed ĉar mi ankoraŭ havas kelkajn dubojn, mi vojaĝis de malproksime por esprimi al vi mian respekton kaj petas vian Sanktecon favori min per klarigo."

**§7-18**

“Kiajn instruojn li donis al vi? Diru al mi iom,” demandis la Patriarko.

Zhichang respondis: “Post trimonata restado tie sen ricevi ian ajn instruon, mi, fervora por la darmo, iris sola al lia ĉambro iun nokton kaj demandis lin, kia estas mia Vera Naturo.’ ‘Ĉu vi vidas la malplenan spacon? li demandis. ‘Jes, mi vidas,’ mi respondis. ‘Ĉu la malplena spaco havas ian formon?’ li ree demandis. ‘La malplena spaco estas senforma, sekve ĝi havas nenian formon,’ mi respondis. Li do klarigis: ‘Via Vera Naturo estas ĝuste kiel la malplena spaco. Konstati, ke nenio povas esti vidata, estas “Ĝusta Opinio”, kaj konstati, ke nenio estas sciebla, estas “Vera Scio”. Kiam vi vidas nek verdon nek flavon, nek longon nek mallongon, tiam via bodio estas perfekta kaj klara kaj vi jam “ekkonis la Veran Naturon kaj per tio atingis la budhecon” aŭ jam “atingis la Budho-saĝon”. Kvankam mi aŭdis tiun ĉi instruon, mi tamen havas ankoraŭ kelkajn dubojn. Mi petas, ke Via Sankteco estu tiel afabla kaj eklumigu min.”

**§7-19**

“Lia instruo indikas,” diris la Patriarko, “ke li ankoraŭ konservas la arbitrajn konceptojn pri ‘opinioj’ kaj ‘scioj’. Tio klarigas, kial li ne sukcese plene komprenigis vin. Aŭskultu do mian *gataon*.

Konstati, ke nenio povas esti vidata, sed konservi la koncepton pri ‘nevidebleco’,

Estas kiel la supraĵo de la suno obskurigita de pasantaj nuboj.

Konstati, ke nenio estas sciebla, sed konservi la koncepton pri ‘nesciebleco’,

Povas simili klaran ĉielon, kiu estigas ekbrilon de fulmo.

Lasi tiujn ĉi arbitrajn konceptojn spontanee leviĝi en via menso,

Indikas, ke vi miskomprenas vian Veran Naturon kaj ke vi ankoraŭ ne trovis la lertan rimedon ekkoni ĝin.

Se vi ekscias, eĉ dum momento, ke tiuj ĉi arbitraj konceptoj estas eraraj,

Via propra spirita lumo povos daŭre brili.”

**§7-20**

Aŭdinte tion ĉi, Zhichang tuj sentis, ke lia menso estas eklumigita. Li do submetis al la Patriarko la jenan *gataon*:

Lasi la konceptojn pri “nevidebleco” kaj “nesciebleco” spontanee leviĝi en la menso

Estas serĉi bodion sen liberigi sin de la arbitraj konceptoj pri fenomenoj.

Tiu, kiu havas la plej malgrandan impreson “mi nun estas eklumigita”,

Estas neniel pli bona, ol kia li estis tiam, kiam sub iluzio.

La Vera Naturo estas la fonto de la eklumiĝo;

Ĝi vane drivos (t.e. suferos de la senĉesa ciklado de morto kaj renaskiĝo), se vi sekvas la ŝanĝiĝantan fluon de perceptoj.

Se mi ne metus min sub la sanktecon de la Patriarko por ricevi ties instruon,

Mi estus konfuzita ne konante la ĝustan vojon irendan.

**§7-21**

Iun tagon Zhichang demandis la Patriarkon: “La Budho predikis la doktrinon pri ‘Tri Veturiloj’ kaj ankaŭ tiun pri ‘Plejsupera Veturilo’. Ĉar mi ne komprenas tion ĉi, bonvolu fari por mi klarigon.”

La Patriarko respondis: “Vi devas introspekti vian propran menson kaj agi sendepende de la ekstera *darmalakŝanao*. La distingo de tiuj kvar veturiloj ekzistas ne en la Darmo mem, sed en la diferencigo de homaj mensoj. Vidi, aŭdi kaj reciti la sutron estas la Malgranda Veturilo. Koni la Darmon kaj kompreni ĝian signifon estas la Meza Veturilo. Meti la Darmon en efektivan praktikon estas la Granda Veturilo. Funde kompreni ĉiujn doktrinojn, havi ilin ĉiujn sub sia dispono, esti libera de ĉiaj infektoj kaj ĉia alkroĉiĝo, esti super *darmalakŝanao* kaj esti en posedo de nenio, estas la Plejsupera Veturilo.

“Ĉar la vorto ‘cheng’ (乘) signifas ‘veturilon’, kiu sugestas ‘moviĝi’, nome ‘meti ion en praktikon’, tial diskuto pri tiu ĉi punkto estas tute nenecesa. Ĉio dependas de mempraktikado, sekve vi ne bezonas

min plu demandi. Sed mi devas atentigi vin, ke la Vera Naturo ĉiam estas en la stato de ‘*tatatao*’ (tieleco).”

Zhichang profunde riverencis kaj dankis la Patriarkon. Ekde tiu tempo li servis ĉe la Patriarko ĝis ties morto.

**§7-22**

La bikŝuo Zhidao, indiĝeno de Nanhai de Guangzhou, venis al la Patriarko por instruo. Li diris: “De kiam mi aliĝis al la Budhana Ordeno, mi legadis la sutron *Maha Parinirvana* dum pli ol dek jaroj, sed mi ankoraŭ ne kaptis ĝian esencan signifon. Ĉu vi povus bonvole doni al mi instruon, Via Moŝto?”

“Kiun parton de ĝi vi ne komprenas?” demandis la Patriarko.

“Estas tiu ĉi parto: ‘Ĉiuj estaĵoj estas nepermanentaj, kaj sekve ili apartenas al la Darmo de Estiĝo kaj Malestiĝo. Kiam la Estiĝo kaj la Malestiĝo ambaŭ ĉesas funkcii, la feliĉego de Perfekta Kvieteco (t. e. Nirvano) leviĝas.’”

“Kio do dubigas vin?” demandis la Patriarko.

**§7-23**

“Ĉiuj vivaj estaĵoj havas du korpojn — la fizika korpo kaj la *darmakajao* (la darmo-korpo),” respondis Zhidao. “La unua estas nepermanenta, kaj ĝi ekzistas kaj mortas. La dua estas permanenta, kaj ĝi ne scias, nek sentas. La sutro diras: ‘Kiam la Estiĝo kaj la Malestiĝo ambaŭ ĉesas funkcii, la feliĉego de Perfekta Kvieteco leviĝas.’ Mi ne scias, kiu korpo ĉesas ekzisti kaj kiu korpo ĝuas la feliĉegon. Ĝi ne povas esti la fizika korpo, kiu ĝuas, ĉar kiam ĝi mortas, la Kvar Elementoj (la materialaj elementoj, el kiuj ĉiuj ekzistaĵoj estas faritaj, t.e. la tero, la akvo, la fajro kaj la aero; tiu ĉi esprimo iafoje uzata por aludi la homan fizikan korpon) diseriĝas, kaj la diseriĝo estas pura suferado, la rekta malo de feliĉego. Se ĝi estas la *darmakajao*, kiu ĉesas ekzisti, ĝi estos en la sama stato kiel ‘senanimaj’ objektoj, kiaj estas la herboj, la arboj, la ŝtonoj ktp; tiam kiu do estos la ĝuanto?

“Cetere, la naturo de la darmo estas la enkorpiĝo de ‘Estiĝo kaj Malestiĝo’, kio manifestiĝas kiel la kvin *skandaoj* (t.e. formo, percepto, konscio, ago, kaj

scio). Alivorte, kun enkorpiĝo sin trovas kvin funkcioj. La procezo de ‘Estiĝo kaj Malestiĝo’ estas eterna. Kiam la funkcio ‘leviĝas’ el la enkorpiĝo, ĝi estiĝas; kiam la funkcio estas ‘sorbita’ returne en la enkorpiĝon, ĝi ĉesas ekzisti. Se la reenkarniĝo estas lasita fariĝi, tiam sin trovos nenia fino al la ŝanĝiĝo, kiel en la okazo de la sentohavaj estaĵoj. Se la reenkarniĝo ne estas ebla, tiam la estaĵoj restos por ĉiam en la stato de senviva substanco, kiel la senanimaj objektoj. Se estas tiel, tiam ĉiuj darmoj estos limigitaj de Nirvano kaj eĉ la ekzistado neeblos al ĉiuj estaĵoj; kia feliĉego tiam povus sin trovi?”

**§7-24**

“Vi estas filo de la Budho, bikŝuo,” diris la Patriarko, “kial do vi adoptas la erarajn opiniojn de la herezuloj pri la eterneco kaj neniiĝo kaj kuraĝas kritiki eĉ la doktrinon de la Plejsupera Veturilo?

“Via argumento sugestas, ke krom fizika korpo sin trovas ankaŭ darma korpo (*darmakajao*); kaj ke ‘Perfekta Kvieteco’ povas esti serĉata ekster “Estiĝo kaj Malestiĝo’. Kaj plie, el la aserto ‘Nirvano estas

eterna feliĉego' vi induktas, ke devas sin trovi iu homo ĝin spertanta.

"Tiuj ĉi ja estas la eraraj opinioj, kiuj faras la homojn avidaj je sensata ekzisto kaj dronigas homojn en teraj plezuroj. Estas tiuj homoj, la viktimoj de iluzio, kiuj identigas la kuniĝon de la kvin *skandaoj* kiel la 'memon' kaj rigardas ĉion alian kiel 'ne-memon' (laŭvorte: eksteraj sensobjektoj); kiuj avidas je la individua ekzistado kaj havas malinklinon al la morto; kiuj drivas en la senfina fluo de falsaj pensoj sen koni la malplenecon de la surtera ekzistado, kiu estas nur sonĝo aŭ iluzio; kiuj devigas sin elporti nenecesajn suferojn ligante sin al la rado de renaskiĝado; kiuj erare prenas la staton de la eterna ĝojo de Nirvano por ia maniero de suferado; kaj kiuj ĉiam serĉas sensajn plezurojn. Estas ĝuste por tiuj homoj, ke la kompatema Budho instruas pri la vera feliĉego de Nirvano.

"En iu ajn momento, Nirvano havas nek la fenomenon de Estiĝo, nek tiu de Malestiĝo, nek eĉ la ĉeson de la funkcio de Estiĝo kaj Malestiĝo. Ĝi estas la manifestiĝo de 'Perfekta Kvieteco'; sed en la

tempo de tiu manifestiĝo ne sin trovas eĉ koncepto pri ia manifestiĝo, kaj tial tio estas nomata ‘Eterna Feliĉego’, kiu havas nek ĝuanton, nek neĝuanton, kaj sekve sin trovas neniu afero tia, kia estas ‘unu substanco kaj kvin funkcioj’ (kiel vi asertas). Vi ja kalumnias la Budhon kaj blasfemas la darmon tiam, kiam vi diras, ke sub la limigo de Nirvano la ekzisto estas neebla al ĉiuj estaĵoj.

**§7-25**

“Aŭskultu do mian *gataon*:

La superega *Maha Parinirvana*

Estas perfekta, permanenta, kvieta, kaj lumiganta.

Homoj ordinaraj kaj malkleraj nomas ĝin ‘morto’,

Dum herezuloj arbitre opinias, ke ĝi estas ‘neniiĝo’.

Tiuj, kiuj apartenas al la veturilo de *ŝravakaoj* aŭ la veturilo de *pratjekabudaoj*,

Rigardas ĝin kiel ‘Ne-agadon’.

Ĉiuj ĉi tiuj konceptoj estas nur spiritaj spekulativoj

Kaj formas la bazon de la sesdek du eraraj opinioj.

Ĉar ili estas nur fikciaj nomoj elpensitaj por la okazo,

Ili havas nenian rilaton al la Absoluta Vero.

**§7-26**

Nur tiuj, kiuj havas super-eminentan menson,

Povas funde kompreni, kio estas Nirvano, kaj preni la sintenon nek de alkroĉiĝo, nek de indiferenteco kontraŭ ĝi.

Ili konas ‘la kvin *skandaojn*’

Kaj la tiel nomatan ‘egoon’ leviĝantan el la kuniĝo de tiuj kvin *skandaoj*.

Ili rigardas ĉiujn eksterajn objektojn kaj formojn,

Kaj la diversajn fenomenojn de sono kaj voĉo,

Kiel egalajn al sonĝoj aŭ iluzioj.

Ili faras nenian distingon inter la homo saĝa kaj la homo ordinara,

Nek havas arbitran koncepton pri Nirvano.

Ili estas super la du ekstremoj (la eterneco kaj la nenieco) kaj rompas la obstaklon inter la tri tempoj (la pasinteco, la nuno kaj la estonteco).

**§7-27**

Ili uzas siajn sensorganojn kiam la okazo postulas,

Sed la koncepto pri la ‘uzo’ ne leviĝas en ili.

Ili povas fari distingon inter ĉiuj darmoj,

Sed la koncepto pri ‘distingo’ ne leviĝas.

Eĉ dum la kataklisma fajro en la fino de *kalpao*, kiam oceanfundo brulsekiĝas,

Aŭ, dum la blovado de la katastrofaj ventoj, kiam unuj montoj ŝancelas aliajn,

La vera kaj eterna feliĉego de ‘Perfekta Kvieteco’

De Nirvano restas en la sama stato kaj ne ŝanĝiĝas.

Ĉi tie, mi provas priskribi ion, kio estas neesprimebla,

Por ke vi povu senigi vin je viaj eraraj opinioj.

Se vi ne interpretas miajn parolojn laŭlitere,

Vi eble povos lerni iom el la signifo de Nirvano.”

Aŭdinte tiun ĉi *gataon*, Zhidao estis ege eklumigita. Plena de ĝojo li riverence salutis la Patriarkon kaj foriris.

## §7-28

La bikŝuo Xingsi, zenisma majstro, naskiĝis al Liu-familio en Ancheng de Jizhou. Aŭdinte, ke la predikado de la Patriarko jam eklumigis grandan nombron da homoj, li tuj alvenis al Caoxi por prezenti sian omaĝon al la Patriarko kaj demandis lin:

“Kion ni devus praktiki, por ke nia progreso ne estu limigita al certa stadio?”

“Kiaspecan praktikon do vi faris?” demandis la Patriarko.

“Mi ne praktikis eĉ la Noblajn Verojn (t.e. la plej gravaj kaj fundamentaj doktrinoj de Ŝakjamunio).”

“En kia stadio de progreso vi nun estas?” demandis la Patriarko.

“Ĉar mi ne praktikis eĉ la Noblajn Verojn, kiu stadio do sin trovus, en kiu mi povus esti?” li replikis.

Profunde impresita de lia respondo, la Patriarko faris lin la ĉefbonzo.

Iun tagon la Patriarko diris al li, ke li devos disvastigi la Darmon en sia propra regiono, por ke la instruo ne venu al fino.

Kun la Darmo transdonita de la Patriarko li revenis al la monto Qingyuan en sia naskiĝregiono. Li disvastigis ĝin kaj eternigis la instruon de la Sesa Patriarko. Post sia morto li ricevis la titolon "Zenisma Majstro Hongji" (kies signifo estas "helpi disvastigi la Darmon").

**§7-29**

La bikŝuo Huairang, zenisma majstro, naskiĝis al Du-familio en Jinzhou. Ĉe sia unuafoja vizito al la Imperia Instruisto Hui'an en la Song-monta regiono li estis kondukita de tiu al Caoxi por intervidiĝi kun la Patriarko. Alveninte tien li faris kutiman saluton al la Patriarko, kiu demandis lin:

"De kie (vi venas)?"

"De la monto Song," li respondis.

"Kio (venas)? Kaj kiel?" demandis la Patriarko.

"Diri, al kio similas tiu 'kio', estas ĝuste eraro," li respondis.

"Ĉu tio estas pruvebla per praktikado?" daŭrigis la Patriarko.

"Pruveblo neas Neniecon; makuliĝo kaj infektiĝo malebligas atingon," estis la respondo.

**§7-30**

Ĉe tio la Patriarko rimarkis: “Ĝuste tiu ĉi seneco de makuliĝo kaj infektiĝo estas gardata kaj protektata de ĉiuj budhoj. Tiele estas por vi, kaj ankaŭ por mi. La hinda patriarko Prajnatara (sanskrite: *Prajñātāra*) antaŭdiris: ‘El inter viaj disĉiploj aperos iu similanta fortikan ĉevalon, kiu trete tragalopos la tutan mondon.’ Vi ne bezonos interpreti tiun ĉi orakolon tro baldaŭ, ĉar la respondo devos esti trovita interne de via menso.”

Eklumiĝinte Huairang tuj kaptis la signifon de tio, kion diris la Patriarko. De tiam li restis kaj servis ĉe la Patriarko dek kvin jarojn. Dum tiu tempodaŭro lia atingo en la praktikado pliprofundiĝis kun ĉiu tago. Poste li ekloĝiĝis apud la monto Hengshan, kie li disvastigis la instruon de la Patriarko. Post sia morto li estis titolita “Zenisma Majstro Dahui” (kies signifo estas “Granda Saĝo”) per imperiestra dekreto.

**§7-31**

La zenisma majstro Xuanjue de Yongjia naskiĝis al Dai-familio en Wenzhou. En sia juneco li studis sutrojn kaj *ŝastraojn* (sanskrite: *śāstra*; la aŭtentikaj

komentoj aŭ traktaĵoj klarigantaj la signifon de la instruoj de la Budho Ŝakjamunio) kaj estis tre sperta pri la metodo de *ŝamatao* (sanskrite: *śamatha*; halto de la aktiva menso; kvieteco; sereneco) kaj *vipaŝjanao* (sanskrite: *vipaśyana*; kontemplado) de la Skolo de Tiantai. Dum la legado de la sutro *Vimalakirti Nirdesa* li venis al klara ekkono de sia propra menso.

Iu disĉiplo de la Patriarko, kiu estis nomata Xuance, okaze vizitis Xuanjue. Dum la longa diskutado Xuance rimarkis, ke ĉiu diro de lia amiko konformas al la instruoj de la diversaj Patriarkoj.

Li do demandis: “Ĉu mi povus demandi la nomon de la majstro, kiu transdonis al vi la Darmon?”

“Mi ricevis instruojn de diversaj majstroj dum mi studis la sutrojn kaj la *ŝastraojn*,” respondis Xuanjue. “Poste dank’ al la legado de la sutro *Vimalakirti Nirdesa* mi ekkomprenis la instruojn de la Skolo de Budho-koro (skolo, laŭ kiu ĉiu individuo havas rektan aliron al la Budho per meditado), kaj tamen ĉi-rilate mi ankoraŭ ne havas instruanton, kiu konfirmus mian sciadon.”

**§7-32**

“Antaŭ la tempo de (la unua) Budho *Bhisma-garjitasvara Raja* (sanskrite: *bhīṣmagarjitasvararāja*; la Reĝo kun Impona Voĉo),” rimarkis Xuance, “estis eble senigi sin je la helpo de instruanto, sed ekde tiu tempo ĉiu intuicia vekiĝo sen la helpo kaj konfirmo de instruanto estas nur natura herezo.”

“Ĉu do vi, via moŝto, volus esti afabla kaj fari konfirmon por mi?” demandis Xuanjue.

“Miaj vortoj portas nenian pezon,” respondis lia amiko. “En Caoxi sin trovas la Sesa Patriarko, al kiu vizitantoj en grandaj nombroj venas de ĉiuj flankoj. Li estas la ortodoksa heredinto de la Darmo. Se vi volos iri tien, mi volonte akompanos vin.”

Ili do alvenis en Caoxi kaj intervidiĝis kun la Patriarko. Trifoje ĉirkaŭirinte la Patriarkon, Xuanjue eklevis sian *kakaraon* (sanskrite: *khakkhara*; bonza bastono kun ringoj, ĉefe el stano kaj fero, uzata por anonci per la ringa sono ĉe ekskuo la alvenon de la portanto kaj por elpeli insektojn kaj aliajn bestetojn sur la vojo, evitigante al ili vundiĝon) kaj frapis per ĝi la plankon. Poste li nur staris tie sen riverenco.

**§7-33**

La Patriarko diris: “Kiel ŝramano, vi estas la enkorpiĝo de la tri mil reguloj de etiketo kaj la okdek mil detalaj disciplinaj reguloj. Mi do volus scii, de kie vi venas kaj kio faras vin tiel malmodesta.”

“La afero pri la renaskiĝo kaj la morto estas gravega (kompare kun la kutima ĝentileco),” li respondis, “kaj la morto povas veni en iu ajn momento (tial mi havas nenian tempon por malŝpari pro ceremonia etiketo).”

“Kial vi ne penas ekkoni la ‘sennaskiĝecon’, kaj per tio solvos la problemon pri la efemereco de la vivo?” demandis la Patriarko.

Xuanjue rimarkis: “Tiu ekkono neebligas la renaskiĝojn, kaj tiu solvo neniigas la efemerecon.”

“Prave, prave!” konsentis la Patriarko.

Nur tiam Xuanjue faris riverencon en plena ceremonio kaj, post mallonga tempo, adiaŭis la Patriarkon.

**§7-34**

“Ĉu ne tro rapide vi foriras?” demandis la Patriarko.

“Kiel povas sin trovi ‘rapido’ kiam movo propre ne ekzistas?” li respondis.

“Kiu scias, ke movo ne ekzistas?” demandis la Patriarko.

“Estas vi, granda Majstro, kiu estas tiel distingema.”

La Patriarko do diris: “Vi jam plene kaptis la sencon de ‘sennaskiĝeco’.”

“Kiel la ‘sennaskiĝeco’ havas sencon?” demandis Xuanjue.

“Sen senco, kiu do povas fari la distingon?” demandis la Patriarko siavice.

“Ankaŭ ‘fari la distingon’ ne havas signifon,” respondis Xuanjue.

“Prave dirite!” ekkriis la Patriarko. Li do petis Xuanjue prokrasti sian foriron kaj pasigi la nokton tie. De tiam Xuanjue estis konata al siaj samtempuloj kiel “eklumiĝinto, kiu pasigis unu nokton kun la Patriarko”. Poste li skribis la faman verkon “Kanto pri Eklumiĝo”, kiu estis vaste akceptita. Lia postmorta titolo estis “Granda Majstro Wuxiang” (Senformeco), kaj li ankaŭ estis nomata de siaj

tiamuloj kiel “Zenisma Majstro Zhenjue” (Vera Eklumiĝinto).

**§7-35**

La bikŝuo Zhihuang, sekvanto de la Zenisma Skolo, iam vizitis la Kvinan Patriarkon kaj pretendis, ke li jam atingis *samadion*. Dum dudek jaroj li enfermis sin en malgranda templo kaj ĉiam tenadis la pozicion de sido kun la kruroj krucitaj.

Xuance, disĉiplo de la Sesa Patriarko, en sia ekskurso al la norda bordo de la Flava Rivero, aŭdis pri li kaj vizitis lian templeton.

“Kion vi faras ĉi tie?” demandis Xuance.

“Praktikon de *samadio*,” respondis Zhihuang.

“Ĉu vi diras, ke vi estas en *samadio*?” diras Xuance. “Mi deziras scii, ĉu vi faras tion konscie aŭ nekonscie. Ĉar se vi faras tion nekonscie, tio signifas, ke ĉiuj senanimaj objektoj, kiaj estas herboj, arboj, argilaĵoj kaj ŝtonoj, devus havi la eblecon atingi *samadion*. Aliflanke, se vi faras tion konscie, tiam ankaŭ ĉiuj sentohavaj povus eniri en tiun staton.”

“Kiam mi estas en *samadio*,” rimarkis Zhihuang, “mi konas nek konscion, nek nekonscion.”

“Se estas tiel,” diris Xuance, “tio estas nur konstanta kvieteco, en kiu sin trovas nek eniro, nek eliro; kaj tiu stato, al kiu vi povas fari eniron aŭ eliron, ne estas Granda *Samadio*.”

**§7-36**

Zhihuang senparoliĝis pro mirego. Post longa tempo li demandis:

“Ĉu mi povus scii, kiu estas via instruanto?”

“Mia instruanto estas la Sesa Patriarko de Caoxi,” respondis Xuance.

“Kiel do li difinas *djano-samadion*?” demandis Zhihuang.

“Laŭ lia instruo,” respondis Xuance, “ĝi estas profunda, perfekta kaj serena; ĝia substanco kaj ĝia funkcio estas en stato de Tieleco. La kvin *skandaoj* estas esence malplenaj kaj la ses sensobjektoj estas neefektivaj. Sin trovas nek eniro, nek eliro. Sin trovas nek kvieteco, nek malkvieteco. La naturo de *djano* estas ne-restadema, tial ni devas nin deteni de restado en la kvieteco de *djano*. La naturo de *djano*

estas nekreiva, tial ni ne devas alkroĉiĝi al la ideo pri ‘kreo de stato de *djano*’. La stato de la menso povas esti simila al malplena spaco, sed ni ne devas lasi leviĝi la ideon pri ‘malplena spaco’.”

**§7-37**

Aŭdinte pri tio, Zhihuang tuj iris al Caoxi por intervidiĝi kun la Patriarko.

“De kie vi venas?” demandis la Patriarko.

Li detale rakontis al la Patriarko la konversacion, kiun li havis kun Xuance.

“Tio, kion Xuance diris, estas prava,” diris la Patriarko. “Se vi nur tenas vian menson malplena kiel spaco, sen alkroĉiĝo al la ideo pri malpleneco, via menso libere funkcios sen ajna malhelpo, tiel ke vi estos ĉiam senmensa kiel en moviĝo, tiel ankaŭ en senmoveco, forgesos la distingon inter la ordinaruloj kaj la saĝuloj, ignoros la distingon inter la subjekto kaj la objekto. Tiam via origina naturo kaj ĉiuj fenomenaj objektoj estos en la stato de Tieleco, kaj vi estos ĉiam en *samadio*.”

Ĉe tio Zhihuang estis plene eklumigita, kaj tio, kion li konsideris kiel atingon dum la pasintaj dudek jaroj, nun tute malaperis. Tiunokte la loĝantoj de Hebei (la norda bordo de la Flava Rivero) aŭdis la voĉon en la ĉielo dirantan: “Hodiaŭ la zenisma majstro Zhihuang jam atingis eklumiĝon.”

Poste Zhihuang forlasis la Patriarkon kaj revenis al Hebei, kie li disvastigis la Darmon al la kvar kategorioj de la budhanaro (bonzoj, bonzinoj, laikoj kaj laikinoj).

**§7-38**

Iu bikŝuo foje demandis la Patriarkon, kiu speco de homo havas la eblecon akiri la esencan instruon de Huangmei (nome de la Kvina Patriarko).

“Tiu, kiu komprenas la Darmon de la Budho,” respondis la Patriarko.

“Ĉu vi, Via Moŝto, jam akiris ĝin?” demandis la bikŝuo.

“Estas al mi fremda la Darmo de la Budho,” estis la respondo.

**§7-39**

Iun tagon la Patriarko volis lavi la robon, kiun li heredis, sed li povis trovi neniun fontakvon taŭgan por tiu celo. Li do marŝis al iu loko ĉirkaŭ kvin liojn malantaŭe de la templo, kie li trovis la arbojn dense kreskantaj kaj la medion tre bonaŭgura. Li ekskuis sian bastonon kaj pikis per ĝi la teron. Akvo tuj ŝprucis el la tero kaj tre baldaŭ formiĝis lageto.

Kiam li genuiĝis sur roko por lavi la robon, iu bikŝuo subite aperis antaŭ li kaj faris al li omaĝon.

"Mia nomo estas Fangbian," li diris. "Mi estas indiĝeno de Xishu (la nuna provinco Sichuan). Kiam mi estis en la sudo de Hindio, mi renkontiĝis kun la Patriarko Bodidarmo, kiu instrukciis min reveni al Ĉinio. 'La tuta Ortodoksa Darmo (laŭvorte: la okulo de la Ortodoksa Darmo),' li diris, 'kiun mi heredis de *Mahakasjapa* (sanskrite: *Mahākāśyapa*; la unua Patriarko de la *Djan-a* Skolo en Hindio) kune kun la robo, nun jam estas transdonita al la Sesa Patriarko, kiu nun estas en Caoxi de Shaozhou. Iru tien do por fari omaĝon al la Patriarko.' Post longa vojaĝo mi

nun alvenis. Ĉu mi povus vidi la robon kaj la bovlon, kiujn vi heredis?”

Montrinte al li la du relikvojn, la Patriarko demandis lin:

“Kian specialan lertecon vi havas?”

“Mi estas lerta en skulptado,” li respondis.

“Montru do al mi, kion vi kapablas fari,” diris la Patriarko kun serioza mieno.

Tiu ĉi peto ĵetis Fangbian en konfuzon, ke li ne sciis, kiel respondi, sed post kelkaj tagoj li finis vivoveran statuon de la Patriarko, altan je sep *cunoj* (*cuno*: tradicia ĉina mezurunuo de longo, egalanta 3, 33 centimetrojn), kiu meritis esti majstroverko de skulptarto.

**§7-40**

La Patriarko ekridetis kaj diris: “Ŝajnas, ke vi konas la naturon de la skulptarto, sed ne tiun de la budho.” Li do etendis la manon kaj bene tuŝis la kaposupron de Fangbian deklarante: “Vi estu por ĉiam ‘kampo de meritoj’ por la homoj kaj la ĉielaj estaĵoj.”

Krome la Patriarko rekompencis lian servon per robo, kiun Fangbian dividis en tri partojn: unu por vesti la statuon, unu por si mem kaj unu por enmeto en la teron post envolviĝo en palmajn foliojn. Poste li faris voton: “Kiam la robo estos elterigita, mi reenkarniĝos kiel abato de la templo kaj ĝin rekonstruigos.”

(Originala noto: En la oka jaro de la regperiodo Jiayou de la dinastio Song, t.e. la jaro 1064, aŭ pli ol 300 jarojn poste, iu bonzo nomata Weixian, dum la fosado de fundamento por templo, elterigis la robon kaj trovis ĝin tiel nova, kiel ĝi siatempe estis enterigita. Li konservis ĝin en la templo Gaoquan, kie la preĝantoj trovis ĝin reagema al ĉiu el la petoj.)

**§7-41**

Iu bikŝuo citis la jenan *gataon* komponitan de la zenisma majstro Wolun:

Wolun havas lertan rimedon,

Por izoli la menson de ĉiaj pensoj.

Fronte al situacio la menso ne leviĝas,

Tamen la bodio kreskas kun ĉiu tago. (La bodiarbo estas simbolo de saĝo.)

Aŭdinte tion ĉi, la Patriarko diris: “Tiu ĉi *gatao* indikas, ke la komponinto ankoraŭ ne plene konas sian Veran Naturon. Sekvi ĝin en praktiko signifus, ke per ĝi oni sin ligas.” Li do montris al la bikŝuo la jenan *gataon*:

Huineng trovas nenian lertan rimedon,

Por izoli sian menson de ĉiaj pensoj.

Kiam situacio leviĝas, la menso reagas.

Mi miras, kiel povas kreski la bodio. (Estante konstanta, la bodio ne estiĝas nek malestiĝas, nek kreskas nek malkreskas.)

# ĈAPITRO 8
# LA SUBITA SKOLO
# KAJ LA LAŬGRADA SKOLO

**§8-01**

Dum la Patriarko vivis en la templo Baolin, la Granda Majstro Shenxiu predikis en la templo Yuquan en Jingnan. Tiutempe la du skoloj, nome tiu de Huineng en la sudo kaj tiu de Shenxiu en la nordo, paralele prosperis. Ĉar la du skoloj estis distingitaj unu de la alia per la nomo "Subita" (la Suda) kaj "Laŭgrada" (la Norda), tial la demando, kiun skolon oni devos sekvi, konfuzis iujn tiamajn budhismajn praktikantojn.

Sciiĝinte pri tio, la Patriarko alparolis siajn disĉiplojn:

"La Darmo origine havas nur unu skolon, sed la homoj distingiĝas unu de la alia per sudo kaj nordo. La Darmo havas nur unu specon, kiun iuj disĉiploj ekkonas pli rapide, ol la aliaj. La kaŭzo, kial la nomoj 'Subita' kaj 'Laŭgrada' estas donitaj, kuŝas en tio, ke iuj disĉiploj estas superaj al aliaj en la

mensa dispozicio. Koncerne la Darmon mem, la distingo pri ‘Subita’ kaj ‘Laŭgrada’ propre ne ekzistas.”

Kaj tamen, malgraŭ la diro de la Patriarko, la sekvantoj de Shenxiu de tempo al tempo kritikis la Patriarkon. Ili difektis lian reputacion dirante, ke li, kiel analfabeto, neniel povas distingiĝi per siaj kvalitoj.

Shenxiu mem, siaflanke, konfesis, ke li estas malsupera al la Patriarko, kiu havas intuician saĝecon kaj plene komprenas la instruon de la Mahajana Skolo. “Cetere,” li aldonis, “Mia majstro, la Kvina Patriarko, ne sen ĝusta kaŭzo transdonis al li la robon kaj la bovlon. Mi bedaŭras, ke pro la patronado de la ŝtato — kiun mi tute ne meritas — mi ne povas fari longan vojaĝon por persone lerni de li. Ĉiuj el vi devas iri al Caoxi por havi lian aŭdiencon kaj aŭskulti lian instruon.”

Iun tagon li diris al sia disĉiplo Zhicheng: “Vi estas inteligenta kaj sagaca. En mia nomo, vi povos iri al Caoxi por aŭskulti liajn predikojn. Faru vian plejeblon por enmemorigi, kion vi lernis, por ke reveninte vi povu ripeti ĉion al mi.”

## §8-02

Agante laŭ la instrukcio de sia majstro, Zhicheng iris al Caoxi kaj, sen diri al iu ajn de kie li venis, li aliĝis al la aŭskultantaro.

Tiam la Patriarko diris al la aŭskultantaro: “Hodiaŭ iu kaŝiĝas ĉi tie por ŝteli mian instruon.” Zhicheng tuj elpaŝis, *koŭtoŭis* kaj rakontis al la Patriarko, kio estas lia komisio.

“Vi venas el la Templo Yuquan, ĉu ne?” demandis la Patriarko. “Sekve vi devas esti spiono.”

“Ne, mi ne estas spiono,” respondis Zhicheng.

“Kial ne?” demandis la Patriarko.

“Se mi ne dirus al vi, kiu mi estas,” diris Zhicheng, “mi estus spiono. Nun mi jam diris, sekve mi ne estas.”

“Kiel via majstro instruas siajn disĉiplojn?” demandis la Patriarko.

“Li ofte instruas al ni mediti pri pureco de la menso, kaj konservi ĉiam la pozicion de sido kun la kruroj krucitaj sen kuŝiĝo,” respondis Zhicheng.

“Mediti pri pureco,” diris la Patriarko, “estas pli malsano ol *djano*. Longatempe sidadi kun la kruroj

krucitaj antaŭ si signifas kateni sian korpon, kio estas neprofita por la vero-atingo. Aŭskultu do mian *gataon*:

Kiam ni vivas, ni sidas kaj ne kuŝiĝas.
Post kiam ni mortas, ni kuŝas kaj ne sidas.
Nia korpo estas nur rako por stinka karno.
Kial do ni devus trudi al ĝi la sido-taskon?"

**§8-03**

Ree *koŭtoŭinte* al la Patriarko, Zhicheng rimarkis: "Kvankam mi studis naŭ jarojn sub Granda Majstro Shenxiu, mia menso estis ankoraŭ ne vekita al eklumiĝo. Sed tuj kiam vi parolis al mi, mia menso eklumiĝis. Ĉar la afero rilate la ciklon de renaskiĝoj estas gravega, volu do esti kompatema kaj doni al mi pluan instruon."

"Mi aŭdis," diris la Patriarko, "ke via majstro donas al siaj disĉiploj instruojn pri *ŝilao* (bona konduto), *samadio* (medito) kaj *praĝnao* (saĝo), sed mi ne scias, kion li diras pri la trajtoj aŭ la ecoj de ĉi tiuj tri elementoj. Bonvolu do informi min pri tio."

"Laŭ la instruo de mia majstro," respondis Zhicheng, "deteni sin de ĉiaj malbonaj agoj estas

*ŝilao*, praktiki ion ajn bonan estas *praĝnao*, kaj purigi sian propran menson estas *samadio*. Jen kion li instruas al ni. Ĉu mi povus scii kiel vi instruas?”

**§8-04**

“Se mi diros al vi,” diris la Patriarko, “ke mi havas ian metodon por proponi al aliaj, mi trompos vin. Tio, kion mi faras al miaj disĉiploj, estas nenio alia, ol liberigi ilin de ilia propra ligiteco per rimedoj konvenaj al la okazoj. Por uzi iun nomon pruntitan, tiu ĉi liberigo povas esti nomata *samadio*. La maniero, en kiu via majstro instruas *ŝilaon*, *samadion* kaj *praĝnaon*, estas eksterordinara, sed mia kompreno estas iel malsama.”

“De kie do venas la diferenco,” demandis Zhicheng, “dum sin trovas nur unu speco de *ŝilao*, *samadio* kaj *praĝnao*?”

“La instruo de via majstro estas por helpi la sekvantojn de la Mahajana Skolo, dum la mia estas por tiuj de la Plejsupera Skolo. La fakto, ke iuj ekkonas la Darmon pli rapide kaj pli profunde ol la aliaj, klarigas la diferencon en la interpreto. Bonvolu

aŭskulti kaj vidi, ĉu mia instruo estas la sama kiel la lia. Instruante la Darmon, mi neniam devias de la Vera Naturo, t. e. mi parolas nur pri tio, kion mi intuicie konstatas. Interpreti la Darmon alimaniere indikus, ke la Vera Naturo de la instruanto estas obskurigita, kaj ke lia interpreto estas nomata formala interpreto. La vera instruo pri *ŝilao*, *samadio* kaj *praĝnao* devas esti bazita sur la principo, ke la funkcio de ĉiuj estaĵoj devenas el nia Vera Naturo. Aŭskultu do mian *gataon*:

Liberigi la menson de ĉia malpureco estas la *ŝilao* de la Vera Naturo.

Liberigi la menson de ĉia iluzio estas la *praĝnao* de la Vera Naturo.

Liberigi la menson de ĉia konfuzo estas la *samadio* de la Vera Naturo.

Tio, kio nek kreskas, nek malkreskas, estas *vaĝrao* (sanskrite: *vajra*; diamanto, uzata kiel la simbolo de la Vera Naturo; gardisto de la Budho kun diamanta pistilego kiel armilo en la mano).

La korpo, libera veni kaj foriri, estas la *samadio* mem.”

**§8-05**

Aŭdinte tion ĉi Zhicheng petis pardonon kaj dankis la Patriarkon pro ties instruo. Li do prezentis al li la jenan *gataon*:

La kvin *skandaoj* (formo, percepto, konscio, ago, kaj scio) estas nur iluzioj,

Kiel do ili povus esti realaĵoj?

La penso pri reveno al *tatatao*

Estas propre malpura darmo.

Aprobante lian *gataon* la Patriarko diris: “La instruo de via majstro pri *ŝilao*, *samadio* kaj *praĝnao* estas ĉefe por homoj de malsupera saĝeco, dum la mia estas por tiuj de supera saĝeco. Tiu, kiu konas la Veran Naturon, povas senigi sin je tiaj terminoj, kiaj estas bodio, nirvano kaj ‘scio pri la Atingo de Liberiĝo’. Nur tiuj, kiuj atingis la staton de nenia darmo, povas starigi dek mil darmojn. Se oni komprenas la signifon de tio ĉi, tiam ĝi povas esti nomata la budha korpo, ‘bodi-nirvano’ aŭ ‘scio pri la Atingo de Liberiĝo’. Estas tute egale por tiuj, kiuj jam vidas sian Veran Naturon, ĉu ili starigas darmon aŭ ne. Ili estas liberaj ‘veni’ kaj ‘foriri’ (t. e. ili

povas resti en tiu ĉi mondo aŭ ĝin forlasi laŭ sia libera volo), tute sen obstakloj kaj malhelpoj. Ili prenas konvenajn agojn kiel la cirkonstancoj postulas kaj donas konvenajn respondojn al la demandoj. Ili povas aperi en malsamaj *nirmanakajaoj*. Ili atingis liberecon, supernaturan psikan povon kaj *samadion*, kiuj ebligas al ili plenumi la malfacilan taskon de universala savo tiel senpene kvazaŭ ludante. Jen kiaj estas la homoj, kiuj konas la Veran Naturon."

**§8-06**

Zhicheng refoje *koŭtoŭis* kaj metis duan demandon: "Per kia principo do ni estas gvidataj en nia seniĝo je ĉiuj sistemoj de la darmo?"

"Kiam nia Vera Naturo estas libera de malpureco, malklero kaj konfuzo," respondis la Patriarko, "kiam ni introspektas de momento al momento per *praĝnao*, kaj kiam ni ne alkroĉiĝas al objektoj kaj fenomenoj, tiam ni estas liberaj. Kial do ni devus starigi ian sistemon de darmo dum nia celo povas esti atingita tute egale, ĉu ni nin turnas dekstren aŭ maldekstren?

“Ĉar per niaj propraj penoj ni povas ekkoni nian Veran Naturon kaj ĉar tiu ekkono kaj la sinkulturo ambaŭ estas faritaj pli dum momento, ol en maniero laŭgrada aŭ laŭstadia, la starigo de ia ajn sistemo de darmo estas nenecesa. Ĉar ĉiuj darmoj estas esence nirvanecaj (liberaj de estiĝo kaj malestiĝo), kiel do povas sin trovi laŭgradeco en ili?”

Ĉe tio Zhicheng ankoraŭ unu fojon *koŭtoŭis* al la Patriarko. Li volonte faris sin lia akompananto kaj servis lin tage kaj nokte.

**§8-07**

La bikŝuo Zhiche, kies laika nomo estas Zhang Xingchang, estis indiĝeno de Jiangxi. En sia juneco li tre emis agi brave kaj bataleme.

De kiam okazis la splitiĝo inter la du zenismaj skoloj, nome tiu de Huineng en la Sudo kaj tiu de Shenxiu en la Nordo, ia forta sekteca sento leviĝis kaj disvolviĝis inter iliaj disĉiploj malgraŭ la tolerema spirito montrita de la du majstroj, kiuj tute ne konis egoismon kaj sindone laboris. La sekvantoj de la Norda Skolo, kvankam sen aŭtoritateco, nomis

sian majstron Shenxiu la Sesa Patriarko kaj, pro envio kontraŭ la rajta posedanto de la robo, kiu estis tro fame konata por esti ignorata, ili sendis Zhang Xingchang, kiu tiam estis laiko, murdi la Patriarkon.

La mensa povo de la Patriarko ebligis al li antaŭsciiĝi pri la komploto. Li metis dek taelojn da oro apud sian sidlokon. Tiunokte, kiam Zhang glitis kun murda intenco en la ĉambron de la Patriarko, tiu elstrecîs sian kolon, proponante ĝin al Zhang. Zhang frapis lin trifoje per sia glavo, sed faris nenian vundon al li.

**§8-08**

Tiam la Patriarko diris:

“La glavo rekta ne estas malrekta,
Dum la malrekta ne estas rekta.
Mi ŝuldas al vi monon,
Sed la vivon tute ne.”

La surprizo estis tro granda por Zhang. Li subite falis en svenon, el kiu li revenis al la vivo nur post paso de konsiderinde longa tempo. Kiam li retrovis sian konscion, li estis plena de konsciencriproĉo kaj

petis pardonon. Li demandis la Patriarkon, ĉu li povus fariĝi bonzo. La Patriarko donis la oron al li kaj diris: “Vi devas tuj forlasi tiun ĉi lokon, ĉar miaj disĉiploj povos fari al vi malutilon. Venu alivestita vidi min en iu alia tago kaj mi plenumos vian deziron.”

Obeante la instrukcion, Zhang foriris sub la kovro de la nokto. Poste li aliĝis al la Budhana Ordeno kaj fariĝis tre pia kaj diligenta bonzo, severe observante la bonzajn disciplinajn regulojn.

**§8-09**

Iun tagon, ekmemorinte kion la Patriarko diris al li, li faris longan vojaĝon por vidi lin kaj fari al li omaĝon.

“Kial vi venas tiel malfrue?” demandis la Patriarko. “Mi ĉiam pensis pri vi.”

“Ekde tiu tago, en kiu vi bonvole pardonis mian krimon,” diris Zhang, “mi fariĝis bikŝuo kaj diligente studas kaj praktikas la budhismon. Tamen mi trovis malfacila pagi al vi la dankoŝuldon, krom se mi povos montri mian dankemon per disvastigo de la

Darmo por la bono de la sentohavaj estaĵoj. En la studo de la sutro *Maha Parinirvana*, kiun mi legadas tre ofte, mi ne povas kompreni la signifon de ‘permanenta’ kaj ‘nepermanenta’. Volu do, Via Sankteco, esti afabla kaj doni al mi koncizan klarigon.”

“Kio estas nepermanenta, estas la budho-naturo,” respondis la Patriarko, “kaj kio estas permanenta, estas la distingikapabla menso kune kun ĉiuj ĝiaj bonaj kaj malbonaj darmoj.”

**§8-10**

“La klarigo de Via Sankteco, laŭ mi, estas kontraŭa al kio estas dirita en la sutro,” diris Zhang.

“Kiel mi kuraĝus? Tio, kion mi predikas, ja estas la Koro-Sigelo de la Sinjoro Budho.” respondis la Patriarko.

“Laŭ la sutro,” diris Zhang, “la budho-naturo estas permanenta, dum ĉiuj bonaj kaj malbonaj darmoj inkluzive de la Bodi-Koro estas nepermanentaj; kaj tamen, malgraŭ tio, vi opinias male! Ĉu tio ne estas kontraŭdiro? Via klarigo ja intensigas mian dubon.”

“En iu okazo,” respondis la Patriarko, “mi aŭdis la bikŝuinon Wujinzang reciti al mi la tutan libron de la sutro *Maha Parinirvana*, kaj poste mi klarigis ĝin al ŝi. Ĉiu vorto kaj ĉiu signifo, kiujn mi klarigis al ŝi, konformis al la teksto. La klarigo, kiun mi nun donis al vi, estas ne diferenca de tio, kion mi diris tiam.”

“Mia komprenkapablo estas malbona. Ĉu Via Sankteco povus esti afabla kaj fari al mi iom pli detalan klarigon?” petis Zhang.

**§8-11**

“Ĉu vi ne komprenas?” diris la Patriarko. “Se la budho-naturo estus permanenta, tiam kia neceso sin trovus priparoli darmojn bonajn kaj malbonajn? Ĉar tiuokaze, de *kalpao* al *kalpao*, neniu inklinus veki sian Bodi-Koron. Tial, kiam mi diras ‘nepermanenta’, tio estas ĝuste kion la Sinjoro Budho intencis esprimi per ‘vere permanenta’. Plie, se ĉiuj darmoj estus nepermanentaj, tiam ĉiuj ekzistaĵoj havus sian propran Veran Naturon por suferi morton kaj naskiĝon. Tiuokaze, tio signifus, ke la Vera Naturo, kiu estas vere permanenta, ne trapenetras ĉien. Tial, kiam mi diras

‘permanenta’, tio estas ĝuste kion la Sinjoro Budho intencis esprimi per ‘vere nepermanenta’.

“Ĉar ordinaruloj kaj herezuloj kredas je la ‘hereza permanenteco’ kaj ĉar *ŝravakaoj* (la aspirantoj al la arahanteco) kaj *pratjekabudaoj* (tiuj, kiuj atingis eklumiĝon per sin-kulturado) miskomprenas la permanentecon de la nirvano kiel ion ne permanentan, tial ok inversigitaj opinioj leviĝas. Por refuti tiujn ĉi erarajn opiniojn, la Sinjoro Budho ortodokse predikis la sutron *Maha Parinirvana*, kiu eksplikas ‘la plejsuperan doktrinon’ de la budhismaj instruoj, t. e. la vera permanenteco, la vera feliĉo, la vera memo kaj la vera pureco.

“Ĉar vi alkroĉiĝas al la vortoj de la sutro, vi ignoras la spiriton de la teksto. Supozante, ke tio, kio estas pereema, estas nepermanenta, kaj ke tio, kio estas fiksa kaj neŝanĝebla, estas permanenta, vi misinterpretis la lastan instruon de la Sinjoro Budho, kiu estas subtila, profunda kaj perfekta. Kun tia miskompreno, eĉ se vi legos tiun ĉi sutron milfoje, vi ricevos nenian utilon.”

**§8-12**

Zhang subite atingis grandan eklumiĝon kaj komponis la jenan *gataon*:

Ĉar oni alkroĉiĝas al la ideo pri “nepermanenteco”,

La Budho predikis pri la “permanenteco”.

Tiu, kiu ne komprenas, ke tio estas nur vort-lertaĵo,

Povas simili la infanon, kiu kolektas ŝtonetojn kaj nomas ilin gemoj.

Sen penoj de mia flanko

La budho-naturo mem sin manifestas.

Tio estas ŝuldata nek al la instruado de mia majstro,

nek al mia propra atingo.

“Nun vi jam kompletiĝis,” diris la Patriarko. “De nun vi devas esti nomata Zhiche (plena ekkompreno).” Zhiche dankis la Patriarkon, *koŭtoŭis* kaj foriris.

**§8-13**

Iu dektri-jara knabo nomata Shenhui, kiu estis membro de la Gao-familio de Xiangyang, alvenis de

la templo Yuquan (kie predikis la majstro Shenxiu de la Norda Skolo), por fari omaĝon al la Patriarko.

"Mia amiko," diris la Patriarko, "vi faris tre longan kaj malfacilan vojaĝon por veni ĉi tien. Sed, ĉu vi povus diri al mi, kio estas via fundamenta principo? Se vi povas, vi certe jam konas ĝian posedanton (nome la Veran Naturon). Do bonvole diru ion."

"Mi prenas 'ne-alkroĉiĝon' kiel mian fundamentan principon, kaj 'vidon' (t. e. ekkono) kiel ĝian 'posedanton'," respondis Shenhui.

"Vi, novico-bonzo, taŭgas por nenio krom tiele parolaĉi!" riproĉis la Patriarko kun miro.

Shenhui do demandis la Patriarkon:

"Ĉu vi, Via Sankteco, vidas aŭ ne en via meditado?"

**§8-14**

La Patriarko frapis lin trifoje per sia bastono kaj demandis: "Ĉu vi sentas doloron aŭ ne?"

"Doloron kaj ne doloron," respondis Shenhui.

“Mi do vidas kaj ankaŭ ne vidas,” respondis la Patriarko.

“Kial do vi vidas kaj ne vidas?” demandis Shenhui.

“Tio, kion mi vidas, kaj ofte vidas,” respondis la Patriarko, “estas miaj kulpoj en mia menso. Tio, kion mi ne vidas, estas la bono kaj malbono de aliaj. Jen kial mi vidas kaj ne vidas. Nu, bonvolu diri al mi, kion vi volas diri per ‘doloron kaj ne doloron’. Se vi sentas nenian doloron, vi similus pecon de ligno aŭ ŝtono. Aliflanke, se vi sentas doloron, vi estas la sama kiel ordinara persono, kiu havas koleron kaj malamon en la sama tempo.

“La ‘vido’ kaj ‘nevido’, pri kiuj vi demandas, estas du ekstremoj, dume la ‘doloro kaj ne doloro’ apartenas al tio, kio ‘estiĝas kaj malestiĝas’. Sen vidi vian propran Veran Naturon, vi aŭdacas eĉ artifike trompi aliajn.”

*Koŭtoŭante* al la Patriarko, Shenhui petis lian pardonon kaj dankis lin pro la instruo.

**§8-15**

La Patriarko ree alparolis lin dirante: “Se via menso estas iluziita kaj vi ne povas vidi vian Veran Naturon, tiam vi devas serĉi instruon de bona kaj klera amiko. Se, aliflanke, vi atingos eklumiĝon, vi vidos vian Veran Naturon. Tiam vi povos fari vian praktikadon laŭ la Darmo. Nun ke vi estas sub iluzio kaj ne vidas vian Veran Naturon, vi aŭdacas eĉ veni demandi, ĉu mi vidas aŭ ne (mian Veran Naturon). Mi kompreneble scias, kion mi mem vidas, sed tio neniel helpas al vi liberiĝi de via iluziiteco. Simile, se vi vidus vian Veran Naturon, via vido estus senutila al mi. Tial, anstataŭ demandi aliajn, kial vi ne penas ĝin vidi kaj koni por vi mem?”

Foj-refoje kaj senhalte *koŭtoŭante*, Shenhui sin kulpigis kaj denove petis pardonon de la Patriarko. De tiam li diligente servis ĉe la Patriarko kaj ĉiam eskorte akompanis lin.

**§8-16**

Iun tagon la Patriarko alparolis siajn disĉiplojn dirante: “Mi havas objekton, kiu havas nek kapon,

nek voston, nek nomon, nek vorton, nek antaŭon, nek malantaŭon. Kiu do el vi scias, kio ĝi estas?”

Shenhui paŝis antaŭen kaj respondis: “Ĝi estas la origino de ĉiuj budhoj kaj ankaŭ la budho-naturo de Shenhui.”

“Mi jam klare diris al vi, ke ĝi havas nenian nomon, kaj tamen vi nomas ĝin ‘origino’ kaj ‘budho-naturo’. En la estonteco, eĉ se vi enfermos vin en malgranda kabano pajle tegmentita por asketeca praktikado, vi fariĝos ne pli bona ol disĉiplo kapabla nur fari interpretadon (anstataŭ de intuicia eklumiĝo).”

Post la morto de la Patriarko, Shenhui iris al Luoyang, kie li disvastigis la instruon de la Subita Skolo. Li skribis popularan verkon titolitan “Eksplicita Traktaĵo pri Instruo de *Djano*”. Li estas ĝenerale konata per la titolo “Zenisma Majstro Heze” (la nomo de lia templo).

**§8-17**

Vidante, ke multaj demandoj metitaj al li de disĉiploj de aliaj skoloj, plejparte kun malbonaj

intencoj, kaj ke granda nombro da tiaj demandantoj jam amasiĝas ĉirkaŭ li, la Patriarko alparolis al ili, el kompatemo, dirante la jenon:

“Tiu, kiu praktikas la budhismon, devas forigi el si ĉiajn pensojn, bonajn kaj malbonajn. Kiam sin ne trovas plu nomoj, tia stato estas ĝuste via Vera Naturo; ĝi efektive ne povas esti nomata per ia nomo. Tiu ‘nedueca naturo’ estas nomata la ‘efektiva naturo’, sur kiu ĉiuj sistemoj de budhismaj instruoj estas bazitaj, kaj kiun vi devas ekkompreni ĝuste nun, kiam ĝi estas klarigita al vi.”

Aŭdinte tion ĉi, ili ĉiuj faris la budhanan saluton al la Patriarko kaj petis lin akcepti ilin kiel siajn disĉiplojn.

# ĈAPITRO 9
# IMPERIESTRA FAVORO

**§9-01**

Je la dekkvina tago de la unua lunmonato de la unua jaro de la regperiodo Shenlong (705—707) la Imperiesta Patrino Zetian kaj la Imperiestro Zhongzong eldonis edikton, kiu diris:

“De kiam ni invitis la du grandajn majstrojn Hui’an kaj Shenxiu resti en la palaco por ricevi niajn oferojn, ni studis la ‘Budhan Veturilon’ sub ili en iu ajn tempo, kiam ni povis trovi tempon post la plenumo de niaj imperiaj devoj. Tute el modesteco tiuj ĉi du majstroj rekomendis, ke ni devu peti konsilojn de la zenisma majstro Huineng de la Suda Skolo, kiu esotere heredis kiel la Darmon kaj la robon de la Kvina Patriarko, tiel ankaŭ la Koro-Sigelon de la Sinjoro Budho.

“Ni do sendis la eŭnukon Xue Jian kiel kurieron de tiu ĉi edikto por inviti Lian Sanktecon veni al ni, kaj esperas, ke Lia Sankteco grace favoros nin per baldaŭa vizito al la ĉefurbo.”

Pretekstante malsaniĝon la Patriarko sendis respondon por rifuzi la imperiestran inviton kaj peti imperiestran favoron permesi al li pasigi siajn restantajn jarojn ĝis la morto en la monta arbaro.

**§9-02**

Intervidiĝante kun la Patriarko, Xuejian diris: “La eminentaj zenismaj majstroj en la ĉefurbo havas la ĝeneralan opinion, ke por atingi la budhecon oni devas sidadi en medito kun la kruroj krucitaj antaŭ si kaj praktiki *samadion*. Ili diris, ke tio estas la sola metodo por efektivigi la Liberiĝon, kaj ke agante alie neniu akiris la Liberiĝon. Ĉu mi povus scii pri via metodo ĉi-rilate, Majstro?”

“La Liberiĝo devas esti efektivigita per la menso,” respondis la Patriarko, “kaj ne dependas de la pozicio de sido. La sutro diris: ‘Estas hereza la aserto, ke la *Tatagatao* estas kiel sido aŭ kuŝo’. Kial do? Ĉar la ‘*Djano* de Pureco’ implicas nek venon de ie ajn, nek foriron ien ajn, nek estiĝon nek malestiĝon. Ĉiuj darmoj (ekzistaĵoj) propre estas kvietaj kaj malplenaj, kaj tia estas ankaŭ la ‘pureca

sidado’ de *Tatagatao*. Precize dirite, sin trovas eĉ ne tia afero, nek ia ajn pruvo; kial do ni devus ĝeni nin per la pozicio de sido kun la kruroj krucitaj?”

**§9-03**

“Post kiam mi revenos”, diris Xuejian, “Iliaj Majestoj certe volos, ke mi faru raporton. Ĉu Via Moŝto povus esti tiel afabla kaj doni al mi iajn sugestojn pri la esenco de via instruo, por ke mi povu konigi ilin ne nur al Iliaj Majestoj, sed ankaŭ al ĉiuj budhismaj studantoj en la ĉefurbo? Tio estas kiel unu brulanta lampo, kiu povas ekbruligi centojn aŭ milojn da aliaj, tiel ke la tuta mallumo lumiĝos, kaj via lumo produktos lumon senfinan.”

“La doktrino de la Budho havas nek lumon, nek mallumon,” replikis la Patriarko. “La lumo kaj la mallumo signifas la ideon pri ŝanĝo kaj alterno, sekve estas ne ĝuste diri, ke ‘lumo produktos lumon senfinan’, ĉar efektive sin trovas fino. La terminoj en tiuj paroj da kontraŭoj (‘la lumo kaj la mallumo’, ‘la senfineco kaj la finiteco’) estas diritaj en rilato unu al la alia, nome en kontrasto. Jen kial la sutro

*Vimalakirti Nirdesa* diras: ‘La Darmo havas nenian analogecon, ĉar ĝi estas dirita en rilato al nenio.’”

“La lumo estas saĝo,” rezonis Xuejian, “kaj mallumo signifas kleŝon. Se la praktikanto de la budhisma doktrino ne rompas kun kleŝo per la forto de saĝo, kiel li povos liberigi sin de la senkomenca ‘rado de naskiĝo kaj morto’?”

**§9-04**

“La kleŝo estas bodio,” replikis la Patriarko. “La du estas la samaj kaj ne diferencas inter si. Rompi kun kleŝo per saĝo estas la instruo de la skolo de *ŝravakaoj* (la aspirantoj al la arahanteco) kaj tiu de *pratjekabudaoj* (tiuj, kiuj atingis eklumiĝon per sin-kulturado), kies disĉiploj estas la sekvantoj de la Kapra Veturilo kaj la Cerva Veturilo respektive. Por la homoj de supereca saĝo kaj granda kapableco, tia instruo havas nenian utilon.”

“Kia do estas la instruo de la Mahajana Skolo?” demandis Xuejian.

“El la vidpunkto de ordinaraj homoj,” respondis la Patriarko, “la eklumiĝo kaj la malklero estas du

aferoj. Sed la saĝaj homoj, kiuj jam funde ekkonis la Veran Naturon, scias, ke ili estas de la sama naturo. Tiu ĉi sama naturo aŭ nedueca naturo estas tio, kio estas nomata ‘efektiva naturo’, kiu ne malkreskas en la okazo de la ordinaraj kaj malkleraj personoj, nek kreskas en la okazo de la virtaj kaj saĝaj. Ĝi ne malordiĝas en stato de ĉagreniĝo, nek kvietiĝas en stato de *samadio*. Ĝi ne estas eterna, nek maleterna; ĝi ne venas, nek foriras; ĝi povas esti trovita nek en la ekstero, nek en la interno, nek en la spaco inter la du. Ĝi estas super la estiĝo kaj la malestiĝo; ĝia naturo kaj ĝiaj fenomenoj estas ĉiam en stato de ‘Tieleco’; ĝi estas permanenta kaj neŝanĝebla. Tia estas la Vojo.”

**§9-05**

Xuejian do demandis: “Vi diras, ke ĝi estas super la estiĝo kaj la malestiĝo. Kiel do via instruo pri tio diferencas de similaj asertoj de la herezuloj?”

“Laŭ la herezuloj,” respondis la Patriarko, “la ‘malestiĝo’ signifas la finon de la ‘estiĝo’, dum la ‘estiĝo’ estas uzata en kontrasto kun la ‘malestiĝo’,

nome por reliefigi la lastan. Tio, kion ili volas diri per ‘malestiĝo’ efektive ne neniiĝas, kaj tio, kion ili nomas ‘estiĝo’, efektive ne estiĝas. En mia instruo tio, kion mi diras per ‘esti super la estiĝo kaj la malestiĝo’ estas tio ĉi: origine sin trovas nenia ‘estiĝo’, kaj en la nuna momento, kompreneble, sin trovas ankaŭ nenia ‘malestiĝo’. Jen la diferenco inter mia instruo kaj tiu de la herezuloj.

“Se vi deziras scii la esencajn punktojn de mia instruo, vi devas liberigi vin de ĉiaj pensoj, bonaj kaj malbonaj, tiam via menso nature estos en daŭra stato de pureco kaj kvieteco. Ĝiaj funkcioj estos tiel multaj, kiel la sableroj en Gango.”

La instruo de la Patriarko subite vekis Xuejian al granda eklumiĝo. Li diris adiaŭ al la Patriarko kun deca ĝentilaĵo. Reveninte al la palaco, li raportis al Iliaj Majestoj kion la Patriarko diris.

**§9-06**

En tiu sama jaro, en la tria tago de la naŭa lunmonato, estis eldonita edikto laŭdanta la Patriarkon:

“Pro maljuneco kaj malsaniĝo la Patriarko malakceptis nian inviton al la ĉefurbo. Dediĉante sian vivon al la praktikado de la budhismo por nia bono li efektive estas la ‘kampo de meritoj’ de nia nacio. Li ja sekvas la ekzemplon de Vimalakirti, kiu, resaniĝante en la urbo Vaisali, disvastigis la Mahajanan Instruon, transdonis la doktrinon de la Skolo de *Djano*, kaj eksplikis la ‘Neduecan’ metodon.

“Pere de Xuejian, al kiu la Patriarko komunikis la Budho-saĝon, ni estas sufiĉe feliĉaj havi la okazon por kompreni por ni mem la instruon de la Pli Alta Budhismo. Tio devas esti ŝuldata al niaj akumulitaj meritoj kaj niaj ‘radikoj de boneco’ plantitaj en la pasintaj vivoj; alie, ni ne povus esti la samtempuloj de Lia Sankteco.

“Kun alta taksado de la bonfaro de la Patriarko, al kiu ni apenaŭ povas sufiĉe esprimi nian dankemon, ni donacas al li, kiel signon de nia granda respekto, robon de Mo Na (speco de altkvalita bonza robo) kaj kristalan bovlon, kaj ordonas al la prefekto de Shaozhou renovigi lian templon kaj ŝanĝi lian malnovan loĝejon en templon kun la nomo ‘Guo En’ (Bonfaro al la Ŝtato).”

# ĈAPITRO 10
# LIAJ LASTAJ INSTRUOJ

**§10-01**

Iun tagon la Patriarko venigis siajn disĉiplojn Fahai, Zhicheng, Fada, Shenhui, Zhichang, Zhitong, Zhiche, Zhidao, Fazhen, Faru kaj ceterajn, kaj alparolis ilin dirante la jenon:

"Vi homoj estas diferencaj de la ceteraj homoj. Post kiam mi eniros en *parinirvanaon* (sanskrite: *parinirvāṇa*; perfekta ripozo; estingiĝo de reenkarniĝo kaj eskapo el suferoj; kompleta kvieteco; nirvano), ĉiu el vi estos zenisma majstro de iu aparta regiono, tial mi nun donos al vi iujn sugestojn pri predikado, por ke vi, kiam vi praktikos, ne perdu la tradicion de nia Skolo.

**§10-02**

"Unue menciu la tri kategoriojn de darmoj kaj poste la tridek ses 'parojn da kontraŭoj' en la aktivecoj (de la Vera Naturo). Poste instruu kiel eviti la du ekstremojn de 'eniro' aŭ 'eliro'. En ĉiuj

instruoj, neniam forvagu de via Vera Naturo. Kiam oni metos demandon al vi, respondu per antonimoj, por ke ‘paro da kontraŭoj’ povu formiĝi. La du kontraŭoj estas korelativaj kaj interdependantaj, kiel ekzemple, ‘veni’ kaj ‘foriri’ estas la reciproka kaŭzo unu de la alia. Kiam ĉiuj el tiuj kontraŭoj estas forigitaj, tiam estos nenio, al kio io ajn povus esti alkroĉita.

“La tri kategorioj de darmoj estas *skandaoj*, *datuoj*, *ajatanaoj* (sanskrite:*āyatana*; loko aŭ sfero de kontakto; alirejo al mensa stato).

“La kvin *skandaoj* estas materio (sanskrite: *rūpa*), sensaĵo (sanskrite: *vedanā*), percepto (sanskrite: *samjñā*), inklinoj de menso (*samskāra*) kaj konscio (sanskrite: *vijñāna*).

“La dek du *ajatanaoj* estas ses sensobjektoj, kiuj estas eksteraj, kaj ses sensorganoj, kiuj estas internaj. La ses sensobjektoj estas la objektoj de vidado, de aŭdado, de flarado, de gustumado, de tuŝado kaj de pensado, nome formo, sono, odoro, gusto, tuŝo kaj pensoj. La ses sensorganoj estas la

organoj de vidado, de aŭdado, de flarado, de gustumado, de tuŝado kaj de pensado, nome okulo, orelo, nazo, lango, korpo kaj menso.

"La dek ok *datuoj* estas ses sensobjektoj, ses sensorganoj kaj ses ricevantaj *viĝnanaoj*.

**§10-03**

"Ĉar la Vera Naturo ampleksas ĉiujn darmojn (ekzistaĵojn kaj iliajn fenomenojn), ĝi estas nomata 'Ampleksanta Konscio'. Sed tuj kiam la procezo de pensado aŭ rezono komenciĝas, la Vera Naturo estas ŝanĝita en diversajn *viĝnanaojn*. Kiam la ses ricevantaj *viĝnanaoj* estiĝas, ili perceptas la ses sensobjektojn tra la ses 'pordoj' de sentumo. Sekve la funkciado de la dek ok *datuoj* ricevas sian kaŭzon el la Vera Naturo. Ĉu ili funkcias kun inklino malbona aŭ bona — tio dependas de la animstato, malbona aŭ bona, en kiu estas la Vera Naturo. Malbona funkciado estas tiu de ordinarulo, dum bona funkciado estas tiu de budho. De kie originis ĉiuj ĉi funkcioj? Nur el nia Vera Naturo.

**§10-04**

“La tridek ses ‘paroj da kontraŭoj’ estas:

“la kvin eksteraj senanimaj: la ĉielo kaj la tero, la suno kaj la luno, la lumo kaj la mallumo, la pozitiva elemento kaj la negativa elemento, la fajro kaj la akvo.

“Rilate *darmalakŝanaon* kaj *abidanaon* (sanskrite: *abhidhāna*; parolo, vortoj, aŭ lingvo) estas dek du: parolo kaj darmo, havo kaj nehavo, materio kaj nematerio, formo kaj senformeco, elfluo (sanskrite: *āsrava*) kaj senelfluo (sanskrite: *anāsrava*), materio kaj malpleneco, movo kaj kvieteco, pureco kaj malpureco, ordinaruloj kaj saĝuloj, samgo kaj laikaro, maljuneco kaj juneco, grandeco kaj malgrandeco.

“La funkciado de la Vera Naturo estas karakterizata per dek naŭ diversaj paroj: longa kaj mallonga, bona kaj malbona, inteligenta kaj stulta, saĝa kaj malklera, kvieta kaj malkvieta, favorkora kaj malica, disciplinita (*śīla*) kaj indulga, rekta kaj malrekta, plena kaj malplena, danĝera kaj sekura, kleŝo kaj bodio, permanenta kaj efemera, kompata kaj kruela, ĝoja kaj kolera, malavara kaj avara,

antaŭeniri kaj retroiri, estiĝi kaj malestiĝi, *darmakajao* (darmo-korpo) kaj *rupakajao* (sanskrite: *rūpakāya*; fizika korpo), *nirmanakajao* (enkarniĝo-korpo) kaj *sambogakajao* (manifestiĝo-korpo) .”

**§10-05**

La Patriarko daŭrigis: “Tiu, kiu scias uzi tiun ĉi metodon de la ‘tridek ses paroj da kontraŭoj’, jam havas la liberecon en la lernado de la instruo de ĉiuj sutroj kaj kapablas eviti la du ekstremojn en siaj ‘eniroj’ kaj ‘eliroj’.

“En la funkciado de la Vera Naturo kaj en la konversacio kun aliaj, ekstere ni devas liberigi nin de alkroĉiĝo al formo, kun kiu ni estas en kontakto; kaj interne ni devas liberigi nin de la ideo pri ‘malpleneco’ kiam ĝi estas predikata. Kiam ni estas obsedataj de la ideo pri formo, eraraj opinioj estiĝas; kiam ni estas obsedataj de la ideo pri ‘malpleneco’, malklero kreskas.

“Tiuj, kiuj alkroĉiĝas al ‘malpleneco’, kalumnias la sutrojn asertante, ke la skribaĵoj (t. e. budhismaj skriboj) estas nenecesaj por la studado de la

budhismo. Se estus tiel, tiam por ni estus nenecese ankaŭ paroli, ĉar la paroloj formas la substancon de skribaĵoj. Ili ankaŭ argumentas, ke la menso estas ‘rekta vojo’, kiu estas libera de (la uzo de) ĉia teksto. Sed fakte ankaŭ tiuj ĉi du vortoj ‘libera de’ mem estas nenio alia, ol skribaĵo! Aŭdante aliajn paroli pri sutroj, tiaj homoj kritikas la parolantojn dirante, ke ili estas obsedataj de la teksto.

“Vi ĉiuj devas scii ke, kiam jam estas sufiĉe malbone havi tian eraran nocion, blasfemi kontraŭ la budhismaj skriboj ja estas ofendo eĉ pli serioza, ĉar tia kalumnio altirus sur sin senlimajn krimojn!

**§10-06**

“Tiuj, kiuj kredas je la efektiveco de la eksteraj objektoj, penas serĉi formon (de ekstere) per praktikado de ia sistemo de doktrino. Ili starigis predikejojn diversloke por vaste diskutadi pri la respektivaj malavantaĝoj de *bavao* (sanskrite: *bhāva*; ekzisto) kaj *abavao* (sanskrite: *abhāva*; neekzisto). Tiaj homoj povos resti, eĉ dum multnombraj *kalpaoj*, blindaj pri sia Vera Naturo.

“Ni devas sekvi la Vojon laŭ la instruo de la Darmo, kaj ne teni nian menson en stato de maldiligenteco, nek krei obstaklojn al la ekkono de la Vera Naturo. Se vi nur aŭskultas la Darmon sen ĝin praktiki, tio nur donos okazon por la leviĝo de herezaj opinioj. Tial ni devas sekvi la Vojon laŭ la instruo de la Darmo, kaj en la disvastigado de ĝi ni ne devas alkroĉiĝi al la formo de la objektoj.

“Se vi komprenas, kion mi diras, kaj uzos tion en via predikado, en via praktikado kaj en via ĉiutaga vivo, tiam vi certe ne perdos la originan instruon de nia Skolo.

**§10-07**

“Kiam ajn oni metos al vi demandon, respondu negative, se la demando estas pozitiva; kaj inverse. Se oni demandos vin pri ordinarulo, diru al la demandanto ion pri saĝulo; kaj inverse. El la interdependeco de la du kontraŭoj, la signifo de *madjamao* (sanskrite: *madhyama*; la mezo) povos aperi. Se ĉiuj aliaj demandoj estas responditaj en tia maniero, vi certe ne estos malproksime de la vero.

“Se iu demandos vin, kio estas mallumo, tiam respondu al li jenmaniere: La lumo estas la *hetuo* (sanskrite: *hetu*; la radika kondiĉo; unua kaŭzo) kaj la mallumo estas la *pratjajao* (sanskrite: *pratyaya*; kondiĉo, kiu estigas ian fenomenon; dua kaŭzo). Kiam la lumo malaperas, la mallumo estas la rezulto. La du estas en kontrasto unu kun la alia. El la interdependeco de la du, la doktrino pri la *madjamao* leviĝos.

“Ĉiuj demandoj devos esti respondataj en tiu ĉi maniero. Por certigi la eternigon de la celo kaj la principo de nia Skolo, de nun vi ĉiuj devos sekvi tiun ĉi metodon en la transdonado de la Darmo al viaj daŭrigantoj de generacio al generacio.”

**§10-08**

En la sepa lunmonato de la jaro Ren Zi, la lasta jaro de la regperiodo Yanhe, la Patriarko sendis iujn el siaj disĉiploj al Xinzhou por konstruigi stupaon interne de la templo Guo En, kun la instrukcio, ke la laboro devos esti finita kiel eble plej baldaŭ. En la

sekva jaro, kiam la somero proksimiĝis al sia fino, la stupao estis finkonstruita en la difinita tempo.

En la unua de la sepa lunmonato la Patriarko kunigis siajn disĉiplojn kaj alparolis ilin dirante la jenon:

“Mi estas preta forlasi tiun ĉi mondon en la oka lunmonato. Se vi havas dubojn, volu demandi antaŭ ol estas tro malfrue, por ke mi povu fari al vi klarigojn, kiuj metos finon al viaj iluzioj. Post mia foriro vi trovos neniun, kiu povus vin instrui.”

Tiuj ĉi vortoj tuŝis Fahai kaj aliajn disĉiplojn ĝis larmoj, krom Shenhui, kiu restis trankvila kaj senlarma.

**§10-09**

Laŭdante lin la Patriarko diris: “La juna majstro Shenhui estas la sola, kiu atingis la mensostaton, en kiu li vidas nenian diferencon en bono aŭ malbono, konas nek malĝojon, nek ĝojon, kaj estas tute ne movita per laŭdo aŭ mallaŭdo. La ceteraj el vi ĝin ne atingis. Post praktikado dum tiom da jaroj sur tiu ĉi monto, kian progreson vi faris? Por kio vi nun

ploras? Ĉu vi estas maltrankvilaj pri mi pro tio, ke mi ne scias kien mi iros? Sed mi ja tion scias; alie, mi ne antaŭdirus al vi, kio okazos al mi. Tio, kio efektive plorigas vin, devas esti, ke vi ne scias kien mi iros; alie vi havus nenian kialon por ploro. En la naturo de la Darmo origine sin trovas nek veno, nek foriro, nek estiĝo, nek malestiĝo. Vi ĉiuj do sidiĝu, kaj lasu al mi reciti *gataon* pri la efektiveco kaj la iluzio kaj pri la moviĝo kaj la senmoveco. Recitu kaj enmemorigu ĝin. Se vi ĝin praktikos, via menso estos la sama, kiel la mia, kaj vi ne perdos la celon de nia Skolo.”

Ĉiuj disĉiploj *koŭtoŭis* al la Patriarko kaj petis, ke li lasu al ili aŭdi la *gataon*, kiu tekstis jene:

**§10-10**

En ĉio sin trovas nenio efektiva,

Kaj tial ni devas liberigi nin de la koncepto pri la efektiveco de objektoj.

Tiu, kiu alkroĉiĝas al la efektiveco de la objektoj,

Estas ligita de tiu ĉi koncepto, kiu estas pure iluzia.

Tiu, kiu ekkonis la “Efektivecon” (t. e. la Vera Naturo) interne de si mem,

Scias, ke la “Vera menso” povas esti serĉata nur for de falsaj fenomenoj.

Se la menso estas katenata de iluziaj fenomenoj,

Kie do estas trovita la Efektiveco dum ĉiuj fenomenoj estas neefektivaj?

La sentohavaj estaĵoj estas moviĝemaj,

La senanimaj objektoj estas senmovaj.

Tiu, kiu sin trejnas per ekzerciĝo al senmoveco,

Certe faras sin tiel senmova, kiel senanima objekto.

**§10-11**

Se vi serĉas veran senmovecon,

Ĝi certe sin trovos en ĉiaj aktivecoj.

La senmoveco estas la senmoveco (de la senanimaj objektoj),

En kiu sin trovas nek sento, nek la semo de la budheco. (Tia semo, semita en la koro de homo, produktos la budhan frukton, t.e. la eklumiĝon.)

Tiu, kiu estas lerta en la distingo de diversa *darmalakŝanao* (objektoj kaj fenomenoj),

Restas senmovebla en la “Unua principo” (Nirvano).

Se ĉio estas perceptata en tia maniero,

Tio estas la funkcio de *tatatao*.

Ĉiuj sekvantoj de la Vojo,

Faru la praktikon sincere kaj diligente per via tuta koro.

Se vi sekvas la Mahajanan Skolon,

Nepre ne alkroĉiĝu al la saĝo pri vivo kaj morto.

**§10-12**

Kun tiuj, kiuj estas simpatiaj,

Ni povas havi diskuton pri la Darmo.

Koncerne tiujn, kies vidpunkto estas diferenca de la nia,

Ni devas ilin ĝojigi nur per saluto kun la manplatoj kunmetitaj sur la brusto.

Disputoj origine estas fremdaj al nia Skolo,

Ĉar ili estas neakordigeblaj kun ĝia doktrino.

Obstina alkroĉiĝo al disputado blokos la pordon de la Darmo,

Kaj submetos nian Veran Naturon al la amareco de vivo kaj morto.

**§10-13**

Aŭdinte tiun ĉi *gataon*, ĉiuj disĉiploj respekte faris omaĝon. Konforme al la deziro de la Patriarko ili koncentris sian menson por meti la *gataon* en efektivan praktikon kaj sin detenis de plua disputado.

Sciante, ke la Patriarko baldaŭ forpasos, la *stavirao* (sanskrite: *sthavira*; pli aĝa, uzata kiel respekta titolo por prezidanta aŭ ĉefa bonzo) Fahai dufoje *koŭtoŭis* al li kaj demandis: "Post via eniro en *parinirvanaon*, kiu do estos la heredonto de la robo kaj la Darmo?"

"Ĉiuj miaj predikoj," respondis la Patriarko, "kiujn mi faris ekde mia alveno en la templon Dafan ĝis nun, povas esti kopiitaj por cirkulado en volumon titolitan *Estrado-Sutro de Darmo-Trezoro*. Bone gardu ĝin kaj transdonu ĝin de generacio al generacio por la savo de ĉiuj sentohavaj estaĵoj. Se vi sekvos tiun ĉi instruon, viaj predikadoj estos konformaj al la ortodoksa Darmo. Nun mi donas al vi la tutan Darmon, sed ne la robon.

**§10-14**

“Ĉar vi, kun pura kaj profunda kredo, jam estas firmaj kaj liberaj de duboj, vi ĉiuj kompetentos pri la granda misio (efektivigi la altan celon de Skolo). Krome, laŭ la *gatao* de Bodidarmo la unua Patriarko, la robo ne konvenas por esti transdonata. La *gatao* tekstas jene:

La celo de mia veno al tiu ĉi lando (t.e. Ĉinio)

Estas transdoni la Darmon por la savo de tiuj, kiuj estas sub iluzioj.

Kun siaj kvin petaloj la floro estas kompleta,

Kaj sekve la frukto estos nature donata.” (la floro: Ĉinio; kvin petaloj: anticipo pri la disvolviĝo de la Djana Skolo en la kvin ĉefajn semojn; la frukto: la prosperiĝo de la Darmo)

**§10-15**

“Miaj amikoj en la boneco,” daŭrigis la Patriarko, “purigu vian menson kaj aŭskultu min. Tiu, kiu deziras atingi la ĉiosciantan ‘semo-saĝon’ (saĝo pri la kaŭzo de ĉiuj fenomenoj), devas koni la ‘*Samadion de* Unueco (*samadio*, en kiu la menso

atingis nedividitan staton esti fiksita nur al kvieteco) kaj la ‘*Samadion de* Unu-Ago’ (*samadio* por konstati, ke la naturo de ĉiuj budhoj estas la sama). En ĉiuj cirkonstancoj, liberigu vin de la alkroĉiĝo al la formoj (t. e. objektoj), kaj en via kondutado kontraŭ ili, detenu vin de ĉia inklino aŭ de malinklino, ne lasu estiĝi la deziron preni aŭ rifuzi. Restu indiferentaj ĉe sukceso aŭ malsukceso, antaŭ profito aŭ malprofito, kaj ĉiam estu kvietaj kaj serenaj, modestaj kaj akomodiĝemaj, simplaj kaj senpasiaj. Jen kio estas nomata la ‘*Samadio* de Unueco’. En ĉiuj okazoj, ĉu ni estas promenantaj, starantaj, sidantaj aŭ kuŝiĝintaj, ni devas teni nian menson en rekta stato (t. e. simpla, lojala). Tiam, restante senmove tie, kie ni faras nian praktikadon, ni efektive atingos la Puran Landon. Jen kio estas nomata la ‘*Samadio de* Unu-Ago’.

**§10-16**

“Tiu, kiu jam atingis tiujn du *samadiojn*, povas esti simila al la prisemita tero. Kovritaj en fekunda grundo ili nature kreskos kaj portos fruktojn. Ĝuste

tia estas la okazo de la ‘*Samadio* de Unueco’ kaj la ‘*Samadio de* Unu-Ago’.

“Mia instruado al vi nun povas esti simila al ĝustatempa pluvo, kiu alportas humidon al la vasta tero. La budho-naturo interne de vi povas esti simila al la semo, kiu, humidigite de la pluvo, povos rapide kreski. Tiu, kiu efektivigas miajn instrukciojn, certe povos atingi la bodion. Tiu, kiu sekvas la instruon de nia Skolo, certe atingos la mirindegan frukton (t.e. la budheco). Aŭskultu do mian *gataon*:

Nia menso-grundo havas en si multajn semojn,

La ĉio-trapenetranta pluvo ilin ĝermigas.

Kiam la ‘floro’ de Subita Eklumiĝo atingas la floradon,

Ni certe povos rikolti la frukton de la bodio.”

**§10-17**

Poste li aldonis: “La Darmo estas nedueca kaj tia estas ankaŭ la menso. La Vojo estas pura kaj super ĉiaj formoj. Mi avertas vin ne kontempli la kvietecon aŭ peni malplenigi vian menson. Nia menso origine estas pura kaj klara, kaj estas super avido kaj rezigno.

Faru vian plejeblon, ĉiu el vi, kaj iru, kien ajn la cirkonstancoj vin kondukos, por prediki tie.”

La disĉiploj do riverence salutis kaj foriris.

**§10-18**

En la oka de la sepa lunmonato la Patriarko donis subitan ordonon al siaj disĉiploj, ke ili pretigu ŝipon por lia reveno al Xinzhou, lia naskiĝloko. Ili ĉiuj insiste petegis lin resti.

“Estas tute nature, ke mi devas iri tien,” diris la Patriarko, “ĉar la morto estas la neevitebla rezulto de la naskiĝo. Ĉiuj budhoj, kiuj aperas en tiu ĉi mondo, devas sperti la surteran morton antaŭ ol eniri en la *parinirvanaon*. Ne sin trovas, kompreneble, escepto por mia korpo, kiu devas havi sian revenlokon.”

“Post via vizito al Xinzhou,” petegis la disĉiploj, “bonvole revenu ĉi tien kiel eble plej baldaŭ.”

“La velkintaj folioj de arbo ĉiam falas sur ĝiajn radikojn,” respondis la Patriarko. “Mi ne povas diri kiam mi revenos, same kiel antaŭ ol mi venis ĉi tien, mi ne faris la diron.”

**§10-19**

Poste ili demandis: “Al kiu do vi transdonos la tutan Ortodoksan Darmon (laŭvorte: la okulon de la Ortodoksa Darmo)?”

“Tiuj, kiuj faras la praktikon, ĝin ricevos, kaj tiuj, kiuj havas la menson libera de pensoj (t.e. libera de arbitraj konceptoj), ĝin plene komprenos.”

Ili ree demandis: “Ĉu okazos katastrofoj post via morto?”

“Kvin aŭ ses jarojn post mia morto,” respondis la Patriarko, “iu venos kaj fortrancos mian kapon. Volu aŭskulti kaj gardi en la memoro la jenan antaŭdiron:

Tiu, kiu volos mian kapon por kulto,

Sendos iun, kies buŝo devos esti nutrata.

Kiam la katastrofo de ‘*Man*’ okazos,

‘*Yang*’ kaj ‘*Liu*’ estos registaraj oficistoj.” (Li antaŭdiris, ke iu homo kun nomo enhavanta ĉinan ideografiaĵon “*Man*” estos dungita pro manko de vivrimedoj forŝteli lian kapon, kaj ke la katastrofo okazos tiam, kiam “*Yang*” kaj “*Liu*” estos la ĉefoj de la loka registaro.)

Poste li aldonis: “Sepdek jarojn post mia forpaso aperos du bodisatvoj el la Oriento, unu bikŝuo, unu laiko. Ili samtempe predikos pri la Darmo, plifirmigos nian Skolon, rekonstruigos niajn templojn, kaj transdonos la Darmon al multnombraj sekvantoj.”

**§10-20**

“Ĉu vi povus lasi al ni scii, dum kiom da generacioj la Darmo estis transdonata unu al la alia ekde la apero de la plej frua Budho ĝis nun?” demandis la disĉiploj.

“La budhoj, kiuj aperis en tiu ĉi mondo, estas tro multaj por esti kalkulataj,” respondis la Patriarko, “sed lasu al ni komenci de la lastaj sep budhoj. Ili estas:

Budho Vipassin (palie: *Vippasin*; sanskrite: *Vipaśyin*)

Budho Sikhin (palie: *Sikhin*; sanskrite: *Śikhin*)

Budho Vessabhu (palie: *Vessabhū*; sanskrite: *Viśvabhū*)

(La ĉi-supraj tri estas la budhoj de la lasta Glora *Kalpao*, t.e. Alamkarakalpa, sanskrite: *Alamkārakalpa*)

Budho Kakusandha (palie: *Kakusandha*; sanskrite: *Krakucchanda*)

Budho Konagamana (palie: *Konāgamana*; sanskrite: *Kanakamuni*)

Budho Kassapa (palie: *Kassapa*; sanskrite: *Kāśyapa*)

Budho Ŝakjamunio (sanskrite: *Śākyamuni*)

(La ĉi-supraj kvar estas la budhoj de la nuna Bona *Kalpao*, t.e. la Bhadrakalpa, sanskrite: *Bhadrākalpa*)

"Ekde la Budho Ŝakjamunio, la Darmo estas unuafoje transdonita al la unua Patriarko, Arya Mahakasyapa (sanskrite: *Ārya Mahākāśyapa*), kaj poste al:

la dua Patriarko Arya Ananda (sanskrite: *Ārya Ānanda*)

la tria Patriarko Arya Sanavasa (sanskrite: *Ārya Śāṇavāsa*)

la kvara Patriarko Arya Upagupta (sanskrite: *Ārya Upagupta*)

la kvina Patriarko Arya Dhritaka (sanskrite: *Ārya Dhṛtaka*)

la sesa Patriarko Arya Michaka (sanskrite: *Ārya Micchaka*)

la sepa Patriarko Arya Vasumitra (sanskrite: *Ārya Vasumitra*)

la oka Patriarko Arya Buddhanandi (sanskrite: *Ārya Buddhanandi*)

la naŭa Patriarko Arya Buddhamitra (sanskrite: *Ārya Buddhamitra*)

la deka Patriarko Arya Parsva (sanskrite: *Ārya Pārśva*)

la dekunua Patriarko Arya Punyayasas (sanskrite: *Ārya puṇyayaśas*)

la dekdua Patriarko Arya Bodhisattva Asvaghosa (sanskrite: *Ārya Bodhisattva Aśvaghoṣa*)

la dektria Patriarko Arya Kapimala (sanskrite: *Ārya Kapimala*)

la dekkvara Patriarko Arya Bodhisattva Nagarjuna (sanskrite: *Ārya Bodhisattva nāgārjuna*)

la dekkvina Patriarko Arya Kanadeva (sanskrite: *Ārya Kāṇadeva*)

